

IVO LAPENNA

**AKTUALAJ PROBLEMOJ
DE LA
NUNTEMPA INTERNACIA VIVO**

**FUNDAMENTAJ NOCIOJ
LUKTO POR LA PACO PER JURAJ RIMEDOJ
INTERNACIAJ ORGANIZAAJOJ**

ROTTERDAMO, 1952

Elektronika eldono kun permeso de
s-ino Birthe Lapenna
fare de eldonejo
www.kehlet.com
Danlando 2000

AKTUALAJ PROBLEMOJ

DE LA

NUNTEMPA INTERNACIA VIVO

Originale verkita en Esperanto
de

Dro Ivo Lapenna

Universitata profesoro

ROTTERDAMO, 1952

ĈIUJ RAJTOJ REZERVITAJ

ANTAŬPAROLO

Sincere dirite, antaŭ ol publikigi ĉi tiun verkon, mi iom hezitis. La deziro paroli en la lingvo amata estis tre forta. La timo, ke eble ne troviĝos sufiĉe da personoj, kiuj pretos aŭskulti, ne malpli senkuraga.

Estas konate, ke libroj kun eĉ nur iom faka karaktero, ne estas tre multnombraj en nia lingvo. Por ili, tute simple, ne ekzistas sufiĉe granda legantaro. Sciencisto aŭ alia fakulo posedanta Esperanton – kaj tiaj ne mankis kaj ne mankas – sentas sin devigata verki ne en la lingvo, kies literaturon li dezirus riĉigi kaj kies progreson li volus akceli, sed en sia gepatra aŭ en alia nacia lingvo. Dum la pli ol sesdekjara ekzisto de Esperanto tio estis preskaŭ senescepta regulo. Fakte, sendube, tre bedaŭrinda, kiu ne nur senigis nian literaturon de valoraj verkoj, sed ankaŭ bremsis la evoluon de la faka lingvobranĉo.

La plibonigo de tiu stato ne troviĝas nur en la manoj de la verkistoj. Por ke la faka kaj scienca literaturo kresku pli konsiderinde, estas nepre necese, ke ekzistu sufiĉe multnombra publiko. Tion konstatis – post detala esploro de la afero – ankaŭ la II Sekcio (Esperanto en Scienco kaj Tekniko) de la 36-a Universala Kongreso de Esperanto. Nur la koincido de la du kondiĉoj – preteco de la verkistoj publikigi siajn fakajn laborojn originale en Esperanto kaj sufiĉa interesiĝo de la publiko por tiaj verkoj – donas fekundan grundon por kreskigo de tiu valora planto.

La unua antaŭkondiĉo ekzistas. En multe pli alta grado, ol oni kutimas supozil! La dua – ŝajnas al ni – komencas formiĝi.

Pluraj faktoj ĝin pravas: la ekzisto kaj la iompostioma fortiĝo de Internacia Scienca Asocio Esperantista, la publikigo de gravaj sciencaj disertacioj en Japanio, la fondo de pluraj katedroj de Esperanto en diversaj universitatoj, la vere multnombra aŭdantaro de la Internacia Somera Universitato.

Stimulita de tiuj faktoj, instigita de kelkaj geamikoj kaj kuraĝigita de la bona akcepto, kiun havis Retoriko – mia unua libro, verkita originale en Esperanto – mi fine decidiĝis prezenti al la Esperanta publiko novan verkon.

Du, tri aferojn mi dezirus akcenti:

La verko ne havas pretendon elĉerpi la temaron. Krom la pritrakitaj, ekzistas ankaŭ multaj aliaj problemoj de la nuntempa internacia vivo. Mi elektis nur kelkajn el ili: tiujn, kiuj ŝajnis al mi la plej gravaj, la plej aktualaj kaj kiuj, samtempe, povus esti interesaj por larĝa publiko. La kriterio, do, ne estis nur la fakta nuntempa graveco, sed ankaŭ la grado de ĝeneraleco. Kontentigi la postulojn de tia kriterio estis per si mem malgranda problemeto. Dank'al internacia karaktero de la Esperanta publiko, mi esperas, ke ĝi povis esti relative kontentige solvita.

Pro la fakto, ke la verko neniel celas nur la rondojn de specialistoj, estis necese simpligi ĝis maksimumo la pure fakajn partojn. Tial mi klopodis prezenti tre populare – escepton faras la Aldono – la kernon mem de la pritraktita demando. Pro tio, interalie, estas intence evititaj – se iel eble – ne nur la menciado de unuopaj artikoloj kaj paragrafoj el diversaj internaciaj dokumentoj, sed ankaŭ la citado de aŭtoroj kaj de iliaj verkoj.

Verki populare ne signifas rezigni pri scienceco. Tio estis alia problemeto. Multaj konceptoj ne estas ankoraŭ sufiĉe precize difinitaj. Pri pluraj demandoj la opinioj malsamas. Mi klopodis science objekte, sed simple kaj kompreneble por ĉiu, prezenti la ĉefajn direktojn aŭ skolojn por reliefigi la esencon de la afero. Tamen, mi ne povis ne konservi kaj ne menci mian propran starpunkton. Eble ĝi estas erara. Se jes, mi estos feliĉa korekti ĝin en alia okazo. Nur tiu neniam eraras, kiu havas nenian opinion!

Dum la laboro mem mi devis fronti ankaŭ lingvan problemeton: ĉu uzi por iu faka koncepto internacian radikon, ne troveblan en la Plena Vortaro, aŭ krei por tiu ideo novan vorton el la jam ekzistantaj Esperantaj radikoj? Ĉu, ekzemple, diri „mediacio, konciliacio, armistico” k.t.p. – vortoj, kies radikoj estas internacie konataj en la medioj de fakuloj – aŭ diri eble „perado, pacigo, antaŭpaco” k.s.

En tiaj okazoj mi decidiĝis por la unua alternativo. Unue tial.


ĉar tiuj radikoj jam estas internaciigitaj kaj, sekve, enkonduki ilin en la lingvon estas konforma al la Fundamento. Krome, al la fakuloj ili estas konataj kun sia preciza teknika signifo, dum por nefakuloj estus ĉiel nepre necese doni klarigojn, eĉ se la nova vorto, aŭ la vorto kun tiu nova senco, estus kreita el la jam ekzistantaj Esperantaj radikoj. Kompreneble, la signifo de tiaj vortoj (entute nur 5-6) estas donita aŭ en la teksto mem aŭ en piednotoj.

Mi opinias, ke ne estas utile tro insisti pri esperantigo de geografiaj nomoj. Sed, se tia nomo jam ricevis Esperantan formon, estas konsilinde uzi ĝin en tiu formo. Tiun vidpunkton mi aplikis en la libro.

Fine de la verko troviĝas studo, en kiu estas pritraktita tre speciala problemo, ĝis nun – laŭ mia scio – ne tuŝita en la monda literaturo de internacia juro. Kvankam ĝia enhavo sendube ne apartenas al la grandaj problemoj de la hodiaŭo, tamen mi ĝin aldonis. Mi tion faris precipe por la legantoj juristoj kaj tute aparte por la internaciistoj. Cetere, se mi ne eraras, ĝi estas la unua pure faka studo pri speciala demando el sfero de internacia juro, verkita en la Internacia Lingvo. Espereble ĝi malfermos la vojon al plua progreso de tiu interesa fako en la Esperanta scienca literaturo.


Londono, la 15-an de Septembro 1951

I.L.



UNUA PARTO

FUNDAMENTAJ NOCIOJ



ĈAPITRO I

NACIO KAJ ŜTATO

La du vortoj – nacio kaj ŝtato – estas ofte uzataj. Oni renkontas ilin kaj en la ĉiutaga vivo kaj en gravaj interŝtataj dokumentoj. Tamen, kvankam tre kutimaj, ilia preciza signifo estas ĝenerale nekonata. Eĉ pli: ĝi varias ne nur de unu lingvo al alia lingvo, sed ankaŭ de unu medio al alia medio de la sama lingva komunajo. Tio kelkfoje kaŭzas konfuzon kaj malagrablajn miskomprenojn.

Oni povas diri, ke en Oriento de Eŭropo, precipe sur la Balkana duoninsulo kaj en Rusio, oni regule tre klare distingas la du konceptojn. En tiuj regionoj la t.n. nacia demando estis ege aktuala en la lastaj unu kaj duona jarcentoj. La naciaj aspiroj al sendependeco postulis multe da luktoj kaj kostis amason da sango kaj suferoj. Sed ili rezultigis ankaŭ grandajn verkojn. Al ili estas grandparte ŝuldata – rekte aŭ malrekte – eĉ la genia kreaĵo de D-ro Zamenhof. En tiuj landoj, kvankam oni ne scias ĉiam la sciencan difinon pri nacio, tamen ĉiu, eĉ la plej ordinara homo, ĝin forte sentas. Tial ne okazas, ke, parolante pri "nacio" aŭ „nacieco", oni uzos la vortojn "ŝtato" aŭ „ŝtataneco".

Male, en la Okcidenta Eŭropo, kie jam delonge la naciismo realigis siajn postulojn kreinte sendependajn unuecajn naciajn ŝtatojn, nome ŝtatojn konsistantajn el unusola nacio, ofte okazas, ke la du vortoj estas egale uzataj kun la sama senco. Eĉ en la oficialaj dokumentoj oni parolas pri "nacieco" (france, ekzemple, "nationalité", itale "nazionalità" k.t.p.), kvankam fakte oni pensas al ŝtataneco. Tio estas komprenebla, ĉar ĝenerale la nacio kaj la ŝtato identas en tiuj landoj.

Pro la graveco de la konceptoj pri nacio kaj pri ŝtato en la nuntempa internacia vivo kaj por eviti ĉiujn eblajn erarojn kaj miskomprenojn, ŝajnas oportune diri pri ili almenaŭ kelkajn vortojn.

1) LA NACIO

La koncepto pri nacio estas relative moderna. Ĝi ekestis paralele kun la formiĝo de la nacio. Tiu ĉi lasta estas rezulto de pluraj faktoroj, kiuj – kun la fera logikeco de la leĝoj regantaj la historian evoluon – puŝis la homojn senti, pensi, agi, vivi kaj organiziĝi en formoj pli ampleksaj, pli larĝaj, ol estis la ĝistiamaj.

La feŭdismo ne konis kaj ne povis koni la ideon pri nacio en nia hodiaŭa senco de la vorto. La tuta feŭda sistemo en ĉiuj siaj aspektoj – ekonomia, socia, politika kaj lingva – estis tia, ke ĝi favoris malgrandajn memsufiĉajn unuojn kaj, laŭ esenco mem de sia naturo, kontraŭis la kreiĝon de pli grandaj sociaj komunajoj, kiaj estas la nacioj.

La diversaj aspektoj de feŭdismo estis, en plej koncizaj trajtoj kaj en plej ĝeneralaj linioj, la jenaj:

a) *La ekonomia aspekto.* – En feŭdismo, kiel konate, la tuta ekonomio estis koncentrigita en la feŭda bieno, kiu produktis ĉion, kion ĝi bezonis: ne nur nutraĵojn – panon, viandon, trinkaĵojn k.t.p. – sed ankaŭ ĉiaspecajn metiajn produktojn, de vestaĵoj kaj loĝobjektoj ĝis armiloj kaj ornamaĵoj. La divido de la laboro estis minimuma, kaj eĉ tia divido realiĝis nur en la mallarĝaj kadroj de la bieno. Se entute okazadis iaj interŝanĝoj, ili fariĝadis ne pere de la mono, sed rekte, produkto por produkto. La komerco kaj trafiko estis preskaŭ nulaj. Ne ekzistis grandaj merkatoj. Ĉiu feŭda bieno estis aparta ekonomia unuo, disigita de la aliaj per murego de ekonomia izoliteco. Temis pri vera ekonomia aŭtarkio, evoluinta ĝis la plej alta grado.

En la mezepokaj urboj, kvankam ili havis apartajn socian rolon kaj juran pozicion, la situacio ne multe diferencis tiurilate. La civitanoj posedadis tie ne nur siajn metiejojn, sed ankaŭ siajn proprajn domojn, siajn ĝardenojn, brutarojn, kortobirdojn k.t.p. Ilia mastrumado sufiĉis por kontentigi la hejmajn bezonojn. Se oni, krome, aldonas, ke la metia produktado estis farata ne por la merkato, do por la nekonata aĉetonto, sed surbaze de mendoj, do por la konata aĉetanto, oni komprenos, ke ankaŭ la urbaj mastrumoj prezentis fermitajn ekonomiajn tutojn.

En feŭdismo, do, oni produktis, kaj sur la bienoj kaj en la urboj, nur por kontentigi la bezonojn fakte ekzistantajn kaj konatajn. La manko de iaj ajn iom pli fortaj ekonomiaj ligoj baldaŭ kaŭzis plenan atomigon de la tiama socio.

b) *La socia aspekto.* – La organizo de la socia vivo fidele respegulis la ekonomian realaĵon de feŭdismo. La grandega plimulto de la popolo – la servutuloj – estis ligita al la tero. Latine oni tion

diradis "*glebae adscripti*". La servutuloj ne rajtis forlasi la feŭdan bienon. Se la bieno pasis de unu posedanto en la manojn de alia, ankaŭ la servutuloj ricevis novan mastron. Ili estis konsiderataj kiel parto de inventaro. Sur la bieno, en modestaj kabanoj, ili naskiĝadis, vivadis kaj mortadis. La amasoj – krom en okazoj de spontanaj ribeloj – havis neniajn aŭ preskaŭ neniajn reciprokajn kontaktojn. Nur la nobelaro kaj la tiama sciencularo kontaktis sur vastaj teritorioj. Tia stato de la socia vivo havis gravajn konsekvencojn ankaŭ sur la lingva kampo. La popolaj amasoj parolis sennombrajn lingvojn kaj dialektojn, dum la regantaj rondoj, ligitaj per komunaj interesoj, utiligis la latinan kiel komunan lingvon. Tio ĉi, siavice, plifirmigis la solidarecon en la suproj de la feŭda socio sed, aliflanke, kontribuis al ankoraŭ pli granda diserigo de la bazo.

c) *La politika aspekto*. – La ekonomia disrompiteco troviĝas en la radikoj mem de feŭdismo. Tamen, ĝi ne povis tuj respeguliĝi ankaŭ je la politika organizo de la socio en la unua periodo, nome en la periodo de iompostioma transirado de la sklaveca ordo, tra diversaj duonfeŭdaj formoj, al formiĝo de pure feŭdaj rilatoj. La fondintoj de la t.n. barbaraj ŝtatoj, kiuj disdonadis la terojn de la subigitaj teritorioj al siaj parencoj, kunlaborantoj kaj al la eklezio, sukcesis krei larĝajn politikajn unuiĝojn kaj koncentrigi en siaj manoj grandegan potencon. Tio povis okazi nur en la frua feŭdismo kaj povis daŭri nur relative mallongan tempon. En tiu epoko, nome, la nova ekonomia kaj socia ordo ne estis ankoraŭ sufiĉe kristaligita nek fortika, kaj, aliflanke, la personaj ligoj de dankemo, sindono kaj ĵurita fideleco al la reĝo fare de la nova nobelaro estis ankoraŭ tro freŝdataj kaj tro signifaj por esti facilanime neglektataj.

Por tiu ĉi unua periodo fakte oni povas diri, ke la ŝtata konstruaĵo similis al piramido. Sur la pinto troviĝis la reĝo, la bazon formis la servutulaj amasoj, dum la intertavoloj konsistis el multnombraj malpli kaj pli grandaj nobelaj sinjoroj, ligitaj al siaj superuloj (ĝis la reĝo) per vasala fideleco, ĵure konfirmita. Sed tiu piramido, en kiu la politika ordo ne respondis al la evolutendenco kondiĉita de la ekonomia strukturo, estis renversita kaj kuŝis, aŭ, pli bone, balanciĝis sur sia pinto.

La plifirmiĝo de la feŭda ekonomia sistemo, akompanata de la samtempa malfortiĝo de la personaj ligoj en la feŭdula hierarkio, baldaŭ disrompis ĉiujn kunligajn fadenojn kaj tiu piramida palaco falis pro la premo de sia propra pezo kaj diseriĝis. La sama sorto trafis ĉiujn barbarajn ŝtatojn. Ĝi trafis eĉ tiel grandajn potencojn, kiaj estis la ŝtato de Karlo la Granda (IX j.c.) kaj la Kieva ŝtato de Rjurikoviĉoj (X j.c.). En la epoko de triumfo de la naturala

ekonomio ⁽¹⁾, kiu laŭ sia esenco disrompas la socion en sennombrajn malgrandajn unuojn, ĉiu tendenco krei grandajn politikajn unuiĝojn devis malsukcesi. La centrifugaj fortoj en la ekonomia bazo ne povas esti venkitaj de la centripetaj fortoj en la politiko.

Tiele baldaŭ ankaŭ la politika aspekto respondis al la ekonomia strukturo. Formale la reĝo estis konsiderata ne nur kiel tenanto de la supera politika potenco, sed ankaŭ kiel privata proprajulo de la tuta lando. Fakte, tamen, la tero troviĝis en la hereda posedo de la nobelaro, de la eklezio kaj, parte, de la liberaj urboj. De la efektivaj ekonomia kaj milita fortoj de ĉiu bienposedanto dependis lia persona povo ne nur en la kadro de la bieno, sed ankaŭ ekster ĝi. Tial ofte okazadis, ke unuopa granda feŭdulo fariĝadis pli grava kaj pli potenca ol la reĝo mem.

Mallonge, la ekonomia aŭtarkio kaŭzis grandegan politikan disrompitecon. En realaĵo ĉiu feŭda bieno estis vera malgranda sendependa ŝtato kun la feŭda sinjoro kiel suvereno. Tiu ŝtateto havis siajn propajn limojn, ĉe kiuj la feŭdulo enkasigadis diversajn doganpagojn. Sur la bieno mem oni enspezadis ne nur la kontribuaĵojn de la servutuloj, sed ankaŭ diversajn impostojn, ekzemple la imposton por trapasi ponton (pontaĵo), por utiligi ŝoseon (ŝoseaĵo) k.t.p., k.t.p.

Oni klare vidas, ke en la feŭdismo ne povis ekesti nacioj, nek formiĝi la ideo pri "nacio". La tuta strukturo de feŭdismo kontraŭstaris tion. La solaj du larĝaj ideoj, kiujn ĝi naskis estis la ideo de Kristanismo, konkretiĝinta en la Papismo, kaj la ideo de la t.n. Sankta Romia Imperio, subtenata de la Imperiestro. La unua bazis siajn postulojn kaj pravigis sian politikan aktivecon per la religia universaleco de Kristanismo, dum la dua akcentadis la neceson renovigi la iaman grandecon de la antikva Romia Imperio. Tiuj du universalismaj ideoj, tamen, ne eliradis el la kadro de la tiama politika penso. Ili estis nur plua konsekvenco de tiu ordo, funkcia pereo de personaj rilatoj de supereco kaj subeco. Temis nur pri plilongigo de la piramido ĝis la papo aŭ imperiestro, dezirantaj fariĝi la superuloj de ĉiuj reĝoj! Kaj, cetere, ju pli firmiĝadis la feŭdaj ekonomiaj rilatoj, des malpli grandaj estis la ŝancoj realigi universalan efektivan politikan potencon. Tial ankaŭ ili fakte malsukcesis. La novaj, grandaj sociaj kaj politikaj unuiĝoj, kiuj ekestis en la sekvinta historia periodo, dankas sian ekeston kaj sian vivokapablon al aliaj faktoroj kaj ne al universalismo de Kristanismo aŭ de la Imperio.

Kiuj estas tiuj faktoroj?

En la sino de la feŭdismo ekĝermis kaj iom post iom evoluis fortoj,

(1) Ekonomia sistemo, en kiu oni intersanĝas rekte produkton por produkto.

kiuj influis alcentrige kaj kiuj ebligis, unue, la kreon de grandaj absolutismaj monarkioj sur nacia bazo kaj, poste, kondiĉis la detruon de la feŭda ŝtato kaj la kreon de la moderna nacia ŝtato.

Tri faktoroj precipe efikis en la direkto de formiĝo de unuecaj komunaj sur grandaj teritorioj:

a) *la evoluo de la urboj*, en kiuj ĉiam pli kaj pli ekregis la varaj-monaj rilatoj pro la perfektigo kaj kresko de la produktofortoj, pro la plibonigo de la tekniko de la produktado kaj, sekve, pro la ĉiam pli multflanka disdivido de la laboro;

b) *la malgrandaj feŭduloj*, kies privilegiita pozicio en rilato al la servutuloj estis ĉiam pli endanĝerigata de la grandaj bienposedantoj;

c) *la eklezio*, precipe la pli malalta pastraro, kiu ofte suferis pro la ĉiopovo de la grandaj sinjoroj.

En la urboj formiĝis kaj senĉese fortikigis sian pozicion nova socia tavolo: la burĝaro. Kvankam la gravitopunkto de la ekonomia, socia kaj kultura vivo ankoraŭ longe restis la feŭda bieno, tamen, meze de la naturala ekonomio, la burĝa klaso ricevadis ĉiam pli signifan rolon. Miloj da urbaj homoj, kiuj okupiĝadis pri diversaj metioj kaj pri manufakturo, pri komerco kaj bankaferoj, sentadis ĉiam pli peze la ĉenojn de feŭdismo, de ĝia ekonomia kaj politika disrompiteco. Ili nepre deziris kaj postulis, ke formiĝu kaj konserviĝu grandaj komunaj, sur unuecaj teritorioj, sen internaj doganlimoj. Transirinte al la manufaktura kaj poste al industria produktado, do al produktado por la merkato, por la nekonata aĉetonto, la portantoj de la novaj ekonomiaj fortoj estis interesitaj je kreo de ampleksaj ekonomiaj unuoj, en kies kadroj ili senĝene povos vendadi siajn produktojn kaj kie ili samtempe estos protektataj kontraŭ la ekstera konkurenco.

Pro tio la monarkio havis, precipe en la komenco de tiu periodo, la plej bonajn aliancantojn en la burĝaro kiel klaso kaj en la urboj kiel politikaj unuoj. Ĝiaj klopodoj plilarĝigi kaj plifirmigi sian potencon rilate al la feŭdaj grandaj posedantoj trovis apogon ĉe la tria klaso. Sed tiujn tendencojn krei grandajn unuecajn ŝtatojn helpis ankaŭ la malalta nobelaro. Ĝi estis interesita je tio, ĉar ĝi sciis, ke la absolutisma monarkio kaj protektos ĝin kontraŭ la grandaj posedantoj kaj ebligas al ĝi plue konservi la privilegiitan pozicion rilate al la servutuloj. Fine, la eklezio, post kiam la projektoj de la papoj krei tutmondan ŝtaton montriĝis kiel plene nerealigeblaj, preferis la ordon en forta monarkio, ol la anarkian malordon, kaŭzitan de la ĉiopovaj altaj nobeloj, en malforta.

Paralele kun tiu evoluo de la ekonomiaj fortoj, la laboro ĉiam pli kaj pli estis dividata, la mono ludis ĉiam pli gravan rolon kaj,

kiel logika sekvo, la homoj ĉiam pli kaj pli venadis en staton de interdependeco sur multe pli larĝaj teritorioj, ol estis la feŭdaj bienoj. Tio kaŭzis novajn formojn de socia vivo. Oni komencis sentadi la apartenon ne plu sole al urbo aŭ al malgranda bieno, sed al granda komunajo, al nacio. Kreiĝis solidareco inter la apartenantoj de la sama komunajo, oni revivigis komunajn tradiciojn, oni similigis la kutimojn de la vivo. Ekĝermis ideoj pri la egaleco de la homoj kaj amasiĝis la postuloj nuligi ĉiajn ajn privilegiojn.

Samtempe naskiĝis ankaŭ la koncepto pri suvereneco. En tiu epoko ĝi havis duoblan soci-politikan sencon. Unuflanke ĝi estis armilo de unuecigo, utiligata de la reĝo por larĝigi la reĝan potencon kontraŭ la feŭda ĥaoso. Aliflanke ĝi direktiĝis kontraŭ la universalismaj tendencoj kaj de Papismo kaj de la Sankta Romia Imperio. Kiam, poste, la tiel komprenata suvereneco fariĝis malhelpo por la plua evoluo, tiam la Franca Revolucio donis al ĝi novan enhavon: ĝi proklamis la principon de nacia suvereneco.

Fine, la transpaso de feŭdismo al nova ekonomia kaj socia ordo – al kapitalismo – havis gravajn konsekvencojn ankaŭ koncerne la lingvon. Naskiĝis kaj plue evoluis la grandaj komunaj naciaj literaturaj lingvoj, kies celo estis servi kiel komunikiloj de la formiĝantaj nacioj. Aliflanke malaperis la latina, kies portanto – la feŭda klaso – estis detruita post pli aŭ malpli longa rezisto. La naciaj lingvoj, foje ekestintaj kaj firmiĝintaj, fariĝis siavice grava faktoro en la fortikigo de la nacia sento.

Tiamaniere, kiel oni vidas, multaj elementoj kontribuis al kreo de tio, kion ni hodiaŭ nomas nacio. La koncepto pri nacio entenas la ideon de homa komunajo, ligita per komunaj interesoj sur relative vasta teritorio, ligita per komuna lingvo, historio, tradicioj kaj kutimoj. El ĉiuj ĉi elementoj la ekonomia sendube estas la baza kaj, el la aliaj, la lingva tute certe estas la ĉefa. Ĉiuj ĉi faktoroj, influante unu la alian, kune kontribuas al kreo de tiu psika stato, kiu estas karakterizata de la sento pri aparteno al certa nacio, al certa nacia komunajo. Tio ne signifas, ke ĉiam, en ĉiu okazo nepre devas troviĝi ĉiu el la menciitaj faktoroj. Pro apartaj kaŭzoj unu aŭ pluraj el ili povas manki. Tio nur signifas, ke por la formiĝo de la ideo mem pri nacio kiel tia, ili havis pli aŭ malpli gravan rolon. Unufoje kreita, tiu koncepto povas transplantiĝi ankaŭ en mediojn, kiuj ne posedas ĉiujn kondiĉojn por originala kreo de la "nacio". Oni eĉ povas konscie flegi tiun senton. Sed tio ne estas aparte karakteriza nur por la fenomeno de "nacio". Ankaŭ aliaj sociaj fenomenoj ofte posedas la saman karakterizon.

La nova socia fakto trovis sian ideologian esprimon en la naciismo. Ĝi konsideras la nacion kiel fundamentan formon de ekonomia,

socia, politika kaj kultura kunvivado de la homoj. Sekve, la naciismo postulas, ke la nacio konserviĝu kiel sendependa, plene suverena ŝtato, aŭ ke ĝi, se ĝi ankoraŭ ne atingis la ŝtatan organizformon, transformiĝu en tian plene suverenan ŝtaton.

La nacia ideo ludis kaj ankoraŭ ludas gravegan rolon en la interna vivo de multaj ŝtatoj kaj en la modernepokaj internaciaj rilatoj. Multaj nuntempaj okazaĵoj en Orienta Eŭropo kaj, hodiaŭ, ankaŭ en Azio kaj en Afriko ne estas kompreneblaj sen ĝi.

Tiu ideo havis fortan eĥon ankaŭ en la teorio de internacia publika juro. Tiele, ekzemple, la itala skolo de la "*Risorgimento*" starigis la postulon, ke kiel subjektoj de la internacia juro estu konsiderataj la nacioj. La itala aŭtoro Mancini konsideris la naciojn kiel la unuajn elementojn de la internacia vivo kaj aprobis la ideon de Mazzini, ke nur la naciaj ŝtatoj, nome la ŝtatoj, kiuj konsistas el unu nacio, estas veraj subjektoj de la internacia juro ⁽¹⁾. Laŭ tiu skolo, nur tiuj militoj estas justaj kaj, sekve, permesitaj, kiuj realigas la nacian ideon. Kaj la internaciaj kontraktoj, kontraŭaj al la rajtoj de kiu ajn nacio, estus nevalidaj el jura vidpunkto. Poste, kiam la itala popolo atingis siajn aspirojn pri unuiĝo kaj kreo de nacia ŝtato, la itala skolo tute forlasis la teorion, ke la nacio estas subjekto de la internacia juro. Ankoraŭ pli poste, kiam la itala naciismo transformiĝis en imperialismon, la faŝisma teorio starigis inversan tezon, nome ke la ŝtato kreas la nacion, ke la ŝtato estas la sola portanto de rajtoj en la internacia vivo kaj ke la bono de la ŝtato povas pravigi ĉiujn ĝiajn agojn, ankaŭ militon por subpremi aliajn naciojn.

Male, la germana nazisocialismo favoris la ideon pri la nacio kiel subjekto de internacia juro. Kompreneble, ĝi favoris tiun penson nur rilate al la germana nacio, ĉar ĝi deziris teorie pravigi siajn postulojn organizi la Germanojn, vivantajn en eksterlando, kaj utiligi ilin por siaj imperialismaj celoj.

Kiel oni vidas – kaj per tiaj ekzemploj oni povus plenigi tutan libron –, la naciismo estis diversmaniere komprenata kaj ĝiaj postuloj estis tre diferencaj en diversaj medioj kaj epokoj. La personoj, kiuj vidas nur unu ĝian flankon, aprobas aŭ malaprobas ĝin depende de la starpunkto kiun ili havas aŭ depende de la aspekto, kiun ili observas.

Sajnas al ni, ke la fenomenojn en la socio oni rajtas rigardi nek statike, nek abstrakte. Rilati science al ili signifas observi ilin dialektike, do en kunligiteco kun la historiaj kondiĉoj, en kiuj ili ekestis. Ankaŭ la naciismo devas esti konsiderata kiel progresema en la

⁽¹⁾ Mancini evoluigis siajn ideojn precipe en la verko "Pri la naciecoj kiel fundamento de la internacia juro" (1851).

epoko, kiam ĝi formiĝis, ĉar tiam ĝi signifis neadon de la malnoviĝintaj ekonomiaj kaj sociaj formoj kun samtempa apogo al la novaj fortoj.

Kun la tempo la naciismo, tamen, ŝanĝis sian rolon. Ĝi ne nur ne plu estis progresema, ne plu helpis la evoluon, sed, male, ĝi fariĝis rekta barilo de la progreso.

La grandega kresko kaj potenco de la produktaj rimedoj en la lastaj jardekoj kreis tiajn eblecojn de produktado, ke la naciaj merkatoj fariĝis nesufiĉaj kaj nekontentigaj. Tiu nova situacio manifestis sur diversaj kampoj du antagonismajn tendencojn.

Unuflanke troviĝas la klopodoj plene sendependigi la nacian ekonomion kaj, laŭ ebleco, per militaj akiroj plilarĝigi la merkatojn. Aliflanke, la ĉiam pli sentiĝanta ekonomia interdependeco de la mondo rezultigis sinceran deziron trovi novajn formojn de internacia kunlaborado sur ekonomia kampo.

Ankaŭ la socia vivo montras du aspektojn. La unua manifestiĝas en la deviga edukado de la homoj al sentado, pensado kaj agado nur en fermitaj, mallarĝaj naciaj kadroj. La alia sentigas la deziron, ĉiam pli viglan kaj pli fortan, komunikadi internacie, tutmonde, vivi kaj kondukti eksternacie, nur home. Kompreneble, la lingva demando ne povas esti netuŝita de tiu realaĵo: se, unuflanke, la imperialismoj volas altrudi siajn proprajn lingvojn al la popoloj sub ilia influo, aliflanke, malgraŭ kaj spite al ĉiuj obstakloj, la Internacia Lingvo trovas ĉiam pli fortan apogon.

Fine, en la politiko la naciismo tendencas transformiĝi en imperialismon kun forte akcentitaj rasismaj trajtoj. Ĝiaj plej evidentaj formoj estis la faŝismo kaj la nazi-socialismo, sed ankaŭ en aliaj naci-ŝovinismaj sistemoj ĝi estas klare videbla. De la alia flanko estas la klopodoj formi interŝtatajn organismojn, kia estis la Ligo de Nacioj aŭ kia nun estas la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj. Ankaŭ la tendencoj krei tutmondan ŝtaton, Eŭropan Federacion k.t.p. apartenas al la sama kategorio.

La hodiaŭa epoko estas, do, karakterizata de grandega lukto inter du fundamente antagonismaj konceptoj, nome inter la nova naciismo, transformiĝinta aŭ nepre transformiĝanta en imperialismon, kaj la universalismo. La homaro travivas – kiel ĉiam en tiaj transiraj periodoj – pezajn momentojn. Ĝi staras antaŭ la granda problemo: trovi la solvon inter tiuj du antagonismaj tendencoj. Se la universalismo ne estas ankoraŭ praktike realigebla, ĉar ne ĉiuj kondiĉoj jam maturiĝis por tio, ankaŭ la naciismo ne plu povas esti gvid-principo, ĉar ĝiaj kondiĉoj jam kadukiĝis. Sed oni ne forgesu, ke kadukiĝi ne signifas morti. La nacia sento estas ankoraŭ vivanta en la konscio de la homoj. Kaj kvankam ĝia ekonomia elemento grand-

parte malaperis, restis tamen la aliaj faktoroj: la kutimoj, la tradicioj kaj precipe la naciaj lingvoj.

2) LA ŜTATO

Pri la ekesto de la ŝtato ekzistas multaj teorioj, inter si ofte tre diferencaj kaj kontraŭaj unu al la alia.

Ĉiuj ĉi teorioj estas, tamen, divideblaj je tri ĉefaj grupoj:

a) Laŭ la *teologia koncepto* la ŝtato *estas manifestiĝo* de dia volo, de iaj superaj, eksternaturaj fortoj. Tiu koncepto precipe floris en epokoj kaj en medioj, en kiuj la religiaj sentoj estis speciale fortaj kaj la influo de la organizitaj religiaj komunaj apartoj aparte granda. La pli profunda senco de tiu koncepto estas pruvi kaj teorie pravigi la konkretan, la ĝuste ekzistantan ŝtatoformon kiel sole eblan kaj justan. Ĉar, kompreneble, se la ŝtato estas dia kreaĵo, tiam la homoj ne rajtas ĝin ŝanĝi. Ĝi devas esti kaj resti ĝuste tia, kia ĝi estas.

b) Laŭ la *teorio de kontrakto* la ŝtato ekestis kiel rezulto de interkonsento inter la personoj, kiuj ĝin formas, por transformi la antaŭan anarkion en ordon. Tio estis farita en la intereso de ĉiuj. Tiu ĉi teorio estis direktita kontraŭ la mortanta feŭda absolutisma monarkio. Ĝi pravigis la ribelon por ŝanĝi neelteneblajn ŝtatoformojn. Se liberaj homoj en formo de kontrakto kreis la ŝtaton por protekti siajn interesojn, tiam ili, restante laŭ la esenco mem de sia naturo liberaj, povas ĉiam ŝanĝi la kontrakton kaj krei alian, pli konvenan ŝtaton.

c) La tria grupo de teorioj klarigas la ekeston de la ŝtato *pere de la perforto*. En tiu grupo estas klare distingeblaj du subgrupoj.

La unua, ĉefe reprezentita de prof. Gumploviĉ, klopodis pruvi, ke la unuaj ŝtatoj ekestis tiel, ke unu gento, venkinte la alian aŭ la aliajn, kreis apartan aparaton – la ŝtaton – por daŭre teni la venkitojn en stato de subigiteco.

La dua, la t.n. klasa teorio, forĵetas plej energie ĉiujn aliajn hipotezojn kaj klarigas la ekeston de la ŝtato per la formiĝo de la klasoj. Laŭ ĝi, la ŝtato ekestis kiel rezulto de rompiĝo de la primitiva, senklasa socio en klasojn. La akumulado de la riĉaĵoj en la manoj de la malplimulto kreis la bezonon formi devigan aparaton de subpremo kun la celo konservi la aktualan (samtempan) ekonomian kaj socian ordon, konvenan por la regantoj.

Ne estas loko ĉi tie por analizi detale la fenomenon de la ŝtato kaj la diversajn teoriojn, kiuj provas klarigi ĝian ekeston kaj ĝian esencon. Tamen, estas necese rimarkigi, ke, se oni forĵetas kiel tute nerealajn la teoriojn teologiajn kaj tiujn de kontrakto, restas nur la teorioj de perforto kiel la sole eblaj. Estas tre malfacile hodiaŭ diri, ĉu la ŝtato ekestis en ĉiu okazo kiel rezulto de venko de unu gento

super la alia, aŭ kiel konsekvenco de la rompiĝo de la primitiva socio en klasojn. Sed estas tute certe, ke la elemento de perforto troviĝas en la radikoj mem de la ŝtato.

Ne tuŝante la religiajn sentojn de kiu ajn, ni nur atentigas, ke hodiaŭ eĉ la plej kredema homo ne kuraĝus akcepti la teologian koncepton. Ĉar se la ŝtato estus dia kreaĵo, tiam, kompreneble, ĉiu ŝtato devus esti kreita laŭ la sama maniero kaj esprimi la dian volon. Ŝajnas al ni, ke estas tre dubinde, ĉu – el vidpunkto de kiu ajn religio – iuj hodiaŭaj ŝtatoj povus esti konsiderataj kiel diaj kreaĵoj!

Kaj kion diri pri la teorioj de kontrakto? Eĉ se oni akceptus la neeban hipotezon pri ekesto de la ŝtato laŭ tiu maniero, oni tamen neniel povus konsenti, ke tia kontrakto povus esti farita kun la plena aprobo de ĉiuj membroj de la komunaĵo, formonta poste la ŝtaton. Kaj ĉar la ŝtato estas organizaĵo, kiu ampleksas ĉiujn personojn vivantajn sur difinita teritorio, tute egale ĉu ili volas la ŝtaton aŭ ne, ĉu al ili plaĉas la konkreta ŝtatoformo aŭ ne, estas evidente, ke en ĉiu okazo temas pri perforto, almenaŭ pri perforto de la plimulto rilate al la malplimulto. Sed en la praktiko la afero regule ne prezentiĝas tiel. Temas kutime pri perforto de la malplimulto, eĉ de tre malgranda malplimulto rilate al la plimulto!

Por ke iu organizita homkomunaĵo povu esti konsiderata kiel ŝtato, ĝi devas posedi iujn ecojn. Hodiaŭ estas ĝenerale akceptite, ke – almenaŭ el la vidpunkto de la internacia juro – la konsistigaj elementoj de la ŝtato estas:

- a) certa, klare difinita *teritorio*;
- b) pli aŭ malpli granda *loĝantaro*;
- c) *organizo sendependa de alia ŝtato*;
- d) *kapablo regi* laŭ la principoj kaj reguloj de la internacia juro.

La teritorio povas esti tute malgranda (Vatikano, mezamerikaj ŝtatoj), aŭ tre granda (Ĉinio, UŜo, Sovjetunio), sed ĝi devas esti objekto, sur kiu efektive realiĝas la ŝtata potenco. Tial, ekzemple, Ĉeĥoslovakio ne povis esti konsiderata kiel ŝtato dum la Unua Mondmilito, kvankam la Aliancaj estis rekonintaj la ĉeĥoslovakon registaron, formiĝintan en eksterlando por realigi la aspirojn de la Ĉeĥoj kaj Slovakoj pri sendependa ŝtato. Ĝi ne povis esti konsiderata kiel ŝtato tial, ĉar, tute simple, mankis la teritorio, sur kiu tiu registaro povus realigi la ŝtatan potencon. Tiu teritorio apartenis tiam jure kaj fakte al alia ŝtato, nome al Aŭstrio-Hungario.

Tute alie prezentiĝas la afero, se la ŝtato provizore perdas sian teritorion, ekzemple se la malamikaj trupoj okupas ĝin dum la milito. En tia okazo la ŝtato ne ĉesas ekzisti kiel subjekto. Post la reakiro

de la teritorio, ĝi denove plene funkcias kaj oni konsideras, ke ĝia kontinueco (vivo) el vidpunkto de la internacia juro ne estis interrompita. Tial la ŝtatoj, kiuj dum la pasinta milito estis okupitaj de la aksaj trupoj, ne perdis sian juran personecon. Sed, se la ŝtato definitive perdas sian teritorion, ĝi ĉesas ekzisti kiel tia, ĝi ne plu estas persono, subjekto de la internacia vivo.

Ankaŭ la nombro de la loĝantoj ne gravas, kvankam, pro la karaktero mem de la ŝtato, ĝi ne povas esti tute malgranda. Evidente, ŝtato ne povas konsisti el kelkaj dekoj da personoj, sed jes el kelkaj centoj.

La nacieco de la loĝantoj ne gravas por la koncepto de la ŝtato. Ekzistis ŝtatoj, kiam ankoraŭ ne ekzistis nacioj. Kaj ekzistas ankaŭ hodiaŭ multaj ŝtatoj, kies loĝantaro apartenas al diversaj nacioj. La ŝtato, kiu konsistas el nur unu nacio (eventuale kun malfortaj naciaj malplimultoj) estas nomata nacia ŝtato. Tiaj estas, ekzemple, Italio, UŜo, Svedio, Norvegio k.a. La ŝtatoj, kies loĝantoj apartenas al diversaj nacioj, estas plurnaciaj ŝtatoj. Tiaj estas, ekzemple, Jugoslavio, Sovjetunio, Ĉeĥoslovakio k.a. Fine, ekzistas nacioj, dispartigitaj inter pluraj ŝtatoj. Tia estis la stato de la pola nacio, kiu antaŭ la Unua Mondmilito estis dividita inter Rusio, Germanio kaj Aŭstrio-Hungario.

La tria elemento de la ŝtato estas organizo sendependa de alia ŝtato. Tiun organizon realigas la *ŝtata potenco*, nome tiu potenco, kiu regule kaj pli sukcese, ol kiu ajn alia potenco realigas siajn ordonojn sur difinita teritorio super la loĝantaro. Ni ne diris, ke ĝi realigas siajn ordonojn ĉiam kaj senescepte, sed nur regule kaj pli sukcese. En la ŝtato, nome, ekzistas ankaŭ aliaj potencoj (ekzemple eklezioj, diversaj organizaĵoj), kiuj realigas siajn ordonojn en certaj medioj. Povas kelkfoje okazi, ke tiuj ordonoj estas pli obeataj, ol la ordonoj de la ŝtata potenco. Tamen, regule la ŝtataj ordonoj estas pli fortaj, kaj la ordonoj de la aliaj potencoj devas kutime cedi.

La ŝtata potenco devas esti sendependa de alia ŝtato kaj ĝi devas esti kapabla regi laŭ la internacia juro. Estas vere granda demando kiom granda devas esti tiu sendependeco. Hodiaŭ, fakte, nur du aŭ maksimume tri ŝtatoj estas plene sendependaj. Ĉiuj aliaj dependas pli aŭ malpli de tiuj 2–3 grandaj ŝtatoj. Tamen, se la ŝtato konservas almenaŭ formale sian sendependecon, oni povas ĝin konsideri ŝtato.

Laŭ sia jura organizo kaj laŭ la formo de regado, la ŝtatoj tre diferencas inter si. La ĉefa diferenco, kiu havas apartan gravecon en la interŝtata vivo, estas tiu inter la unuecaj ŝtatoj kaj la kunmetitaj ŝtatoj. En la unuaj la ŝtata potenco estas pli aŭ malpli centralizita. Ili povas esti imperioj aŭ reĝlandoj, konstituciaj, elektaj aŭ absolutismaj monarkioj, respublikoj de diversaj tipoj. La aliaj konsistas el

pluraj ŝtatoj kun pli aŭ malpli fortaj ligoj inter si. Ankaŭ tiuj ĉi povas esti monarkioj aŭ respublikoj.

La unuecaj ŝtatoj estas subjektoj de internacia juro. Pere de siaj rajtigataj reprezentantoj ili eniras en la internaciajn rilatojn, ili estas portantoj de rajtoj kaj devoj. Ĉi tie la afero estas tre simpla tiurilate.

Alie prezentiĝas la demando ĉe la kunmetitaj ŝtatoj. Kelkfoje stariĝas la demando ĉu la kunmetita ŝtato kiel tia, en sia tuteco, estas subjekto de la interŝtata vivo, aŭ tiun rolon povas plenumi ankaŭ aŭ nur la ŝtatoj, el kiuj konsistas la kunmetita ŝtato. Estas, do, necese distingi la diversajn tipojn de kunmetitaj ŝtatoj, nome la personan union, la realan union, la konfederacion kaj la federacion.

a) *La persona unio* estas hazarda komunaĵo de du ŝtatoj, ligitaj nur per la sama reganto. Tia ŝtatkomunaĵo ekestas, kiam, pro heredorajto aŭ pro elekto, la sama persono fariĝas reganto de du aŭ pluraj apartaj ŝtatoj. Tiaj estis, ekzemple, la unioj inter Britio kaj Hanovero (1714–1837), inter Nederlando kaj Luksemburgo (1815–1890) k.a. Ĉiu el la ŝtatoj, ligitaj en persona unio, konservas sian sendependecon kaj estas memstara subjekto de la internacia juro.

b) *La reala unio* estas intencita komunaĵo de du aŭ pluraj ŝtatoj, ligitaj per la persono de la sama reganto. Diference de la persona unio, la reala unio estas firme ligita per la konstanteco de la persono de la monarko. Tiaj estis Svedio kaj Norvegio (1814–1905), Danlando kaj Islando (1918–1944), Aŭstrio kaj Hungario ĝis 1918 k.a. La ŝtatoj de la reala unio kutime estas reprezentitaj en la interŝtataj rilatoj kiel unu sola subjekto: ili havas komunajn diplomatajn reprezentantojn, faras komunajn internaciajn kontraktojn k.t.p.

c) *La konfederacio* estas komunaĵo de ŝtatoj, bazita sur interŝtata kontrakto. Tiaj estis USoNo inter 1778–1787, Svislando inter 1798–1815. La konfederacio ne estas unu ŝtato. Ne ekzistas unueca ŝtata teritorio, nek unueca ŝtataneco. En la internaciaj rilatoj ĉiu el la membroj de la konfederacio reprezentas sin mem, ĉiu el ili estas aparta subjekto. Tamen, por difinitaj aferoj, fiksataj en la konfederacia kontrakto, ankaŭ la konfederacio kiel tia povas esti subjekto kaj havi la rajton sendi kaj akcepti la diplomatajn reprezentantojn, eniri en kontraktajn rilatojn kun aliaj ŝtatoj k.t.p.

d) *La federacio* estas komunaĵo de pluraj unuoj, formita ne surbaze de interŝtata kontrakto, sed surbaze de ŝtatjura, konstitucia akto. Tiuj unuoj nomiĝas diversmaniere. La formo de federacio estas hodiaŭ tre disvastiĝinta en la tuta mondo. Pro ĝia graveco, ni dediĉos al ĝi apartan ĉapitron ⁽¹⁾.

(1) Vidu la ĉapitron IV de tiu ĉi libro.

Ekzistas ŝtatoj kunmetitaj, kiuj havas apartajn karakterizojn kaj tial ili estas neklasigeblaj laŭ la supraj kategorioj. Al tiuj antaŭ ĉio apartenas la Brita Komunaĵo de Popoloj. La unuopaj membroj de tiu komunaĵo akiris iom post iom ĉiujn atributojn de ŝtateco. Tiele, post la Unua Mondmilito la dominioj fariĝis membroj de la Ligo de Nacioj kaj komencis sendadi kaj akceptadi la diplomatajn reprezentantojn (Irlando en 1924, Kanado en 1926). Antaŭ la Dua Mondmilito ili estis jam tiom sendependaj, ke kelkaj el ili aparte deklaris la militon al Germanio. Hodiaŭ la membroj de la Brita Komunaĵo ordigas siajn reciprokajn rilatojn per interŝtataj kontraktoj, kiel tute sendependaj ŝtatoj, kvankam ili estas firme kunligitaj per komunaj interesoj.

ĈAPITRO II

INTERŜTATAJ RILATOJ KAJ INTERNACIA JURO

Inter la multaj problemoj, kiujn oni larĝe diskutadis en la jura scienco, signifan lokon okupis la demando kio estis la unua: la ŝtato aŭ la juro. Unuj argumentis, ke la ŝtato estas kreaĵo de juro, ke, do, ekzistis juro antaŭ ol ekzistis ŝtato. Aliaj pruvadis, ke juro ne estas imagebla sen ŝtato, ke, sekve, unue kreiĝis la ŝtato kaj poste la juro.

Ambaŭ starpunktoj ŝajnas al ni eraraj. Se juro ne estas imagebla sen ŝtato, ankaŭ ŝtato ne estas imagebla sen juro.

Ni jam vidis, ke unu el la esencaj elementoj de la ŝtato estas la ŝtata potenco. Tiu ŝtata potenco ordonas kaj realigas siajn ordonojn sur difinita teritorio super la personoj vivantaj sur ĝi. La menciitaj ordonoj – tute egale ĉu ili estas faritaj en skriba formo (leĝa juro) aŭ en formo de devigaj, pli aŭ malpli altruditaj kutimoj (kutima juro) – estas nenio alia ol juro. Ŝtata potenco, kiu ne ordonus aŭ kiu ne povus realigi siajn ordonojn, estus, vere, nenia ŝtata potenco kaj en tia okazo, ĉar mankus unu el la esencaj elementoj, oni tute ne povus paroli pri ŝtato.

Aliflanke, kondutreguloj neordonitaj aŭ almenaŭ nesankciitaj de la ŝtata potenco, ne povas esti konsiderataj kiel juraj reguloj. Ekzistas ankaŭ hodiaŭ multaj reguloj, eĉ tre gravaj reguloj, laŭ kiuj la homoj vivas kaj kondutas en diversaj cirkonstancoj, sed kiuj tamen ne estas juraj reguloj. Tiaj estas la preskriboj de la moralo, de religiaj komunajoj, de diversaj societoj kaj asocioj, de la modo, de ĝentileco, bontono k.t.p. La homoj kutime tre rigore obeas al tiuj ordonoj, kvankam ili ne estas juraj kaj kvankam ili ne havas juran sankcion. Oni obeas, ĉar, tute simple, aŭ oni akceptis ilin libervole, aŭ oni timas la socian sankcion (konfliktoj kun la medio, ridindeco, neebleco prosperadi materie aŭ spirite k.t.p.).

Tiaj konvenciaj kondutreguloj povas fariĝi juraj reguloj, se la ŝtata potenco siaflanke ordonas aŭ sankcias ilin. Povas ankaŭ okazi,

ke iu jura regulo ĉesas esti jura, ĉar la ŝtata potenco ne plu ordonas ĝin; tamen la homoj plue obeas ĝin kiel simplan konvencian kondut-regulon. Ne malofte la jura regulo estas kontraŭa al la morala, religia aŭ alia regulo. Ekzemple, pluraj juraj sistemoj malpermesas la t.n. sangan venĝon (persona venĝo laŭ la principo "kapo por kapo, dento por dento"), kiu en la koncernaj sociaj medioj estas konsiderata kiel tre morala.

Estas, do, necese klare distingi inter la juraj reguloj kaj ĉiuj aliaj kondutreguloj. La limo estas facile fiksebla, se oni konsideras, ke jura regulo povas esti nur tiu, kiu estas ordonita kaj sankciita aŭ nur sankciita de la ŝtata potenco. Ĉiuj aliaj reguloj apartenas al la aliaj kategorioj.

Se estas tiel hodiaŭ, des pli facile estas imagebla la fakto, ke jam antaŭ ol formiĝis la unuaj ŝtatoj, en la epoko de la primitiva socio, la homoj vivis laŭ certaj reguloj. Sed tiuj reguloj ne estis juraj. Tial ilia tuto ne povas esti konsiderata kiel juro kaj oni ne povas akcepti la starpunkton, ke ekzistis juro antaŭ la ŝtato.

Ŝtato kaj juro ekestis samtempe. Unu sen la alia ne estas ebla. Ne ekzistas ŝtato sen juro, nek juro sen ŝtato.

1) LA INTERŜTATAJ RILATOJ

Nu, se estus ekestinta nur unu ŝtato aŭ se hodiaŭ ekzistus nur unu ŝtato, tute ne stariĝus alia demando, nome tiu pri la internacia juro. Sed, kiel konate, multaj ŝtatoj formiĝis en diversaj partoj de la mondo kaj hodiaŭ la tuta terglobo estas teritorie dividita inter la diversaj ŝtatoj aŭ troviĝas sub apartaj juraj reĝimoj.

La ŝtato reguligas la vivon kaj la rilatojn de la homoj sur sia teritorio. Ekster tiu teritorio ĝia povo malaperas. Kaj tamen, ekde la momento, kiam pluraj ŝtatoj formiĝis, ili mem kaj iliaj civitanoj nepre devis veni en reciprokajn kontaktojn; inter ili ekestis certaj rilatoj. Tiujn rilatojn oni kutime nomas internaciaj rilatoj, kvankam, pro la kaŭzoj klarigitaj en la unua ĉapitro, estus pli korekte ilin nomi "interŝtataj rilatoj", ĉar, ja, temas pri la rilatoj inter la ŝtatoj (aŭ iliaj civitanoj) kaj ne inter la nacioj.

La internaciaj rilatoj ekestadis kaj evoluadis ĉie, kie ekzistis pluraj ŝtatoj kun almenaŭ iomaj kontaktoj kaj almenaŭ parta komuneco de kulturo. Diversaj historiaj dokumentoj pruvas, ke tiaj rilatoj ekzistis inter la antikvaj ŝtatoj Babilonio, Asirio, Egiptio kaj Ĥetio. Unuopaj aktoj montras, ke jam antaŭ proksimume 5.000 jaroj, en la epoko de la sumera kulturo, oni faradis interŝtatajn kontraktojn pri la limoj.

Inter la antikvaj grekaj ŝtatetoj-civitoj la rilatoj estis speciale viglaj. Le Grekoj evoluigis ne nur diversajn formojn de aliancoj –

religiaj-politikaj aŭ militaj-politikaj – kaj praktikis la instituciojn de senditoj kaj de veraj interŝtataj kongresoj, sed ankaŭ kreis la institucion de t.n. "prokseno", kies pozicio estas komparebla al tiu de la hodiaŭaj konsuloj. Ankaŭ la Grekoj ofte faradis interŝtatajn kontraktojn, kiuj estis verkitaj en tiom da lingvoj, kiom da partioj kun diferencaj lingvoj partoprenis en la kontrakto. Por solvado de la konfliktoj la grekaj ŝtatoj aplikadis arbitraciajn metodojn.

Simile evoluis la interŝtataj rilatoj de Romio kun la apudaj ŝtatoj en la epoko, kiam Romo estis ankoraŭ nur unu el la pluraj urboj de Lacio (*Latium*). Tiam ekestis aro da reguloj pri la interŝtataj rilatoj, precipe koncerne la proklamadon de milito, konkludadon de paco, sanktecon de la interŝtataj kontraktoj, netuŝeblecon de la senditoj. Poste, kiam Romio fariĝis granda potenco, ampleksanta preskaŭ la tutan tiam konatan mondon, ne plu estis ebleco por evoluigo de interŝtataj rilatoj.

En la mezepoko, pro la karaktero de la feŭda ŝtato, inter la regantaj rondoj de la unuopaj politikaj unuoj, estis oftaj la kontaktoj – amikaj kaj malamikaj. Tiele, sub la influo de la feŭda kavalireco, ekestis aro da reguloj pri la maniero, laŭ kiu devas esti farata la milito, pri la justa kaj maljusta militoj, pri la malpermeso batali en iuj tagoj k.t.p. Kelkfoje okazadis ankaŭ grandaj kongresoj por solvado de "interŝtataj" demandoj. Tiaj estis, ekzemple, la Kongreso de Luck en 1429 aŭ tiu de Arras en 1435. Pro la evoluo de la komerco kaj de la navigado en la fino de la mezepoko, formiĝis pluraj reguloj pri la internacia mara kaj komerca juroj. Ankaŭ la institucio de konsuloj ekĝermis en tiu epoko.

Tamen, la vera ekfloro de interŝtataj rilatoj apartenas al la moderna epoko. Grava dato en tiu evoluo estis la jaro 1648, kiam la Vestfalia Kongreso finigis la Tridekjaran Militon. La du universalismaj konceptoj – la Papismo kaj la Sankta Romia Imperio – ricevis tie definitivan baton. Eŭropo komencis prezenti bildon de aro da sendependaj kaj formale egalaj ŝtatoj. Sed pro la grandega progreso de la ekonomiaj fortoj, pro la ĉiam pli larĝaj teknikaj ebloj de komunikado, la diversaj partoj de la mondo rilatis ĉiam pli kaj pli vikle. La interdependeco de la ŝtatoj sentiĝis kaj sentiĝas de tago al tago ĉiam pli forte.

En tiaj kondiĉoj, kompreneble, devis amasiĝi la nombro de principoj kaj reguloj, kiuj ordigas la multobligintajn ĉiaspecajn – kaj komercajn, kaj ekonomiajn, kaj trafikajn, kaj kulturajn, kaj politikajn, kaj militajn – rilatojn en mondaj kadroj. Firmiĝis la institucio de ambasadoroj, detaliĝis la reguloj pri interŝtata rilatado kaj pri la diplomacia ceremoniaro, plue evoluis la mara (navigada) juro. Pro la multnombraj, teruraj militoj oni komencis postuli, unue, la

reguligon de la militaj aktivecoj, la protekton de la civila loĝantaro, pli homecan konduton rilate al la vunditoj kaj militkaptitoj k.t.p. Tiamaniere ekestis granda nombro da reguloj koncerne la militon. Poste, en la plej nova epoko, oni klopodis tute forigi la militon el interŝtataj rilatoj kaj krei komunajojn de ŝtatoj por protekti la pacon kaj garantii ĝin per kolektivaj metodoj. Fine, kreiĝis granda nombro da reguloj koncerne la trafikon per vojoj de maro, tero kaj aero, koncerne la sanon, la laboron, la radion, telefonon, telegrafon, la edukadon kaj kulturon, la solvodon de konfliktoj, la militkrimulojn k.t.p., k.t.p.

Ĉiuj ĉi multnombraj reguloj, fiksitaj en interŝtataj kontraktoj aŭ en la internacia praktiko formas la internacian publikan juron, kiun oni kutime nomas nur internacia juro.

2) LA INTERNACIA JURO

La franca internaciisto Marcel Moye difinis la internacian juron, tre mallonge, kiel aron da "rilatoj inter la ŝtatoj".

Tiu difino, kiel oni vidas, identigas la internacian juron kun la interŝtataj rilatoj. Ŝajnas al ni, ke tia koncepto pri internacia juro estas kaj tro formala kaj nekorekta kaj, tial, konfuziga.

Antaŭ ĉio: la interŝtataj rilatoj kiel tiaj ne estas juro. Ili nur povas esti reguligitaj de juraj principoj kaj reguloj, sed ne identas al ili.

Due: kvankam la pliparto de la interŝtataj rilatoj estas jure reguligitaj, tamen ekzistas ankaŭ tiaj rilatoj, kiuj ne estas reguligitaj de juraj ordonoj, sed nur de simplaj konvenciaj reguloj de internacia kurtuazo (ĝentileco).

Fine: la internacia juro, almenaŭ la nuntempa internacia juro, reguligas ne nur la rilatojn inter la ŝtatoj, sed, ĝis certa grado, ankaŭ inter aliaj organismoj.

Tial – memorigante, tamen, pri la kondiĉiteco kaj nesufiĉa precizeco de ĉiu ajn tro konciza difino – ni preferus diri, ke *la internacia juro estas sistemo de juraj principoj kaj reguloj, kiu ordigas la rilatojn inter la ŝtatoj kaj la aliaj rekonitaj subjektoj en la internacia komunaĵo.*

a) Kelkaj precizigoj

Tiu ĉi branĉo de juro estas *ĝenerale nomata* "internacia". Fakte, ĝi ne reguligas la rilatojn inter la nacioj, sed inter la ŝtatoj. Tial oni proponadis – kaj tiuj proponoj ŝajnas al ni multe pli konformaj al la fakta stato – la nomon "interŝtata" juro. Tamen, la nomo "internacia" jam tiel enradikiĝis en la jura scienco (ekzemple, france

droit international, itale *diritto internazionale*, ruse *международное право*, angle *international law* k.t.p.), ke estas preferinde ankaŭ en Esperanto konservi la saman nomon: internacia juro. Des pli, ke ankaŭ la nomo "interŝtata" ne estus tute konforma al la nuna realo.

La internacia juro estas *sistemo* de juraj principoj kaj reguloj. Ne temas, do, nur pri unuopaj principoj aŭ unuopaj reguloj, sed pri vera sistemo. Tio signifas, ke unu principo kaj unu regulo ligiĝas al la aliaj kaj formas kun ili, en tiu kunligiteco, sisteman tuton. Tial, eĉ se por iu konkreta rilato mankas aparta regulo, tamen tiu rilato estas jure reguligita, ĉar oni povas al ĝi apliki ĝeneralan principon aŭ analogan regulon.

La principoj kaj reguloj de internacia juro estas *juraj*. Tio estas tre grava, ĉar ekzistas ankaŭ aliaj reguloj, kiuj ne estas juraj, kiuj, do, ne havas devigan forton. Tiaj estas la simplaj kutimoj kaj la reguloj de ĝentileco, kiujn oni praktikas en la interŝtataj rilatoj kun la celo montri amikecajn sentojn aŭ respekton. Kelkaj kutimoj de la diplomatia ceremoniaro kaj kelkaj diplomataj privilegioj apartenas al tiu kategorio.

La klasika difino akcentadis, ke la internacia juro reguligas la rilatojn inter la *ŝtatoj*. Kvankam la ŝtato estas kaj restas la ĉefa portanto de rajtoj kaj devoj en la nuntempa internacia juro, tamen estas sendube, ke hodiaŭ, krom la ŝtatoj, ekzistas ankaŭ aliaj subjektoj, kies rilatoj estas reguligataj de la internacia juro. Ili tute certe ne ludas la saman rolon, kiel la ŝtatoj. Ili estas kreataj, vivtenataj kaj mortigataj de la ŝtatoj. Depende de la volo de la ŝtatoj, ilia nombro povas grandiĝi aŭ malgrandiĝi. Sed dum ili ekzistas, ili estas subjektoj de internacia juro kaj ili devas esti konsiderataj kiel tiaj. Ĉar, tamen, la graveco de ilia rolo jure dependas de la volo de la ŝtatoj, kiuj ilin kreas kaj rekonas, estas preferinde apartigi ankaŭ en la difino la ŝtatojn de tiuj aliaj organismoj, rekonitaj kiel subjektoj de la internacia komunaĵo fare de la ŝtatoj.

b) *Karakterizoj de internacia juro*

En la teorio oni multe diskutadis pri la demando, ĉu la internacia juro estas entute juro. Se, nome, juro estas sistemo de reguloj, ordonitaj de la ŝtata potenco, kiamaniere la internacia juro, kiu reguligas ĉefe la rilatojn inter la ŝtatoj, povas esti konsiderata kiel juro? Kie estas tiu superŝtato, kiu devige reguligas la rilatojn inter la ŝtatoj kaj kies ordonojn la ŝtatoj obeas? Kaj se tia superŝtato vere ekzistus, ĉu tio ne signifus, la neadon mem de la internacia juro, ĉar, ja, en tiu okazo fakte ekzistus nur unu ŝtato kaj ĝiaj ordonoj devus esti konsiderataj kiel sistemo de interna juro?

Tiajn kaj similajn demandojn starigadis kaj starigas la kontraŭ-

uloj de la jura karaktero de tio, kion ni nomas internacia juro. Laŭ ili ekzistas nur la interna juro, dum la internacia juro tute ne estas juro, sed aro da kondutreguloj, fiksitaj de la internacia moralo, de simplaj kutimoj, de internacia ĝentileco.

Aliaj teoriistoj, kiuj konsideras la internacian juron kiel veran juron, dividiĝas je du ĉefaj skoloj.

Unuj opinias, ke la internacia juro havas tiajn apartajn karakterizojn, ke vere temas pri tute aparta jura sistemo, nepre disiginda de la interna juro. Laŭ tiu *dualisma* (dueca) jura koncepto, ekzistas du sendependaj juraj sistemoj: tiu de la interna juro kaj tiu de la internacia. Inter ili ekzistas neniam rilatoj. La reguloj de la internacia juro ne validas interne de la ŝtatoj, kaj la interna juro ne validas en la interŝtataj rilatoj. Tial povas ekzisti kontraŭaĵoj inter la du juraj sistemoj.

La aliaj estas la adeptoj de la t.n. *monismo*, nome de la unueco de la tuta juro: kaj de la interna kaj de la internacia. Laŭ ili ekzistas nur unu unueca jura sistemo, kies reguloj aplikiĝas en diversaj sferoj kaj havas malsaman gravecon. Tiu ĉi skolo, kvankam inter ĝiaj aŭtoroj troviĝas diversaj, ofte tre nuancitaj, opinioj, estas dividebla je du ĉefaj subgrupoj. La unua konsideras, ke la reguloj de la interna juro troviĝas laŭ la graveco, super la reguloj de la internacia (precipe Hegel, prof. Zorn k.a.). La alia konsideras la internacian juron supera al la interna kaj postulas, ke la interna jura ordo adaptiĝu al la ordonoj de la internacia juro.

Estas interese rimarkigi, ke en la granda proceso kontraŭ la internaciaj krimuloj (Nürnberg), la akuzo apogis sin sur la koncepto pri supereco de la internacia juro, dum la defendo, pro kompreneblaj kaŭzoj, estis ĉefe bazita sur la koncepto pri la supereco de la interna jura ordo. Kiel konate, la unua koncepto venkis kaj la ĉefaj krimuloj ne povis eviti la punon, kvankam ili provis senkulpigi sin per la aserto, ke iliaj fiagoj ne estis konsiderataj kiel krimoj laŭ la interna jura sistemo de la nazia Germanio.

Kiel oni vidas, la menciitaj konceptoj estas ne nur interesaj el pure teoria vidpunkto, sed ili povas havi ankaŭ grandajn praktikajn konsekvencojn.

Laŭ nia opinio, la internacia juro estas sendube juro. Kiel ĉiu alia jura regulo, ankaŭ la reguloj de la internacia juro estas kreataj de la ŝtatoj, aŭ, pli precize, de la ŝtataj potencoj. Tio ĉi okazas en la kadroj de ilia kunlaborado kaj reciprokaj luktoj. Kelkfoje ĝi okazas en formo skriba (internaciaj kontraktoj), kelkfoje en formo de daŭra praktikado kun la konscio, ke tiamaniere oni kreas juran regulon (juraj kutimoj). En ĉiu okazo temas ĉiam pri reguloj, kreataj de la ŝtatoj por reguligi la interŝtatajn rilatojn. Unufoje kreitaj, unufoje

akceptitaj kiel juraj reguloj, ili restas validaj, eĉ se al unuopa ŝtato ili ne plu konvenas. La malobeo al tia regulo estas kontraŭjura, kaj la hodiaŭa internacia juro jam posedas metodojn por devige respektigi siajn ordonojn. Sed eĉ se iu ordono restas neobeita (afero kiu ne malofte okazas ankaŭ en la interna jura ordo), ĝi tamen pro tio ne ĉesas esti jura, kaj la malobeo ne estas pro tio malpli kontraŭjura ago.

Por teorie komprenigi la ekziston de la internacia juro ne estas, do, necese konstrui superŝtatojn! Eĉ pli, tia superŝtato, vere, detruus la internacian juron en ĝia hodiaŭa formo. La ekzisto de la internacia juro estas, male, klarigebla nur per la kunekzisto de pluraj ŝtatoj, kiuj – pro la ĉiam pli granda interdependeco – estas devigataj akcepti certajn principojn kaj regulojn, per kiuj estas ordigataj iliaj rilatoj sur ĉiuj kampoj de la interŝtata vivo.

Ne gravas la kaŭzoj, pro kiuj la unuopaj ŝtatoj akceptas tiujn regulojn. Kelkfoje tio okazas pro la sincera deziro al kunlaboro, alian fojon pro demagogiaj kaŭzoj, trian fojon pro malforto. Povas eĉ okazi, ke ne ĉiuj ŝtatoj partoprenas en la kreado de jura regulo. Ekzemple, ĉiuj novaj ŝtatoj devas tute simple akcepti la ekzistantan internacian juron; ĉiuj novaj membroj de iu internacia (interŝtata) organizaĵo devas akcepti la regulojn, laŭ kiuj ĝi estas organizita; ofte iuj ŝtatoj, precipe la malpli grandaj, ne partoprenas per sia praktiko al kreado de la regulo de la t.n. kutima juro, kaj tamen tiu regulo validos ankaŭ por ili. Oni, do, povas diri, ke la tuto de la ŝtatoj aŭ, kelkfoje, la tuto de nur tiuj ŝtatoj, kiuj en iu historia epoko estas la plej gravaj, kreas la internacian juron, kiu estas devige aplikata per metodoj de individua aŭ kolektiva premo.

La internacia publika juro havas, do, jenajn apartajn karakterizojn:

- 1) Ĝi ne estas kreata de unu ŝtata potenco, sed de pluraj.
- 2) Ĝi reguligas la rilatojn inter la ŝtatoj kaj la aliaj rekonitaj subjektoj de la internacia komunaĵo, kaj ne la rilatojn inter la diversaj fizikaj aŭ juraj personoj interne de la ŝtatoj aŭ en la internaciaj kadroj.
- 3) Pro la diverseco de la internaj juraj kaj politikaj sistemoj, la internacia juro, kreata de pluraj ŝtatoj, ne povas esti tiel monolita (unueca), kiel la interna juro de difinita ŝtato.
- 4) En la internacia juro la deviga obeigo al juraj reguloj ne estas certigata de ia unueca ŝtata potenco, sed per individuaj aŭ kolektivaj rimedoj de la interesitaj ŝtatoj aŭ nur de unu tia ŝtato.

c) *Fontoj de internacia juro*

En la jura scienco estas nomata "jura fonto": aŭ tiu forto, tiu plej profunda radiko, el kiu eliras ĉiu juro (jura fonto en materiala senco), aŭ tiu formo, en kiu manifestiĝas la juraj principoj kaj reguloj (jura fonto en formala senco).

Laŭ nia koncepto, la fonto de la internacia juro *en materiala senco* de la vorto estas la sama, kiel tiu de la interna juro, nome, en la lasta linio, la interesoj de tiuj grupoj aŭ sociaj tavoloj, kiuj efektive tenas la ŝtatan potencon en siaj manoj. Tio, kompreneble, ne signifas, ke ekskluzive la absolutaj menciitaj interesoj difinas la karakteron de iu jura sistemo. Male, pluraj aliaj elementoj konkurence kontribuas al fikso de iu juro. Inter ili, nur kiel ekzemploj, estas menciindaj: la politika matureco kaj la organiziteco de la regataj amasoj; la moroj, kutimoj kaj tradicioj; la eblecoj de ribeloj kaj revolucioj; la faktaj rimedoj de perforto (polico, armeo), pri kiuj disponas la ŝtata potenco; la politika edukiteco, klarvido kaj saĝo de la regantaj rondoj k.t.p. Ĉio ĉi dependas de la konkreta situacio. Ĉio ĉi varias de epoko al epoko, de unu socia medio al la alia. Prenante en konsideron ĉiujn ĉi kaj ankaŭ aliajn elementojn, ni, tamen, ĉiam trovos kiel la plej profundan materialan fonton de la juro la interesojn de la grupoj efektive tenantaj en siaj manoj la ŝtatan potencon.

La fontoj de la internacia juro *en formala senco* de la vorto estas la internacia kontrakto, la internacia jura kutimo kaj la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj.

La internacia kontrakto estas konsenta esprimo de volo de du aŭ pluraj ŝtatoj aŭ de aliaj subjektoj de la internacia komunajo pri kiu ajn afero. La internacia kontrakto estas kutime farata en skriba formo, sed principe ĝi povas esti farata ankaŭ nur buŝe. Ĝi povas esti entenita en unusola dokumento, sed ĝi povas ekesti ankaŭ per interŝanĝo de leteroj aŭ notoj.

La internacian kontrakton rajtas subskribi nur la oficialaj reprezentantoj de la ŝtatoj aŭ de aliaj subjektoj. Kelkfoje ĝi validas ekde la momento de la subskribo, sed kelkfoje estas necesa la ratifo por ĝin validigi. Tio dependas de la karaktero mem de la kontrakto kaj de la konstituciaj preskriboj de la kontraktantaj partioj.

La rilatoj kiujn ordigas la internacia kontrakto, estas plej diversaj. Oni povas diri, ke ili hodiaŭ pritraktas ĉiujn eblajn aferojn: de la ondlongoj de radio-stacioj ĝis la konservo de la paco, de ĉelima trafiko ĝis grandaj politikaj aliancoj.

Se la kontrakto estas farita nur inter du aŭ tri ŝtatoj, ĝi nomiĝas duflanka, triflanka, aŭ dupartia, tripartia. Se ĝi estas kontraktita inter pluraj ŝtatoj, ĝi nomiĝas plurflanka, plurpartia, aŭ kolektiva

kontrakto. Por la internacia juro estas precipe gravaj la kolektivaj kontraktoj (ekz. la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj), ĉar ili kreas novan juron inter multaj ŝtatoj, sur larĝaj teritorioj.

La internacia kontrakto validas nur por la partioj, kiuj ĝin faris. Tamen, ofte okazas, ke iuj principoj aŭ reguloj de internacia kontrakto eniras en la juran kutimon kaj en tiu okazo ili fariĝas devigaj ankaŭ por la aliaj ŝtatoj.

La internacia kontrakto havas ankaŭ aliajn nomojn: interkonsento, konvencio, traktato, pakto ⁽¹⁾. Kutime la kontrakto ricevas la nomon laŭ la materialo, kiun ĝi pritraktas. Ekzemple la packontraktoj estas kutime nomataj "traktatoj". Iliaj aldonaj kontraktoj ofte nomiĝas "protokoloj". La prilimaj kontraktoj kelkfoje havas la nomon „interkonsento", dum la ekonomiaj, trafikaj, komercaj ofte nomiĝas „konvencioj". Por la jura karaktero de la kontrakto ĝia nomo havas nenian gravecon. Ĉiu konsenta esprimo de volo de du aŭ pluraj partioj, eĉ se tiu volesprimo portas nenian nomon, estas deviga por la partioj, kreas juron inter ili.

La alia grava fonto de la internacia juro estas *la jura kutimo*. Temas pri longdaŭra praktikado de iu regulo, sed kun la konscio, ke oni praktikas ĝin kiel juran regulon. La kutimo per si mem, eĉ se ĝi estas praktikata tre longe, ne estas juro. Sed se oni konsideras ĝin kiel jure devigan, nome se la konduto laŭ tiu regulo estas konsiderata ne kiel libervola, sed kiel deviga, aŭ rajtiga, tiam temas pri jura kutimo.

La jura kutimo estas pli malnova, ol la internacia kontrakto. En certa senco ĝi eĉ estas pli grava. La fundamenta principo de la internacia juro "*pacta sunt servanda*" (oni devas plenumi la kontraktojn) estas kreita de la kutima juro. Same tiel, granda parto de reguloj pri la maniero, laŭ kiu oni faras la kontraktojn, pri la necesaj elementoj de valida kontrakto k.t.p. apartenas al la jura kutimo.

En la praktiko estas kelkfoje tre malfacile distingi inter la simpla kutimo kaj la jura kutimo. Precipe malfacile estas konstati la juran konscion, nome la fakton, ke iun kutimon oni plenumas kun la konscio, ke temas pri jura kutimo. Por konstati la juran kutimon oni, do, utiligas diversajn faktojn, ekz. deklarojn, diplomatajn notojn, arbitraciajn verdiktojn, opiniojn de famaj juristoj internaciistoj.

Fine, la tria formala fonto de la internacia juro estas la *ĝeneralaj juraj principoj*, rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj. Ne temas ĉi tie pri tiuj principoj kaj reguloj, kiuj formiĝis en la internacia praktiko kiel jura kutimo. Temas pri aliaj principoj, kiuj estas jura posedaĵo

(1) Pakto: speciale grava kontrakto, ekz. Pakto de la Ligo de Nacioj, Triopa Pakto k.t.p.

de la tuta civilizita mondo, sed kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povis esti praktikataj en la internaciaj rilatoj kaj tiel ne povis fariĝi jura kutimo. Tiuj principoj estas ĝeneralaj, larĝaj, sendube rekonitaj de la civilizitaj nacioj.

Ekzemple, neniam en la historio de la civilizita mondo okazis, ke grupo da personoj, eluzante la ŝtatan potencon, ekstermis per plej brutaj metodoj (pendumoj, gaskameroj) milionojn da senkulpaj estuloj nur tial, ĉar ili apartenis al alia raso aŭ nacio. Sekve, la ĝenerala jura principo, akceptita de la tuta civilizita mondo, ke tia amasa mortigado de la homoj estas krimo, ne havis okazon praktike aplikiĝi. Tial, se ekzistus nur la du unue menciitaj fontoj, tiaj superkrimoj devus resti nepunitaj surbaze de alia jura principo, ke, nome, neniu povas esti punita pro ago, kiu antaŭe ne estis antaŭvidita kiel krimo. Sed la tria fonto – la ĝeneralaj juraj principoj – entenas sendube la ideon pri krimo de tiaj teruraj agoj.

La tri menciitaj fontoj havas la saman juran valoron. Tial, por la valido kaj forto de iu jura regulo, tute ne gravas ĉu ĝi apartenas al kontrakta juro, al la jura kutimo aŭ al la ĝeneralaj principoj. En okazo de konflikto (malsameco de reguloj), la pli nova nuligas la pli malnovan, dum la speciala superas la ĝeneralan. Ankaŭ tiu regulo apartenas al la jura kutimo.

d) *Subjektoj de internacia juro*

En la internacia juro estas subjekto ĉiu portanto de rajtoj kaj devoj.

Estas jam menciite, ke la klasika teorio konsideris kiel subjektojn nur la ŝtatojn. La itala skolo de la mezo de la XIX j. c. postulis, ke la nacioj estu konsiderataj kiel subjektoj. Kelkaj teoriistoj provis pruvi, ke ankaŭ la unuopuloj en iuj okazoj estas subjektoj de la internacia juro. Ŝajnas, ke la evolutendenco favoras tiun ideon, sed por la momento oni ne povas diri, ke unuopaj personoj estas subjektoj de la internacia juro.

Restas, do, la ŝtatoj kiel la ĉefaj subjektoj. Krom ili, ekzistas hodiaŭ pluraj organismoj, kiuj havas karakteron de subjektoj en la internacia juro. Inter tiuj oni devas antaŭ ĉio menci la organizaĵon de Unuiĝintaj Nacioj, kiu, interalie, rajtas eĉ fari militon. Ankaŭ aliaj gravaj interŝtataj organizaĵoj posedas kelkajn elementojn de internacia persono (subjekto). Ekzemple, la Internacia Organizaĵo de Laboro havas "legacion" en la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj. Kompreneble, temas ĉi tie nur pri tendencoj, kiuj ĵus ekĝermis. La plua evoluo montros, ĉu diversaj interŝtataj aŭ eble eĉ internaciaj organizaĵoj ricevos karakteron de subjektoj en la internacia vivo.

Plia subjekto de la internacia juro estas la papo. Lia pozicio kiel

ĉefo de la katolika eklezio estas alia, ol lia pozicio kiel suvereno de la Papa Ŝtato. Tiu ŝtato ekzistis kiel vera ŝtato ĝis la j. 1870. Ĝi estas tia ankaŭ depost la j. 1929, kvankam multaj pro la malgrandeco de la Vatikana Urbo neas al ĝi la karakteron de ŝtato. Sed la pliparto de la internaciaj kontraktoj inter la papo kaj la diversaj ŝtatoj rilatas ne al bezonoj de lia ŝtato, sed al rilatoj de la katolika eklezio. La papo, do, sendas kaj akceptas la diplomatajn reprezentantojn, faras diversajn kontraktojn k.t.p. ne nur kiel ĉefo de unu ŝtateto, sed multe pli kiel ĉefo de la katolika eklezio. Tial li mem, sendepende de la fakto, ke ankaŭ la Vatikana Urbo estas subjekto, devas esti ankoraŭ konsiderata kiel subjekto de la internacia juro.

Fine, kiel subjekto de internacia juro estas hodiaŭ konsiderataj la ribelintoj, kiujn la aliaj ŝtatoj rekonis kiel militantan partion.

ĈAPITRO III

PRI LA KONCEPTO DE DIPLOMATIO

Parolante pri la ŝtato, oni diras, ke ĝi sendas reprezentantojn al kongreso, ke ĝi partoprenas konferencon, subskribas aŭ aliĝas al iu kontrakto, proklamas militon, faras pacon k.t.p. Ni mem parolis pri la ŝtato kiel pri subjekto aŭ kiel pri persono de la internacia vivo.

Tia personigo de la ŝtato estas, kompreneble, nur fikcio, sed fikcio nepre necesa por komprenigi la realaĵon. La ŝtato ne havas buŝon por paroli, nek manojn por subskribi. Por ĝi tion faras ĝiaj organoj.

La organoj de la eksteraj rilatoj de la ŝtato estas la diplomatoj. Kaj la tuta branĉo de la ŝtata aktiveco, kiu koncernas la rilatojn kun aliaj ŝtatoj kaj kun la internaciaj organismoj, estas diplomatio.

Sed, kion entenas precize tiu koncepto?

Ankaŭ tiurilate ekzistas multaj opinioj kaj oni difinas ĝin diversmaniere.

Unuj opinias ĝin arto, la aliaj konsideras ĝin scienco, la triaj diras, ke ĝi estas parto de politiko.

Tiele, la konata fakulo kaj profesoro de internacia juro, Pradier Fodéré, opinias la diplomation arto. En sia difino li diras, ke la diplomatio estas "arto reprezenti sian registaron kaj la interesojn de sia lando ĉe la aliaj registaroj, en la aliaj landoj". Laŭ li, la diplomatio estas, plue, "arto direkti la internaciajn aferojn kaj, surbaze de la ricevitaj instrukcioj, gvidadi aŭ observadi la internaciajn traktadojn".

Laŭ Klüber, la diplomatio, same tiel, estas arto. Ĝi estas "arto de bona gvidado de la aferoj inter la ŝtatoj". La vorto "aferoj" en tiu ĉi difino ampleksas ĉiujn eblajn rilatojn inter la ŝtatoj.

Aliaj aŭtoroj klasigas la diplomation kiel sciencon. Precipe forte estas akcentita tiu koncepto en la difino de Charles Calvo, unu el la fondintoj de la Instituto de Internacia Juro. Li diras: "La diplomatio estas scienco pri li rilatoj, kiuj ekestas inter diversaj ŝtatoj surbaze de iliaj reciprokaj interesoj, de la internacia juro kaj de

la preskriboj de la kontraktoj kaj konvencioj". Bona flanko de tiu difino estas, ke ĝi mencias la internacian juron, kvankam ne estas klare kial la aŭtoro aparte mencias la kontraktojn kaj la konvenciojn. Tiuj ĉi, ja, estas jam entenitaj en la koncepto de internacia juro!

Georg-Friedrich de Martens distingas la diplomation en la larĝa senco de la vorto de la diplomatio en la mallarĝa senco. La unua estas, laŭ li, "scienco pri la eksteraj rilatoj aŭ pri la eksterlandaj aferoj de la ŝtato". La dua estas "scienco aŭ arto traktadi".

Ankaŭ la fama angla diplomato Ernest Satow opinias la diplomation kaj scienco kaj arto.

La sovjetaj aŭtoroj dediĉas apartan atenton al la celoj de la diplomatio. A. Trojanovskij diras, ekzemple, ke "la diplomatio estas la rimedo de la eksterlanda politiko"; ke la taskoj de la diplomatio estas "gvidi internaciajn traktadojn, faradi internaciajn kontraktojn kaj studadi la internaciajn rilatojn". Por alia sovjeta aŭtoro, D. B. Levin, la diplomatio estas tiu formo de la ŝtata aktiveco, kiu realigas la eksterlandajn politikajn celojn kaj interesojn de la ŝtato. En la verko "Diplomatiĉeskij Slovar" (Diplomatia Vortaro) oni parolas pri diplomatio kiel pri „teknika rimedo por realigo de la ekstera politiko" kaj oni akcentas, ke ĝi estas "armilo de la ekstera politiko".

Kiel oni vidas, oni difinas la diplomation diversmaniere. Tiu ĉi diverseco ne estas miriga, se oni konsideras, ke kaj en la scienco kaj en la ĉiutaga praktiko oni komprenas sub la vorto „diplomatio" diversajn aferojn.

La diplomatio estas sendube arto, se oni rigardas nur tiun ĝian flankon, kiu konsistas el lerteco gvidadi kaj efektivigadi la celojn de la eksterlanda politiko de la ŝtato. Sed la diplomatio estas, same tiel sendube, scienco, se oni esploras la regulojn, la leĝojn, kiuj ebligas la korektan plenumadon de la diplomatia aktiveco. Sekve oni povas diri, ke la diplomatio estas aŭ scienco aŭ arto, aŭ kaj scienco kaj arto. Dependas de la starpunkto, kiun oni havas koncerne la diplomation.

Sub la vorto diplomatio oni ofte komprenas ankaŭ la tutan aparaton, kiu troviĝas en la servo de la eksterlanda politiko de iu ŝtato. En Esperanto estus pli bone uzi por tiu senco la esprimon "diplomataro". Iuj enkalkulas ĉi tien ne nur la ministerion pri eksterlandaj aferoj kaj la diplomatajn reprezentantojn en vera senco de la vorto, sed ankaŭ la ĉefon de la ŝtato kiel superan organon en la rilato al aliaj ŝtatoj, unuflanke, kaj la tutan oficistaron, laborantan en la eksterlandaj legacioj, aliflanke. En tiu senco oni ofte diras, ke tiu aŭ alia persono estas en "diplomatia servo". Fakte, nur parto de

la legacia personaro apartenas al vera diplomataro, dum la ĉefo de la ŝtato kutime ne estas konsiderata kiel "diplomato".

La diplomatio, do, estas, laŭ nia opinio, kaj scienco kaj arto pri la direktado de la aferoj de la ŝtato en ĝiaj rilatoj kun la aliaj ŝtatoj, pere de apartaj organoj kaj surbaze de la ekzistantaj principoj kaj reguloj de la internacia juro.

En tiu difino estas akcentitaj tri gravaj elementoj.

a) Antaŭ ĉio temas pri la direktado kaj plenumado de la *eksterlandaj politikaj celoj de la ŝtato*. Ĉar la ŝtata potenco troviĝas tutece koncentrigita en la sama pli aŭ malpli larĝa rondo, tial la eksterlanda kaj la enlanda politikoj ne povas esence multe diferenci. La eventualaj diferencoj – se tiaj montriĝas en la praktiko – estas ĉiam pli ŝajnaj ol realaj. Tial, por bone kompreni la diplomation de iu ŝtato oni devas pli atenti al la tuta karaktero de tiu ŝtato, precipe al ĝia interna politiko, ol al la oficialaj deklaroj de la diplomatoj.

b) La diplomatia aktiveco realiĝas pere de *apartaj organoj*. Tiuj organoj estis en diversaj epokoj diversmaniere nomataj. De la interna strukturo de la ŝtato dependas la respondo al la demando: kiu estas rajtigita je supera reprezentado de la ŝtato en ĝiaj rilatoj kun la aliaj ŝtatoj. En la antikva epoko tiun rajton havis la faraonoj, la reĝoj kaj imperiestroj, la popolkunvenoj, la senato k.t.p. Hodiaŭ la superaj organoj estas la reĝoj kaj la prezidantoj de respublikoj, aŭ kolektivaj organoj, kia estas, ekzemple, la prezidio (aparta organo trovebla nur en kelkaj ŝtatoj) de la Popola Asambleo de Jugoslavio.

Formale pri la eksterlandaj aferoj *de la ŝtato* hodiaŭ okupiĝas la ministro pri la eksterlandaj aferoj. La interŝtataj rilatoj mem estas realigitaj pere de apartaj, provizoraj aŭ konstantaj, senditoj. En diversaj epokoj ili nomiĝis diversmaniere: legatoj, traktantoj, senditoj, eksterordaj senditoj, ambasadoroj, ministroj k.t.p.

Grandan signifon havas hodiaŭ la internaciaj konferencoj, kie multaj ŝtatoj estas reprezentitaj kaj kie oni provas solvi gravajn demandojn de la internacia vivo.

c) La diplomatia agado devas disvolviĝi *surbaze de la internacia juro*. Tio signifas, ke la diplomatio devas atenti al la principoj kaj reguloj de la internacia juro. Sed tio neniel signifas, ke la diplomatio ne partoprenas siaflanke en la evoluigo de la internacia juro. Male, ĝi estas unu el la ĉefaj antaŭenigantoj de tiu jura branĉo. Ĉiu nova kontrakto, ĉiu plia internacia konferenco alportas novajn erojn al la jam ekzistanta jura materialo. Tiamaniere, kvankam la diplomatio aktivis surbaze de la ekzistantaj juraj reguloj, tamen ĝi samtempe spronas la pluan evoluon de la internacia juro.

La vorto mem "diplomatia" devenas de la greka vorto "*diploma*". Tio estis akto, skribita sur du metalaj platoj, kiu enhavis la instrukciojn kaj estis transdonata al la ĉefo de la senditaro en antikva Grekio. La vortoj "diplomato, diplomatia, diplomata" k.t.p. nur tre malfrue komencis esti uzataj en la nuntempa senco. En la literaturo el la komenco de la XVIII j.c. la diplomaton oni plej ofte nomis "negociateur" (traktanto). Meze de la XVIII j.c. aperis en Vieno (Aŭstrio) la nomo "diplomata korpo" por signi ĉiujn personojn akredititajn ĉe la viena kortumo.

ĈAPITRO IV

LA FEDERALISMA PRINCIPO

Laŭ la teorio, kiun, inter la aliaj, subtenis la fama Von Klausewitz kaj kiun, en iom ŝanĝita formo, akceptis ankaŭ Lenjin, la paco kaj la milito estas nur stadioj de unu sama historia evoluo, stadioj, kiuj sekvas kaj kompletigas unu la alian.

Fakte, se oni ĵetas nur supraĵan rigardon al la historiaj eventoj de la lastaj dek jarcentoj, oni facile povos konstati, ke tiu evoluo – en la plej larĝaj linioj – konsekvence iradis laŭ la sama vojo: tiu de homaro, serĉanta sian unuecon.

En la unua periodo de feŭdismo la grandaj sinjoroj estis absolutaj mastroj de siaj bienoj. Neniu rajtis enmiksiĝi en iliajn aferojn. Ne ekzistis efektiva potenco super ili. Kun la tempo tiuj malgrandaj "ŝtatoj" – kutime kiel rezulto de militoj – unuiĝis kaj formis provincojn kaj duklandojn. Fine – plej ofte denove rezulte de militoj – kreiĝis la grandaj naciaj ŝtatoj. Tiu ĉi longa evoluprocezo finiĝis nur en la dua duono de la XIX j.c. kun la formiĝo de Germanio kaj Italio.

Dum jarcentoj tiu ĉi marŝado al unueco estis kondiĉita de la evoluo kaj senĉesa kreskado de la materiaj fortoj de la socio. Ĝi realiĝadis per sangaj bataloj, en kiuj la granda aliancano de la historia venkinto ĉiam estis la ideo pri pli larĝa unuiĝo. Preskaŭ konforme al darvinisma penso, la pli grandaj, la pli potencaj ŝtatoj englutadis aŭ subigadis la pli malfortajn. Kaj ĉio ĉi okazadis ĉiam kontraŭjure, kontraŭ la rekonitaj rajtoj kaj privilegioj. Evidente, kiu ajn feŭdulo de kiu ajn lando havis neniam rajtojn sur la bienoj de la aliaj feŭduloj de la sama lando. Kaj iu Ludoviko la Dekunua en Francio havis neniam rajtojn, ekzemple, je la landoj de la dukoj de Burgonjo (Bourgogne). La kreiĝo, do, de Francio, same kiel la kreiĝo de ĉiu ajn alia nacia ŝtato, estis "kontraŭjura" el la vidpunkto de la antaŭa jura ordo. Kaj tamen tiuj ŝtatoj, malgraŭ kaj spite al "kontraŭjureco", formiĝis. Tio ebligis multflankan cirkuladon de per-

sonoj, varoj kaj ideoj sur vastaj teritorioj. Tio, siavice, kontribuis al larĝigo de la horizontoj, al plifirmigo de la sento pri aparteno al multe pli grandaj komunajoj.

Koncerne tiun ĉi saman aspekton de la evoluprocezo, oni povas rimarki similan fenomenon ankaŭ en UŜo. Tie, kiel prave mencias E. Privat en sia verko "Tri Federalismaj Spertoj" ⁽¹⁾, ankoraŭ en la okdekaj jaroj de la XVIII j.c. New-York amasigadis siajn trupojn kontraŭ najbara ŝtato kaj starigadis doganajn barierojn kontraŭ la ligno de Connecticut kaj kontraŭ la butero de New-Jersey, dum Boston bojkotadis la cerealojn de Rhode-Island, kaj unu ŝtato rifuzadis akceptadi la monon de la alia. Tamen kreiĝis potenca komuna ŝtato, kies formiĝo finfine utiliĝis al ĉiuj loĝantoj. Por firmigi ĝin estis necesa eĉ sanga milito, en kiu la Nordo venkis la Sudon.

Sur ĉiuj kvin kontinentoj la homoj hodiaŭ vivas en pli aŭ malpli grandaj ŝtatoj, ĉu unuecaj ĉu kunmetitaj, kaj ĝuas iajn avantaĝojn de tiu fakto: ili estas apartenantoj de potenca politika unuiĝo, de granda komunajo, sur vasta teritorio, sen doganoj, sen vizoj, sen kiu ajn malhelpo al trafiko.

La supraj konsideroj, kompreneble, ne havas la celon pravigi la perforton aŭ la malrespekton de la juro en la nuna interŝtata vivo. Ili nur celas montri la ĝeneralan, kelkfoje iom zigzagan, evolulinion de la homaro al sia unueco. Ili samtempe starigas la problemon de la estonteco en funkcio de la pasinteco: kiamaniere, nome, atingi pluan unuecigon de la homaro – afero, kiu nepre devas okazi – sen uzo de perforto kontraŭ la akiritaj pozicioj kaj rajtoj.

Hodiaŭ ne plu temas pri formiĝo de naciaj ŝtatoj. La vera problemo de la nuntempo kaj de la proksima estonteco estas la kreo de novaj grandaj imperioj de la morgaŭo. Kaj morgaŭ ĝi estos: la fina kaj definitiva unuiĝo de la tuta homaro.

Ke tia estas la esenco mem de nia aktuala realaĵo kaj de la ĝermoj, kiujn ĝi entenas por la estonteco, tio – ŝajnas al ni – devus esti pli ol klara al ĉiu iom politike pensanta homo. Se la centrifugaj fortoj en la ekonomio ne povas esti venkitaj de la centripetaj fortoj en la politiko – aserto kiun ni starigis parolante pri la frua feŭdismo –, ne pli facile la centripetaj fortoj en la ekonomio povas esti venkitaj de la centrifugaj en la politiko.

Estas sendube, ke la evoluintaj kaj ŝvelintaj materiaj rimedoj, pri kiuj disponas hodiaŭ la mondo, multege transpasas la limojn eĉ de la plej grandaj ŝtatoj. La ekonomia interdependeco de la diversaj partoj de la terglobo estas evidenta. Por ĝin konstati, oni ne devas esti granda ekonomiisto. Ĉiu simpla civitano, precipe en Eŭropo,

(1) Edmond Privat: *Trois Expériences Fédéralistes*, Neuchatel, 1941.

povas ĝin facile rimarki, se li, ekzemple, kontrolas la konsiston de sia matenmanĝo: li konstatos, ke pluraj landoj, eĉ tre malproksimaj landoj, devis kontribui siajn produktojn, en formo de krudmaterialoj aŭ en formo de maŝinoj, por ke lia matenmanĝo povu esti taŭge aranĝita!

La fundamenta antagonismo de la hodiaŭo estas la kontraŭaĵo inter la bezonoj pri unueco, diktataj de la ekonomiaj fortoj, kaj la fakta politika disrompiteco, altrudita de la pasinteco. Tiu antagonismo, kiel ĉiam en la historio, devas esti kaj tute certe estos solvita favore al postuloj de la ekonomio. La nuna socio havos la saman sorton, kiun havis la malfrua feŭdismo: kreigos novaj, ankoraŭ multe pli ampleksaj politikaj unuoj.

La granda demando estas, ĉu tio okazos perforte, aŭ la homoj scios – komprenante kaj obeante la postulojn de la historio – pace kaj libervole krei novajn formojn de kunvivado.

La unuan vojon, tiun de perforto, de milito, ni malakceptas kaj kondamnas. Ĝuste tial ni devas akcepti la duan. Konsiderante la fakton, ke la nacioj ne nur ekzistas, sed ankaŭ, ke la naciaj sentoj estas ankoraŭ tre fortaj; ke, do, la novaj grandaj ŝtatoj nepre devos konsisti el pluraj nacioj, la sola ebla solvo estas fondi ilin surbaze de la federalisma principo.

Sed, kio fakte estas la federalisma principo?

1) *Karakterizoj de federacia ŝtato*

Ĉiu federacia ŝtato apartenas al la tipo de kunmetitaj ŝtatoj. Ĝi devas konsisti el minimume du pli aŭ malpli sendependaj ŝtatoj. Tiujn ŝtatojn, el kiuj konsistas la federacio, kutime oni nomas federalaj unuoj. La unuiĝo mem de tiuj ŝtatoj nomiĝas federacio.

La federacia ŝtata organizo ne estas ĉie, en ĉiuj kondiĉoj, en ĉiuj historiaj epokoj, la sama. Ekzistas kelkaj komunaj trajtoj, kiuj estas troveblaj en ĉiu federacie organizita ŝtato. Sed ekzistas ankaŭ aliaj trajtoj, kiujn havas nur kelkaj aŭ nur unu federacia ŝtato. Kelkfoje tiuj diferencoj ne estas esencaj kaj ili ne influas la koncepton de la federacio mem. Sed kelkfoje la apartaj karakterizoj estas tiaj, ke povas fariĝi demando ĉu entute ankoraŭ temas pri federacio: ili povas transformi la federacion aŭ en unuecan ŝtaton, aŭ disrompi ĝin en konfederacion.

La esencaj karakterizoj, kiujn nepre devas posedi ĉiu federacia ŝtato, estas la jenaj:

1) El jura vidpunkto la federacia ŝtato estas *kunmetita ne nur el unuopaj civitanoj, sed ankaŭ el certa nombro da apartaj federalaj unuoj*. Tiuj federalaj unuoj nomiĝas diversmaniere. En kelkaj landoj ili havas la nomon "ŝtatoj". En aliaj ili estas "respublikoj", aŭ

"popolaj respublikoj", aŭ "kantonoj" aŭ simile. La nomo ne multe gravas. La ĉefa afero estas, ke la federalaj unuoj devas havi almenaŭ iajn karakterizojn de ŝtato. Ilia teritorio devas esti difinita. Ili devas havi certan nombron da ŝtatanoj. Precipe grave estas, ke la federala unuo posedu, almenaŭ parte, leĝdonan, plenuman kaj juĝan funkciojn.

Pro la fakto, ke la federacia ŝtato konsistas kaj el unuopuloj kaj el federalaj unuoj, en la superaj organoj de la federacio estas ĉiam reprezentitaj ne nur la unuopuloj, sed ankaŭ la federalaj unuoj. Ankaŭ tiuj superaj organoj nomiĝas diversmaniere en diversaj federacioj. En USoNo, ekzemple, la organo, en kiu estas reprezentitaj la federalaj unuoj, nomiĝas "Senato", dum la organo, en kiu estas reprezentitaj la unuopuloj, estas la "Ĉambro de Reprezentantoj". En Svislando, al Usona Senato respondas la "Konsilo de la Ŝtatoj", kaj al "Ĉambro de Reprezentantoj" respondas la "Nacia Konsilo". Simile estas en aliaj federacioj. La organo, en kiu estas reprezentitaj la unuopuloj estas nomata per la ĝenerala nomo "Malsupra Domo", kaj tiu, en kiu estas reprezentitaj la federalaj unuoj, nomiĝas "Supra Domo" – sendepende de tio, kiel tiuj domoj nomiĝas en diversaj landoj laŭ la internaj konstituciaj ordoj.

Kelkaj teoriistoj opiniis, ke la federacia ŝtato konsistas nur el federalaj unuoj kaj ne el unuopuloj. Tio signifus, ke la centra, federacia ŝtata potenco rilatus nur al la federalaj unuoj kaj ne al la unuopaj civitanoj. Tio plue signifus, ke la civitanoj estus subigitaj al la ŝtata potenco de sia federala unuo, sed ne al tiu de la federacio.

Inter tiuj teoriistoj, Laband aparte akcentadis, ke la membroj de la Germana Regno, fondita en la jaro 1871, estis nur la unuopaj germanaj ŝtatoj. Alia teoriisto, Redslob, parolante pri Alzaco kaj Loreno, kiuj ĝis la j. 1912 ne havis pozicion de aparta federala unuo en la Germana Regno, asertis, ke tiuj du provincoj – subigitaj tiam rekte al la federacia ŝtato – estis "fremdaj korpoj" en la germana federacio.

Sajnas al ni, ke tiu starpunkto estas tre erara. Se la federacia ŝtato konsistus nur el federalaj unuoj kaj ne ankaŭ el unuopuloj, la federacia ŝtata potenco povus ordoni al la civitanoj nur malrekte, nome pere de la federalaj unuoj. Kaj tio estas kontraŭa al la realaĵo. La federacia ŝtata potenco rekte, senpere efektivigas siajn ordonojn, kiujn la civitanoj devas obei. La federaciaj leĝoj estas senpere validaj por la civitanoj. Por ke la leĝoj estu devigaj, ne estas necesa aparta aprobo fare de la federalaj unuoj. Tion preskribas ĉiuj federaciaj konstitucioj. Ekzemple, en la art. 46 de la Jugoslavia Konstitucio estas klare dirite: "La federaciaj leĝoj validas sur la tuta teritorio de F.P.R. Jugoslavio".

Plue, la fakto, ke ĉiu federacio havas du domojn, montras klare, ke ĝi konsistas kaj el unuopuloj kaj el federalaj unuoj.

2) Pro tiu karaktero de la federacio, *la civitanoj estas duoble subigitaj*: al la ŝtata potenco de la federacio kaj al la ŝtata potenco de la federala unuo. Estas akcentinde, ke la subigiteco de la civitanoj al la federacia ŝtata potenco estas rekta, ke, do, ĝi ne okazas pere de la ŝtata potenco de la federala unuo. Tio estas la dua karakterizo de ĉiu federacio.

Kompreneble, la federacio povas efektivigi siajn leĝojn kaj aliajn ordonojn ankaŭ pere de la federalaj organoj. Tiu ĉi fakto, tamen, ne ŝanĝas la menciitan karakteron de la federaciaj leĝoj, kiuj senpere validas sur la tuta federacia teritorio.

3) La tria karakteriza trajto de ĉiu federacio estas, ke *la diversaj aferoj estas dividitaj inter la federacio kaj la federalaj unuoj*.

Ekzistas aferoj, kiuj estas rezervitaj al la kompetenteco de la federacio. Aliaj aferoj apartenas al la ekskluziva kompetenteco de la federalaj unuoj. Fine la tria grupo de aferoj apartenas nur parte al la federacio kaj aliparte al la federalaj unuoj. En tiu lasta okazo, la federacio kutime estas kompetenta por fiksi la ĝeneralajn principojn, dum la federalaj unuoj pliprecizigas kaj adaptas tiujn ĝeneralajn principojn al la situacio kaj bezonoj de la koncerna unuo.

En federacio la eksterlandaj rilatoj estas ĉiam rezervitaj al la centra ŝtata potenco. La reprezentado de la ŝtato en eksterlando, la sendado kaj akceptado de diplomatoj, la internaciaj kontraktoj, la demandoj pri milito kaj paco – ĉio ĉi en federacia ŝtato estas rezervita al la centraj organoj de la tuta federacio. Per tio la federacio distingiĝas de konfederacio, en kiu ĉiu ŝtato memstare reprezentas sin mem en la internaciaj rilatoj, dum la konfederacio kiel tuto nur koncerne kelkajn aferojn eliras sur la internacian scenejon.

Laŭ la konstitucio de la jaro 1936 Sovjetunio kiel tuto estis subjekto de internacia juro. En la jaro 1944 oni faris ŝanĝojn, laŭ kiuj ankaŭ la federalaj unuoj ricevis la rajton memstare reprezenti sin en la internaciaj rilatoj. En la Konstitucion oni enmetis novan artikolon (art. 18a), laŭ kiu "ĉiu federala respubliko havas la rajton eniri en rektajn rilatojn kun la eksterlandaj ŝtatoj, fari kun ili kontraktojn kaj interŝanĝi diplomatajn kaj konsulajn reprezentantojn". Ŝajnas, ke tiu ŝanĝo estis farita precipe por ke Sovjetunio havu eblecon membrigi en O.U.N. plurajn siajn ŝtatojn kaj, sekve, disponi pri pluraj voĉoj. Estu kiel ajn, pro la fakto, ke la unuopaj federalaj unuoj de Sovjetunio rajtas memstare rilati internacie, Sovjetunio devus nun esti konsiderata kiel konfederacio. Tamen, la realaĵo estas tia, ke prefere oni devus konsideri ĝin nek federacio, nek konfederacio, sed unueca ŝtato. Kompreneble, ne gravas la nomo, kiun oni

donas al iu ŝtato, por decidi ĉu temas pri federacio, konfederacio aŭ unueca ŝtato, sed gravas la demando en kies manoj fakte troviĝas la ŝtata potenco.

Krom la prezentitaj tri ĉefaj karakterizaj trajtoj, diversaj federacioj havas ankaŭ apartajn karakterizojn.

Tiel, ekzemple, kelkfoje iuj federacioj posedas apartajn teritoriojn, kiuj ne estas federacie organizitaj. Alzaco kaj Loreno havis tian apartan juran pozicion en la germana federacio ĝis la jaro 1912. La popolo de Alzaco kaj Loreno estis reprezentita en la Unua Domo (Reichstag) same tiel, kiel la tuta cetera popolo de tiama Germanio, sed ĝi ne estis reprezentita en la Dua Domo (Bundesrat), ĉar tiuj teritorioj ne estis federalaj unuoj ĝis la jaro 1912. En tiu jaro ankaŭ Alzaco kaj Loreno ricevis karakteron de federala unuo kaj tiam, kompreneble, havis reprezentantojn en la Dua Domo.

Kelkaj federacioj konas la sistemon de pluaj aŭtonomaj unuoj en la kadroj de la federalaj unuoj. Tiuj aŭtonomaj unuoj ne havas karakteron de simplaj administraj distriktoj, sed ili estas ĝis certa grado sendependaj unuoj – almenaŭ teorie – kun leĝdona, plenuma kaj juĝa funkcioj. Tiele, laŭ la konstitucio de Jugoslavio ekzistas en la kadro de P. R. Serbio unu aŭtonoma provinco (*Vojvodina*) kaj unu aŭtonoma departemento (*Kosovo* kaj *Metohija*). Tiuj aŭtonomaj provinco kaj departemento ("*pokrajina*" kaj "*oblast*") rajtas sendi apartajn reprezentantojn en la Supran Domon. La nombro de tiuj reprezentantoj estas malpli granda, ol tiu de la federalaj unuoj.

En Sovjetunio, post la revizio de la Konstitucio en la j. 1947, ekzistas 16 federalaj unuoj (federalaj respublikoj). Sole, ekzemple, la Rusa Federala Socialista Respubliko havas 12 aŭtonomajn sovjetajn socialistajn respublikojn kaj 6 aŭtonomajn departementojn. Krome, ekzistas ankaŭ naciaj distriktoj kun ia, almenaŭ formale preskribita, aŭtonomio.

Ĉio ĉi estas interesaj ekzemploj pri la grandaj eblecoj de la federalisma principo. La federacio povas, fakte, tre disbranĉigi kontentigante ne nur la naciajn, sed ankaŭ la provincajn kaj eĉ distriktajn bezonojn kaj apartaĵojn. Sed, aliflanke, ĝi tamen kunligas ĉiujn tiujn unuojn kaj estas tuteca en aferoj komunaj.

La federalisma principo signifas ĉiam kompromison inter la apartaj interesoj de la unuopaj federalaj unuoj kaj la komunaj interesoj de la tuto. Ĝuste tial la dudoma sistemo estas esenca por la federacio. Ĝuste tial la Supra Domo – gardanto de la apartaj interesoj kaj esprimo de plena egaleco de ĉiuj federalaj unuoj – konsistas el reprezentantoj, kiujn elektas – en egala nombro – ĉiu unuopa federala unuo, senkonsidere al sia grandeco, senkonsidere al la nombro de sia loĝantaro. Tiele estas en UŜo kaj Svislando. Tiele estas en

Sovjetunio kaj en Jugoslavio. Tia devas esti la Supra Domo en ĉiu federacio. Sed la Malsupra Domo – gardanto de la komunaj interesoj kaj esprimo de la egaleco de la civitanoj – konsistas el deputitoj, rekte elektitaj de la civitanoj mem, senkonsidere al la limoj inter la federalaj unuoj, proporcie al la nombro de la loĝantoj.

2) *Kelkaj ĝeneralaj rimarkoj*

La apliko de la federalisma principo en la praktiko, precipe se temas pri libervola kreado de novaj federacioj el la nun ekzistantaj ŝtatoj, starigas plurajn problemojn – kaj jurajn kaj psikologiajn.

Unu el la plej gravaj estas la demando pri suvereneco.

La suverenecon oni kutime difinas, en la plej larĝa senco de la vorto, kiel juran kaj faktan kapablon de la ŝtato efektivigadi plenrajte kaj sendepende siajn funkciojn. La vorto "jura" signifas, ke tiu kapablo estas rekonita de la internacia juro. Tial ĝin ne havas, ekzemple, grupo da banditoj aŭ piratoj, eĉ se tiu grupo havas grandan potencon sur larĝa teritorio. La vorto "fakta" signifas, ke ne sufiĉas la jura rekono, sed ke la ŝtato ankaŭ fakte devas havi praktikan eblecon efektivigi siajn funkciojn. La escepto, en okazo de provizora interrompo de tiu fakta kapablo, estas menciita aliloke ⁽¹⁾. La vortoj "plenrajte kaj sendepende" signifas, ke neniuj aliaj rajtas enmiksiĝi en la internajn aferojn de la ŝtato aŭ dikti ĝiajn eksterajn rilatojn.

Kompreneble, ekzistas ankaŭ multaj aliaj difinoj pri suvereneco. De kiam Jean Bodin, kiel la unua, formulis ĝin en la XVI j.c. ĝis la hodiaŭa tago centoj da teoriistoj klopodis ĝin klarigi kaj fiksi en difino. Depende de la starpunkto de la unuopaj aŭtoroj, iliaj difinoj havis tiun aŭ alian nuancon. Kelkaj ĝin komprenis kiel rajton "fari ĉion, kion oni volas", senkonsidere al la internacia juro kaj, tute aparte, senkonsidere al la internaciaj kontraktoj. Tia koncepto, nomata kutime "absoluta suvereneco", pravigas ĉiun ajn agon, eĉ la atakmiliton, sklavigon de la popoloj, internacian terorismon k.t.p. Aliaj aŭtoroj forte limigas la enhavon de la vorto "sendependeco".

La hodiaŭa internacia juro rekonas la suverenecon kaj konsideras ĝin unu el siaj fundamentaj ŝtonoj. Sed tiu fakto, laŭ nia opinio, samtempe limigas la suverenecon. Ĉar la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj proklamas la principon de *suverena egaleco de ĉiuj pacemaj ŝtatoj*, la moderna, progresema koncepto de suvereneco haltigas la suverenajn rajtojn de unu pacema ŝtato sur la limoj de same tiaj rajtoj, apartenantaj al alia pacema ŝtato. En tiu senco oni devas kompreni, laŭ nia koncepto, la vorton "sendependeco".

(1) Vidu p. 20—21 de tiu ĉi libro.

Post tiuj kelkaj klarigoj, ni revenu al la demando. Ĝi stariĝas jene: Kiu estas suverena en la federacio? Ĉu la federacio kiel tuto, ĉu la unuopaj federalaj unuoj, aŭ kaj la federacio kaj la federalaj unuoj?

Al la demando oni respondas diversmaniere.

Tiuj, kiuj opinias suverena nur la federacion, precipe akcentas la gravecon de la aferoj, pri kiuj ĝi estas ekskluzive kompetenta (eksterlandaj, armeaj, ĉefaj ekonomiaj) kaj la fakton, ke la federalaj unuoj ne rajtas praktike eliri el la federacio, eĉ se tiu rajto al ili estas formale rekonita.

Aliaj aŭtoroj diras, ke la federalaj unuoj estas suverenaj. Ili argumentas sian starpunkton per la fakto, ke la federalaj unuoj posedas iajn elementojn de ŝtato, ke ili en multaj okazoj formale rajtas eliri el la federacio, ke ilia kompetenteco estas granda en multaj aferoj, ke, finfine, ili donas vivon kaj forton al la federacio.

La plej multnombraj estas tiuj, kiuj opinias suverenaj kaj la federacion kaj la federalajn unuojn. Por klarigi tiun fenomenon de duobla suvereneco (supera potenco) sur la sama teritorio, oni kutime parolas pri "divido" de suvereneco inter la federacio kaj la federalaj unuoj, aŭ pri "transdono" de parto de suvereneco al federacio fare de la federalaj unuoj.

Sajnas al ni, ke neniu el tiuj respondoj plene kontentigas. Se nur la federacio estas suverena, tiam, evidente, la federalaj unuoj ne povas esti tiaj. Inverse, se nur ili estas suverenaj, tiam ne povas havi tian kvaliton la federacio. Ambaŭ starpunktoj estas kontraŭaj al la realaĵo. Fine, se kaj la federalaj unuoj kaj la federacio estas suverenaj, tiam ne plu povas temi pri suvereneco, ĉar suvereneco signifas superan potencon, kaj du superaj potencoj sur la sama teritorio, en la sama komunajo ne povas ekzisti.

Tiu tuta haoso, el kiu unuavide ne ekzistas eliro, estas kaŭzita, laŭ nia opinio, de la malĝusta kompreno pri la esenco mem de la ŝtato kaj de la konfuzo, kiu regas ĉirkaŭ tiu koncepto.

Le ŝtaton oni personigis. Oni parolas pri ĝi kiel pri subjekto. Oni diras, ke ĝi agas diversmaniere. Tiu fikcio per si mem estas bona kaj utila. Ĝi ebligas diversajn jurajn operaciojn, ĝi simpligas la eksplikadon en multaj okazoj. Sed estas malbonege, se oni forgesas, ke temas, tamen, pri fikcio. La ŝtato, fakte, kondutas nek bone, nek malbone. Ĝi ne proklamas militon, nek subskribas kontrakton, nek ĉeestas internacian konferencon. Estas ĉiam ĝiaj organoj, kiuj faras tion por ĝi. Kaj malantaŭ tiuj organoj staras ĉiam la personoj aŭ la grupoj da personoj, kelkfoje eĉ larĝaj grupoj, kiuj efektive tenas la potencon en siaj manoj. Tial ankaŭ la suvereneco, kvankam esenca atributo de la koncepto "ŝtato", ne apartenas reale, palpeble al ĝi, sed al tiuj, kiuj en la koncerna ŝtato efektive regas.

Kiam Ludoviko la Dekkvara eldiris la faman frazon "La ŝtato estas mi", li diris grandan veron. Li, la absoluta reganto de tiama Francio, estis la persono, kiu disponis pri la ŝtata potenco. Tial li estis suverena kaj interne de la lando kaj rilate al eksterlando. Kaj la teoriistoj ne devis al si rompi la kapon klopodante klarigi la fenomenon. Tute simple: la reĝo estis suverena, ĉar li mem plenrajte kaj sendepende efektivigadis la funkciojn de la ŝtato.

Por doni, do, korektan respondon al la demando pri suvereneco en federacia ŝtato, oni devas forlasi, almenaŭ por momento, ĉiun ajn fikcion kaj esplori kiu estas la fakta tenanto de suvereneco. Tiam per si mem kaj tute simple tuj klariĝos la afero.

Se la suvereneco apartenas al la popolo – kaj en vera federacio ĝi devas aparteni al la popolo –, tiam estas tute superfluaĵoj ĉiuj ajn artefaritaj teoriaj konstruoj pri divido de suvereneco inter la federacio kaj la federalaj unuoj, aŭ pri parta transdonado de suvereneco, aŭ pri rezignado je suvereneco. En tiu okazo povas nur temi pri *organizo* aŭ pri *dispartigo* de la suverenaj funkcioj je diversaj *organoj*, sed la suvereneco mem restas en la posedo de la popolo.

La popolo konsistas el unuopuloj. Kaj tiuj unuopuloj apartenas al diversaj sociaj grupoj: al sia familio, al sia vilaĝo aŭ urbo, al sia provinco, al sia nacio, al sia kontinento, al la mondo. Kiam temas pri libervola formado de politika unuiĝo, tiam – en kondiĉoj de demokratio – la menciita pluraleco de la homa socia naturo povas manifestiĝi kiel pluraleco de la ŝtatformoj. Ne ĉiuj elementoj de tiu pluraleco esprimiĝas tiamaniere, sed nur la plej gravaj, la ĉefaj en la koncerna epoko: tiuj, por kiuj plene maturiĝis la eblecoj esti ankaŭ politike realigitaj.

Tial en vera federacio – en kiu, nome, regas demokratia reĝimo – la sama portanto de suvereneco, la popolo, en sia propra intereso suverene decidas kiuj el ĝiaj interesoj estos protektataj de la tuto (federacio), kiuj el ili estos gardataj de aliaj ŝtataj organismoj (federalaj unuoj aŭ aliaj unuoj en la kadroj de la federalaj unuoj).

En federacio, do, la suvereneco, laŭ nia opinio, ne estas dividita: ĝi tutece estas havaĵo de la popolo. Sed, ĉar la popolo en federacio apartenas kaj al malpli grandaj unuoj, ekzemple al provincoj kaj nacioj, kaj al multe pli grandaj, precipe ekonomiaj, tutoj, *tial ĝi mem organizas, dispartigas sian suverenecon tiel, ke ĝi esprimiĝu kaj pere de la federacia ŝtato kaj pere de la federalaj ŝtatoj*. Se la popolo ne povus fari tion, ĝi ne plu estus suverena!

El ĉio dirita sekvas, ke, laŭ nia opinio, ne estas eble federaciigi tiujn sociajn kaj politikajn unuojn, inter kiuj ne ekzistas en la nuna momento almenaŭ ĝis certa grado simileco de ekonomio, kulturo, civilizo, regadreĝimo kaj idealoj. Estas, ekzemple, neimagebla fede-

racio, en kiu unu parto de la federalaj unuoj havus ekonomion bazitan sur la principo de privata havaĵo, kaj la alia parto sur la principo de komuna havaĵo. Same tiel, tro grandaj diferencoj en la vivkutimoj, moralaj konceptoj, kultura nivelo signifas seriozajn malhelpojn por kreo de federacio. Tial, la projektoj celantaj al mondfederacio ŝajnas ankoraŭ tro fruaj, tro nematuraj. Male, la aspiro al federaciigo de Eŭropo estas multe pli realaj kaj tial relative multe pli facile efektiviĝeblaj.

Alia grava problemo estas pli psikologia, ol jura. Por ke la federalisma principo bone funkcii en la praktiko, estas nepre necese liberigi la spiritojn de la homoj de tro mallarĝa naciisma aŭ eĉ provincisma konceptado kaj eduki ilin al pensado kaj sentado pli larĝa. Se oni ne povas atingi tion, la federalismo estas kondamnita je malsukceso, ĉar ĝi ne signifas superregadon de unu nacio, sed kunlaboradon de pluraj.

Ofte okazas, ke eĉ homoj, kiuj sincere celadas al federalismo en tiu aŭ alia formo, ne povas liberiĝi de siaj mallarĝaj naciismaj konceptoj, kiuj fakte igas ilin opinii tute serioze sian nacion supera al ĉiuj aliaj. Tre konata franca federalisto, membro de la Franca Akademio, deklaris, ekzemple, antaŭ nelonge: "Ĉiuj lingvoj estas necesaj en kreado de Eŭropo, sed lingvo, kiel la franca lingvo, neprigas grandajn devojn." Li plue emfazis pri "la franca grundo, kiu posedas apartan kapablon produkti konsiderindan nombron da geniaj kaj talentaj homoj..."

Tiaspecajn deklarojn oni aŭdas de ĉiuj flankoj. En Italio tre elstaraj personoj – ankaŭ federalistoj – akcentis, ke en Eŭropo la menciitan apartan rolon devus ludi ne la lingvo de Racine, sed tiu de Dante. La Germanoj certe pensas, ke la lingvo de Göthe tamen estus pli taŭga.

Ni tion menciis nur por montri ĝis kia grado oni ofte estas malproksimaj de korekta rigardado al la federalisma principo, laŭ kiu ĉiuj federalaj unuoj devas esti plene egalaj kaj havi tre larĝan aŭtonomion precipe en la sfero de lingvo kaj kulturo ĝenerale.


Koncerne la lingvan demandon, la ideo de Zamenhof estas pli aktuala ol iam: federacio, konsistanta el pluraj nacioj kun apartaj naciaj lingvoj, devus nepre akcepti Esperanton kiel komunan lingvon. Tio estas la sola justa solvo. Pro sia neŭtraleco ĝi ne ofendas la naciajn sentojn. Pro sia perfekteco ĝi ebligas facilajn kontaktojn inter la diversaj partoj. Pro sia aparta rolo de internacia komunikilo ĝi ebligas al ĉiuj federalaj unuoj konservi kaj eĉ evoluigi siajn proprajn naciajn lingvojn por la bezonoj de interna rilatado.

Ne estas loko ĉi tie por tuŝi multnombrajn aliajn demandojn. Ili estas kaj tro ampleksaj kaj tro specialaj. Tial ili ne povas havi

ĝeneralan intereson. Estas afero de fakuloj kaj specialistoj trovi la precizajn, adekvatajn teknikajn formojn, kiuj taŭge esprimos la duoblan aspiron de la amasoj: la deziron elviviĝadi en la kadroj de siaj nacioj aŭ de aliaj malgrandaj sociaj grupoj kaj la samtempan tendencon aparteni al pli ampleksaj unuoj.


Prave diris unu el la grandaj hodiaŭaj Eŭropanoj, prof. H. Brugmans, en unu el siaj lastdataj artikoloj: "En la perspektivo de la idealaj strukturoj kaj de la finaj celoj oni neniam rajtas preni kiel elirpunkton la fikcion de "tutmonda popolo"... Ĝustus danĝere reveni al nocioj de "abstrakta homo", de "homo ĝenerale", de "homo kaj civitano", kiu estus la sama sur ĉiuj latitudoj kaj kiu povus, sekve, esti regata laŭ la sama maniero senkonsidere al la loko, kie li loĝas."

Vere, la homoj estas egalaj nur en sia kvalito de Homo, sed multnombraj estas la diferencoj inter ili. Kiam oni parolas pri kreo de novaj grandaj politikaj unuiĝoj, la ĉefa estas ilia nacieco. La federalismo, unuigante tion, kio estas unuigebla kaj unuiginda, kaj lasante kiel apartan tion, kio estas diferenca, solvas la problemon. Ĝi estas dialektika sintezo de antagonismaj kontraŭaĵoj. Ĝi signifas unuecon de la diverseco.



DUA PARTO

LUKTO POR LA PACO
PER
JURAJ RIMEDOJ



ĈAPITRO V

METODOJ POR SOLVADO DE INTERNACIAJ KONFLIKTOJ

Grava parto de la internacia juro rilatas al solvado de internaciaj konfliktoj.

En la interŝtataj rilatoj – politikaj, ekonomiaj, komercaj, kulturaj k.a. – tre ofte okazas ĉiaspecaj malkonsentoj. Ili ekestas kiel rezulto de miskomprenoj aŭ, multe pli ofte, kiel konsekvenco de kontraŭaj, antagonismaj interesoj. La malkonsentoj povas esti malgravaj, sed ili povas rilati eĉ al esencaj interesoj, al t.n. vivinteresoj de la ŝtatoj, ekzemple al ilia sendependeco, teritorio k.t.p. Ĉiuj ĉi malkonsentoj estas nomataj internaciaj konfliktoj.

Sekve, la internacia konflikto estas ĉiu malkonsento pri faktoj aŭ pri jura interpretado inter du aŭ pluraj ŝtatoj aŭ aliaj subjektoj de internacia juro. Se, ekzemple, du ŝtatoj malsame prezentas la fakthan staton kaj se ĉiu el ili, surbaze de sia propra prezentado de la faktoj, faras aliajn konkludojn kaj havas aliajn postulojn, temas pri malkonsento koncerne la faktojn. Tiaj konfliktoj estas tre oftaj. Oni povas pri ili ĉiutage legi en la gazetoj. Jen, ŝtato *A* plendas, ke aviadiloj de ŝtato *B* superflugis ĝian teritorion, dum la ŝtato *B* tion neas. Jen, aliloke, unu ŝtato asertas, ke militŝipoj de alia eniris en ĝiajn teritoriajn akvojn, kaj la alia asertas, ke tute ne temis pri militŝipoj. En tiaj okazoj, la partioj kutime konsentas pri la jura regulo, kiu estus aplikenda je tiu kazo, se la fakta stato estus sendube konstatebla, se ĝi estus tia, kia ĝi estas prezentata de unu aŭ de la alia el la partioj.

Male, kiam la partioj same prezentas la fakthan staton, sed ili ne konsentas pri la jura regulo aplikenda je tiu kazo, aŭ ili malsame interpretas la saman juran regulon, tiam temas pri malkonsento koncerne juron.

Plej ofte intermiksiĝas malkonsento pri faktoj kun malkonsento pri juro, kio ankoraŭ pli komplikas la aferon.

Por ke oni povu paroli pri internacia konflikto, ne sufiĉas nur, ke la partioj malkonsentu pri la faktoj aŭ pri la juro, sed estas necese, ke surbaze de tiu malkonsento ili starigu diferencajn postulojn. Se la malkonsento ne manifestiĝas en formo de aparta postulo de unu partio al la alia, kompreneble ne povas temi pri konflikto.

La internaciaj konfliktoj povas esti solvataj nur laŭ du manieroj: aŭ per aplikado de pacaj, juraj rimedoj, aŭ per la uzado de la perforto.

La nuntempa internacia juro kondamnas la militon kaj malpermesas la uzon de perfortaj rimedoj, aŭ eĉ la nuran minacon per tiaj rimedoj, en la internaciaj rilatoj. Tio estas klare preskribita ne nur en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (art. 2), sed ankaŭ en la Ĉarto de Bogota (art. 18). Eĉ la ekonomia premo, farita kun la celo devigi alian ŝtaton al cedado aŭ al donado de kiaj ajn avantaĝoj, estas malpermesita. Tion, ekzemple, antaŭvidas la Ĉarto de Bogota en sia art. 16.

Restas, do, kiel sole ebla laŭjura vojo, tiu de la t.n. pacaj rimedoj.

La internacia juro kreis kaj evoluigis relative grandan nombron da tiaj rimedoj. Kelkaj el ili estas jam tre malnovaj. La aliaj formiĝis antaŭ nelonge. Ne ĉiu el ili estas same taŭga por solvado de ĉiu ajn konflikto. Iuj pli taŭgas por unu speco de konfliktoj, la aliaj por alia. Ilia komuna trajto estas: ebligi, ke la konflikto estu solvita pace, sen milito, sen apliko de kiu ajn perforta rimedo. Ĉiuj kune ili prezentas tiom da eblecoj por atingi tiun celon, ke, se ekzistus same tiom da bona volo ĉe la ŝtatgvidantoj kaj politikistoj, ĉe la personoj, en kies manoj troviĝas la sorto de la mondo, neniam plu okazus milito!

La ĉefaj pacaj rimedoj, kiujn mencias ankaŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj en sia art. 33, estas:

a) *Rektaj diplomataj traktadoj*. – Tiu ĉi maniero de konflikto-solvado estas la plej simpla kaj tial ankaŭ la plej ofta. La reprezentantoj de la interesitaj partioj rekte ekkontaktas. Post pli aŭ malpli longaj interparoloj kaj traktadoj, ili trovas (aŭ ne trovas!) la solvon. La formo de la traktadoj ne estas grava. Povas okazi, se necese, eĉ internacia konferenco aŭ kongreso, precipe se pluraj ŝtatoj troviĝas en konflikto.

b) *Enketaj komisionoj*. – Ili estas tre taŭgaj precipe en la okazoj, kiam la fakta stato ne estas klara. La enketa komisiono konsistas ĉiam el pluraj personoj. En ĝi troviĝas egala nombro da ŝtatanoj de la interesitaj partioj. Kutime oni aldonas al la komisiono unu neŭtralan kiel prezidanton. En la komisiono povas troviĝi, krom la prezidanto, ankaŭ aliaj aliŝtatanoj kiel simplaj membroj. La enketa komisiono, kiu esploris la faman incidenton inter Britio kaj Rusio en la j. 1904 (t.n. Dogger-bank-incidento) konsistis, ekzemple, el kvin

maristaj oficiroj, apartenantaj, laŭ la ŝtataneco, al Britio. Rusio. UŜoNo, Aŭstrio-Hungario kaj Francio.

La tasko de la enketa komisiono estas nur konstati la veran faktan staton. Ĝi proponas nenian solvon. Surbaze de la konstatitaj kaj pruvitaj faktoj, la interesitaj partioj reprenas la diplomatajn interparolojn kaj solvas la konflikton.

La enketaj komisionoj montriĝis tre utilaj. La apliko de tiu rimedo donis ofte tre bonajn rezultojn. Ankaŭ la menciita incidento inter Britio kaj Rusio estis pace solvita surbaze de la raporto de la enketa komisiono.

c) *Mediacio* (france *médiation*, angle *mediation*). – Se unu aŭ pluraj ŝtatoj, troviĝantaj ekster la konflikto, klopodas atingi, ke la interesitaj ŝtatoj mem solvu la konflikton, kelkfoje surbaze de la proponoj de tiu aŭ de tiuj neinteresitaj ŝtatoj, oni nomas tian intervenon mediacio. En la praktiko ekzistas pluraj gradoj kaj nuancoj de mediacio. La plej malforta estas tiu, kiun oni kutime nomas "bonaj servoj" (france *bons offices*): la tria ŝtato nur konsilas al unu aŭ al ambaŭ partioj, ke ili ekkontaktu por solvi la konflikton. La tria ŝtato tute ne proponas ian ajn solvon de la konflikto, sed ĝi nur klopodas, ke la partioj komencu la interparolojn.

La "bonaj servoj", kiel aparta rimedo por solvado de la internaciaj konfliktoj, estas antaŭviditaj en la Ĉarto de Bogota, sed ilin ne mencias speciale la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Tio, kompreneble, ne signifas, ke tiu rimedo ne estas aplikebla inter la ŝtatoj-membroj de UN.

La plej forta tipo de mediacio estas tiu, kiun enkondukis la Haga Konvencio pri Solvado de Internaciaj Konfliktoj: ĉiu el la partioj nomas po unu neŭtrala ŝtato; la tiel nomitaj ŝtatoj intertraktas por la partioj; la partioj mem ne havas rektan kontakton, sed ĉiu el ili estas informata pri la evoluo de la afero; se la traktadoj bone progresas, en konvena momento la partioj mem rekte ekkontaktas.

Ekzistas ankaŭ tiaj tipoj de mediacio, kiuj ebligas al la tria ŝtato fari proponojn pri la maniero, laŭ kiu la partioj devus solvi la konflikton. La decido pri la akcepto aŭ malakcepto de la proponita solvo apartenas en ĉiu okazo al la partioj. Tiu solvo, do, ne povas esti altrudita al ili.

d) *Konciliacio* (france *conciliation*, angle *conciliation*). Multe pli ŝatata ol la mediacio, la konciliacio estas ĉiam pli aplikata metodo en la moderna epoko. La rolon de paciganto ludas konciliacia organo, kiu esploras la aferon el fakta kaj el jura vidpunktoj. La konciliacia komisiono kutime konsistas el malpara nombro da neŭtralaj kompetentaj personoj: famaj advokatoj, profesoroj, grandaj juĝistoj aŭ aliaj fakuloj. Ilin elektas la partioj mem. Post la esploro de la afero,

la konciliacia komisiono proponas la solvon. La partioj povas ĝin akcepti aŭ rifuzi. En la lasta okazo la komisiono povas proponi alian solvon, eventuale pluan, se ankaŭ la dua estas rifuzita.

La konciliacio montriĝis taŭga precipe por la t.n. nejuraj aŭ politikaj konfliktoj, t.e. por konfliktoj, al kiuj ne estas aplikeblaj la reguloj de internacia juro (ekz. se unu ŝtato postulas parton de teritorio de la alia).

La t.n. Brusela Pakto inter Britio, Francio kaj la landoj de BENELUKSO antaŭvidas la konciliacion por solvado ĝuste de tiaspecaj konfliktoj.

Inter mediacio kaj konciliacio estas jena grava diferenco: la mediacion faras unu aŭ pluraj principe neinteresitaj ŝtatoj (fakte ili ĉiam estas almenaŭ iom interesitaj!), dum la konciliacio troviĝas en la manoj de organo, konsistanta el neŭtralaj fakuloj. Tial, ĝenerale, la partioj en konflikto preferas la konciliacion ol la mediacion.

e) *Arbitracio*. – Apliki arbitracion signifas solvi la konflikton surbaze de verdikto, eldirita de aparta kortumo, kiun elektas la partioj mem. La verdikto estas deviga.

La partioj en konflikto interkonsente nomas malparan nombron da arbitraciaj juĝistoj, fiksas la aplikotan proceduron, anticipe devigas sin plenumi la eldirotan verdikton.

La arbitraciaj kortumoj kutime rajtas juĝi ne nur laŭ la principoj kaj reguloj de la internacia juro, sed ankaŭ laŭ la principoj de justeco ("*ex aequo et bono*"), ekster la kadro de strikte juraj reguloj. Tio dependas de la interkonsento de la partioj: se ili tion deziras, ili devas tion klare menciigi en la arbitracia kontrakto.

La arbitracio estas konata jam pli ol 5.000 jarojn. Ĝin aplikis la antikvaj popoloj, ekzemple la Sumeroj, Persoj k.a. Ankaŭ en antikva Grekio tiu metodo estis tre ofta. Hodiaŭ estas konataj pli ol 90 arbitraciaj kazoj el la historio de la grekaj civitoj-ŝtatoj.

Inter arbitracio kaj konciliacio estas tre grava diferenco. La arbitracio donas nur unu, devigan solvon: la verdikton. Ĝuste pro tiu karaktero de verdikto, la arbitracia solvo estas kaj deviga kaj povas esti nur unu. Male, la konciliacia komisiono ne eldiras verdikton, sed nur proponas la solvon. Tial, se tiu propono ne estas akceptita, la konciliacia komisiono povas fari pluajn proponojn.

f) *Internacia juĝado*. – Temas pri aparta speco de arbitracio. La internacian juĝadon en vera senco de la vorto efektivas hodiaŭ la Internacia Kortumo en Hago.

Inter la internacia juĝado en strikta senco kaj la arbitracio ne ekzistas, fakte, esencaj diferencoj. Kaj en la unua kaj en la dua metodoj oni esploras la faktojn, oni aplikas juron, juĝas kaj eldiras devigan verdikton. Ne nur la arbitraciaj juĝistoj, sed ankaŭ la Inter-

nacia Kortumo povas juĝi laŭ la principoj de justeco (*ex aequo et bono*), se la partioj konsentas pri tiaspeca juĝado. La sola diferenco estas, ke la arbitraciaj organoj estas formataj kiel provizoraj organoj por juĝi konkretan kazon, dum la Internacia Kortumo estas organizita kiel konstanta supera juĝa institucio.

El ĉiuj skize prezentitaj rimedoj, la internacia juĝado havas sendube la plej grandan valoron el jura vidpunkto. Ĝi estas la granda espero por la estonteco.

ĈAPITRO VI

LA INTERNACIA KORTUMO KAJ ĜIA ROLO

La Internacia Kortumo havas relative mallongan historion. La unuaj paŝoj, faritaj kun la celo krei konstantan organon por juĝado de internaciaj konfliktoj, okazis en la j. 1897. Tiam, dum la Unua Haga Konferenco, estis fondita la t.n. Konstanta Arbitracia Kortumo. La nomo povus facile trompi: oni povus pensi, ke temas pri fakte konstanta juĝa organo. En la realo, "konstanta" estis nur la listo de la arbitraciaj juĝistoj. Ĉiu ŝtato, kiu estis subskribinta la konvencion, rajtis nomi kvar personojn kun la necesaj fakaj kaj moralaj kvalitoj kiel membrojn de la Kortumo. La tiel nomitaj kvar personoj formis la t.n. "nacian grupon". Do por ĉiu ŝtato ekzistis po unu "nacia grupo". La grupoj estis enregistritaj en aparta listo de arbitraciaj juĝistoj. Tiun liston oni faras ankaŭ hodiaŭ. La nura celo de tiu listo estas plifaciligi al la ŝtatoj en konflikto trovi konvenajn juĝistojn. Se la partioj decidiĝas transdoni la konflikton al arbitracia juĝado, ili povas facile elekti el la listo la plej taŭgajn personojn. Hodiaŭ la naciaj grupoj havas ankaŭ alian taskon: ili proponas la kandidatojn por la Internacia Kortumo. Sed pri tio poste!

Plua paŝo estis farita en la j. 1907, dum la Dua Haga Konferenco. Tiam montriĝis la deziro krei vere konstantan kortumon kun konstantaj, neŝanĝeblaj juĝistoj. La ĉefa problemo estis kiamaniere kontentigi, de unu flanko, la postulon, ke la juĝistaro ne estu tro granda kaj, de la alia flanko, la deziron de ĉiuj 44 ŝtatoj havi en la kortumo almenaŭ unu sian juĝiston. Kvankam oni en Hago ellaboris projekton de statuto de la kortumo, kiu – cetere – poste tre bone servis kiel modelo, tamen tiu provo malsukcesis. Ĉiuj penadoj rompiĝis sur la supre menciita problemo de la nombro da juĝistoj.

Tiuj ĉi klopodoj kaj provoj montris, ke la ideo pri arbitracia juĝado de la internaciaj konfliktoj ĉiam pli kaj pli maturiĝas. Antaŭ la Unua Mondmilito ekzistis jam pli ol 130 arbitraciaj kontraktoj kaj pli ol 150 arbitraciaj klaŭzoj inter diversaj ŝtatoj. Tiuj kontraktoj

kaj klaŭzoj antaŭvidadis la arbitracion kiel rimedon por solvado de granda nombro da konfliktoj, kiuj povis ekesti inter la subskribintoj.

Post la Unua Mondmilito oni renovigis la klopodojn kaj oni atingis tre bonan rezulton en relative mallonga tempo. La tiama Konsilo de la estinta Ligo de Nacioj kreis apartan Juristan Komitaton, kies tasko estis ellabori la statuton de la nova kortumo. La Komitato fakte ellaboris la Statuton. Ĝi estis voĉdonita en la Asambleo kaj en la Konsilo de la Ligo. Tio, tamen, ne sufiĉis, por ke ĝi ekvalidu. Ĝin devis aparte akcepti difinita nombro da ŝtatoj. Tiu akcepto okazis per subskribo de la Protokolo de la 16-a de Decembro 1920.

La nova Konstanta Kortumo de Internacia Justeco ekfunkciis en la j. 1921, kiam estis elektitaj la unuaj juĝistoj. Ĝi ĉesigis sian agadon en la j. 1940 pro la invado de la germanaj trupoj en Nederlondon. Dum sia ekzisto la Konstanta Kortumo de Internacia Justeco ricevis por prijuĝo 51 aferojn, el kiuj kelkaj estis sufiĉe gravaj. Krome, la du organoj de la Ligo de Nacioj rajtis postuli de la Kortumo la t.n. konsilajn opiniojn, t.e. opiniojn pri juraj demandoj, kiujn la Asambleo aŭ la Konsilo ne povis solvi. La Kortumo ricevis 28 petojn pri konsilaj opinioj. Ĝi eldiris entute 31 verdiktojn (la aliaj aferoj aŭ estis retiritaj aŭ la partioj interkonsentis ekster la proceso) kaj donis 27 konsilajn opiniojn. Per sia agado la Kortumo grave evoluigis la internacian juron ĉar en siaj verdiktoj kaj konsilaj opinioj ĝi tuŝis multajn sferojn de la interŝtata vivo.

La Konstanta Kortumo de Internacia Justeco estis formale likvidita la 18-an de Aprilo 1946 laŭ la decido de la lasta (21-a) kunsido de la Asambleo de la Ligo de Nacioj, kunvokita por fini formale la ekziston de la Ligo.

Dum la Dua Mondmilito okazis, kiel konate, pluraj konferencoj kun la celo pritrakti la problemon pri kreo de nova organizaĵo de pacemaj ŝtatoj. La Konferenco de Dumbarton Oaks, okazinta en la j. 1944, ellaboris la projekton de la nova organizaĵo. Koncerne la Internacian Kortumon, la projekto de Dumbarton Oaks lasis du eblecojn: aŭ akcepti la Statuton de la malnova Konstanta Kortumo, aŭ, surbaze de la malnova Statuto, ellabori la novan. La Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj, okazinta de la 26-a de Aprilo ĝis la 26-a de Junio 1945 en San Francisko, decidiĝis por la dua alternativo. Tamen, la diferencoj inter la nova Statuto de la Internacia Justeco kaj la malnova de la Konstanta Kortumo de Internacia Justeco ne estas grandaj. El 70 artikoloj de la nova Statuto, 50 artikoloj estas laŭvorte identaj al la malnova. La aliaj artikoloj enhavas malgravajn ŝanĝojn.

La ĉefaj diferencoj inter la nova kaj la malnova Kortumo estas:

a) La Internacia Kortumo estas unu el la ĉefaj organoj de UN, dum la Konstanta Kortumo ne havis tiun karakteron en rilato al la Ligo de Nacioj.

b) La Statuto de la nova Kortumo estas parto de la Ĉarto de UN, dum tiu de la malnova ne estis parto de la Pakto de la LN.

c) La mandato de la juĝistoj en la Internacia Kortumo ne ĉesas samtempe por ĉiuj juĝistoj, sed ĉiun trian jaron estas elektataj 5 juĝistoj el 15, dum la mandato de la juĝistoj de la malnova Kortumo finiĝis la saman momenton.

d) La ŝanĝoj de la Statuto hodiaŭ efektiviĝas laŭ la sama maniero, kiel la ŝanĝoj de la Ĉarto, dum la malnova Statuto povis esti ŝanĝita sendepende de la Pakto.

Alie, kiel dirite, la ŝanĝoj ne estas gravaj. Oni penis eĉ konservi la saman sinsekvon de la artikoloj, por ke la kontinueco estu ankoraŭ pli evidenta.

La ĉefaj principoj kaj reguloj, koncernantaj la Internacian Kortumon, troviĝas en la Ĉarto de UN, precipe en la ĉapitro XIV, en la Statuto kaj en la Regularo pri proceduro, kiun akceptis la Kortumo mem la 6-an de Majo 1946.

La Internacia Kortumo *konsistas* el 15 juĝistoj. Ili estas elektataj de la Konsilo de Sekureco kaj de la Asambleo de UN, laŭ jena maniero:

Minimуме tri monatojn antaŭ la elektoj la Ĝenerala Sekretario de UN invitas la membrojn de la Konstanta Arbitracia Kortumo, pri kiu ni jam parolis, proponi la kandidatojn. Ĉiu "nacia grupo" (la 4 arbitraciaj juĝistoj enregistritaj sur la menciita listo) havas la rajton proponi 4 kandidatojn, el kiuj nur du povas aparteni al la koncerna ŝtato, dum la aliaj du estas aliŝtatanoj. Surbaze de tiuj proponoj la Ĝenerala Sekretario de UN kunmetas la liston de kandidatoj laŭ aboca ordo. Pri ili voĉdonas ambaŭ ĉefaj organoj de UN. Estas elektita tiu kandidato, kiu ricevis absolutan plimulton kaj en la Konsilo de Sekureco kaj en la Asambleo. Se du kandidatoj de la sama ŝtato ricevas la necesan kvorumon, la pli aĝa estas elektita, ĉar al la Kortumo ne povas aparteni kiel juĝistoj du personoj de la sama ŝtato. Povas okazi, ke post la unua elekto ne ĉiuj postenoj de juĝistoj estas plenigitaj. Tiam oni faras duan elekton por la vakantaj lokoj. Se necese, oni faras ankaŭ la trian elekton. Se, post la tria elekto, restas tamen ankoraŭ unu aŭ pluraj vakantaj lokoj, la du organoj de UN elektas t.n. perantan komisionon, kiu havas la taskon trovi konvenan personon por la vakanta loko kaj prezenti ĝin al akcepto de la Asambleo kaj de la Konsilo de Sekureco. Se la Komisiono ne povas akordiĝi, tiam la jam elektitaj juĝistoj alektas la juĝiston aŭ la juĝistojn por la vakanta(j) loko(j) el inter la

kandidatoj, kiuj ricevis minimume unu voĉon en almenaŭ unu el la elektorganoj de UN.

Kiel oni vidas, la elekta proceduro estas tre komplika, sed ĝi garantias justan dispartigon de la juĝistaj lokoj. La aplikata formulo kontentigas kaj la grandajn kaj la malgrandajn ŝtatojn.

Plua garantio por la ŝtatoj, kiuj ne sukcesis elektigi sian ŝtatanon en la Kortumon, estas la institucio de t.n. juĝisto *ad hoc* (provizora juĝisto). Se, nome, iu ŝtato, kiu procesas antaŭ la Kortumo, ne havas inter la juĝistoj sian ŝtatanon, ĝi rajtas por tiu konkreta proceso nomi kiel juĝiston *ad hoc* unu sian aŭ alilandan ŝtatanon. Tiu juĝisto havas la samajn rajtojn, kiel la aliaj. Lia funkcio, kompreneble, daŭras nur dum la koncerna proceso. Tiamaniere solviĝis la grava problemo, kiu ne povis esti solvita en la j. 1907 en Hago: pere de la institucio de la juĝisto *ad hoc* la ŝtatoj ne reprezentitaj en la Kortumo havas eblecon egaliĝi kun la ŝtatoj reprezentitaj en la Kortumo.

La juĝistoj estas elektataj por la daŭro de naŭ jaroj, sed tiel, ke ĉiun trian jaron oni reelektas kvin juĝistojn. La malnovaj juĝistoj estas reelekteblaj. La juĝistoj ricevas salajron de UN kaj, post la ĉeso de sia funkcio, pension. La Kortumo elektas por tri jaroj siajn prezidanton kaj vicprezidanton. La Kortumo disponas pri pluraj oficistoj (notario, sekretario, interpretistoj k.t.p.). La juĝistoj kaj la pli altaj oficistoj ĝuas la necesajn diplomatajn privilegiojn.

La *sidejo* de la Kortumo estas en Hago, en la Palaco de la Paco.

La *oficialaj lingvoj* estas la franca kaj la angla. Oni povas prezenti la aktojn aŭ fari la paroladojn en unu el la du lingvoj, sed ĉio estas tuj tradukata en la alian, krom se la partioj interkonsentas pri la uzo de nur unu el la du lingvoj. Malgraŭ la tre bonaj tradukistoj, okazas ofte miskomprenoj, kelkfoje eĉ tre gravaj. Krome la uzo de du lingvoj duobligas la daŭron de la proceso kaj faras ĝin pli multekosta. Fine, la oficialigo de du naciaj lingvoj kontraŭas al principo de plena egaleco de la partioj. Estas pli ol klare, ke advokato Franco aŭ Anglo pli facile kaj, sekve, pli konvinke povas reprezenti sian partion, ol alinaciano, kiu nur lernis paroli unu el la du lingvoj. Nur la akcepto de la Internacia Lingvo, la sola vere neŭtrala, kontentigus la principon de partiegaleco.

La *procesoj* regule okazas antaŭ la tuta Kortumo. Tamen, la necesa kvorumo estas nur naŭ juĝistoj, t.e. la Kortumo ne kapablas juĝi, se ne ĉeestas minimume 9 juĝistoj. La Kortumo rajtas formi apartajn „*ĉambrojn*” de minimume tri juĝistoj. La ĉambroj estas precipe antaŭviditaj por juĝado pri la aferoj de laboro, aferoj de transito kaj komunikado. La ĉambroj juĝas la aferon nur se la partioj tion postulas. Se ili tion ne faras, la afero estas juĝata ”en pleno”, t.e. antaŭ la tuta Kortumo.

Grava demando estas tiu de la *kompetenteco* de la Kortumo. La teorio dediĉis al tiu problemo grandan atenton kaj tiurilate ekzistas pluraj opinioj. Laŭ nia opinio oni devas distingi tre klare la partikapablon de la kompetenteco. La partikapablo estas la kapablo aperi antaŭ la Kortumo kiel partio. Ĝi apartenas nur al la ŝtatoj membroj de la Statuto. Sekve nek unuopaj personoj, nek la t.n. juraj aŭ moralaj personoj (societoj, asocioj, korporacioj k.t.p.), kiuj ne havas karakteron de ŝtato, povas esti partioj. Plua kondiĉo por akiro de la partikapablo estas, ke la koncerna ŝtato estu membro de la Statuto. Tiun membrecon havas, unue, ĉiuj membroj de UN, due, ĉiuj ŝtatoj nemembroj de UN, kiuj fariĝis membroj de la Statuto sub la kondiĉoj fiksitaĵ de la Asambleo de UN. La aliaj ŝtatoj povas akiri la partikapablon por difinita proceso aŭ por difinitaj procesoj, se ili faras deklaron en la senco de la Rezolucio de la Konsilo de Sekureco de la 15-a de Oktobro 1946. En la deklaro ili devas akcepti la jurisdikcion de la Kortumo kaj promesi, ke ili plenumos ĝian verdikton.

Alia afero estas la kompetenteco. Ĝi estas la kapablo de la Kortumo doni konsilajn opiniojn aŭ juĝi konkretajn aferojn inter la partioj havantaj la kapablon aperi kiel partioj antaŭ ĝi. La kompetenteco de la Kortumo estas, do, duobla: a) konsulta, b) kontraŭdira.

La *konsulta kompetenteco* konsistas en la rajto kaj devo de la Kortumo donadi sian opinion pri juraj demandoj al la Konsilo de Sekureco, al la Asambleo de UN kaj al la aliaj organoj de UN aŭ al la t.n. "specialigitaj institucioj", se tiuj aliaj organoj aŭ specialigitaj institucioj ricevis apartan permeson de la Asambleo. La opinio de la Kortumo povas esti petata nur se temas pri juraj problemoj, kiujn renkontas la cititaj organoj kaj institucioj en sia aktiveco.

La t.n. *kontraŭdira kompetenteco* konsistas en la rajto kaj devo de la Kortumo juĝi la konfliktojn inter la ŝtatoj, kiuj havas partikapablon. Tiu kompetenteco povas esti a) fakultativa, b) deviga.

Pri *fakultativa* (libervola) *kompetenteco* oni parolas, kiam unu aŭ pluraj konfliktoj, kiuj jam ekzistas inter du aŭ pluraj ŝtatoj, estas transdonitaj al juĝado de la Kortumo surbaze de aparta interkonsento de ĉiuj interesitaj ŝtatoj. Tiu interkonsento nomiĝas "*kompromiso*".

Pri *deviga kompetenteco* oni parolas, kiam inter du aŭ pluraj ŝtatoj ne ekzistas konflikto, sed oni anticipe interkonsentas, ke la estontan eventualan konflikton, aŭ specon de konfliktoj, aŭ ĉiujn konfliktojn la koncernaj ŝtatoj transdonos por prijuĝo al Internacia Kortumo. Ekzemple la ŝtatoj A/ kaj B/ konkludas komercan kontrakton kaj aparta artikolo de tiu kontrakto antaŭvidas, ke ĉiu

konflikto, kiu povus ekesti el tiu kontrakto, estos transdonita al la Kortumo por prijuĝo.

Pri deviga kompetenteco oni ankaŭ parolas en la okazo de la t.n. „*fakultativa klaŭzo*” de la artikolo 36 de la Statuto. La paraĝrafo II de tiu artikolo donas la eblecon al ĉiuj ŝtatoj-membroj de la Statuto deklari en ĉiu ajn momento, ke ili akceptas la devigan kompetentecon de la Kortumo (por prijuĝo de certaj juraj demandoj) rilate al ĉiu alia ŝtato, kiu akceptis la saman devigon. Se, do, la ŝtatoj A/, B/, C/ ktp. faris tiun deklaron, tiam unu el tiuj ŝtatoj (ekz. A/) povas, sen iu ajn alia aparta interkonsento, plendi kontraŭ kiu ajn alia deklarinto (ekz. la ŝtato B/) antaŭ la Kortumo. En ĉiuj ĉi okazoj oni parolas pri deviga kompetenteco.

Kiel oni vidas, ne temas pri ”devigo” en tiu senco, ke iu ŝtato povus esti fakte devigita aperi antaŭ la Kortumo malgraŭ sia volo aŭ eĉ spite al ĝi. Temas nur pri tio, ke se iu ŝtato anticipe devigis sin transdoni sian eventualan estontan konflikton kun alia ŝtato al Internacia Kortumo, ĝi ne plu povas retiri tiun promeson kaj la alia ŝtato povas rekte plendi kontraŭ ĝi. *Sekve, sen libera akcepto de la kompetenteco fare de la ŝtatoj, la Kortumo ne povas juĝi.*

La *proceduraj konsekvencoj* inter la fakultativa kaj deviga kompetenteco estas sufiĉe gravaj. En okazo de fakultativa kompetenteco la afero estas transdonata al la Kortumo per noto enhavanta la kompromison; en okazo de deviga kompetenteco per unuflanka akto (plendo, postulo). En la unua okazo ne ekzistas akuzanto kaj akuzato, kiel en okazo de deviga kompetenteco, sed ambaŭ partioj havas tute saman procesan pozicion. Sekve la skribaj aktoj (*memorando, kontraŭmemorando, repliko*) estas inter la samaj limdatoj transdonataj al la Kortumo fare de la partioj en okazo de kompromiso, dum en la okazo de plendo tiuj dokumentoj estas transdonataj sinsekve: unue la *memorando* de la plendanto, poste la *kontraŭmemorando* de la kontraŭulo, ankoraŭ pli poste la *repliko* de la unua kaj, fine, la *dupliko* de la dua.

La *proceduro* havas du ĉefajn partojn: la skriban kaj la buŝan. La skriba parto konsistas el pluraj aktoj (plendo aŭ kompromiso, memorando, kontraŭmemorando ktp.), en kiuj la partioj eksplikas siajn vidpunktojn, proponas dokumentojn, atestantojn, spertulojn ktp. La buŝa parto konsistas el paroladoj de la partiaj reprezentantoj (agentoj, konsilistoj, advokatoj), el ekzamenado de atestantoj kaj spertuloj, el esplorado de la prezentitaj dokumentoj ktp. Post la finaj paroladoj de la partiaj reprezentantoj, la Kortumo retiriĝas por pridiskuto kaj konsiliĝo. En publika kunsido estas proklamata la verdikto, akceptita per plimulto de voĉoj.

Ĉiuj skribaj aktoj, dokumentoj, ĉiuj paroladoj de la partiaj repre-

zentantoj, la atestoj, la spertulaj opinioj, la verdiktoj kaj la kortumaj ordonoj, ĉio ĉi estas regule presata kaj eldonata de la Kortumo, tiel ke la procesoj havas plej grandan publikecon.

La Kortumo aplikas en sia agado la internacian juron. La artikolo 38 de la Statuto citas la regulojn, kiujn aplikas la Kortumo. Ili troviĝas en la 1) internaciaj kontraktoj, 2) internacia kutima juro, 3) ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de la civilizitaj nacioj. Krome la Kortumo aplikas diversajn antaŭajn juĝajn decidojn kaj la doktrinojn de la teoriuloj, sed nur kiel helprimedon por eltrovi, por konstati la jurajn regulojn. Tamen, se la partioj pri tio konsentas, la Kortumo povas juĝi ankaŭ *ex aequo et bono*, do laŭ la principoj de justeco.

Jen ankoraŭ la ĉefaj principoj de la kortuma proceduro:

1) *Plena egaleco de la partioj* (la institucio de la "juĝisto *ad hoc*" respondas, ekzemple, al tiu principo; estas jam menciite, ke la akcepto de du naciaj lingvoj kiel oficialaj sufiĉe kontraŭas al ĝi).

2) *Libera dispono de la partioj*: la Kortumo juĝas nur pri la asertoj kaj postuloj de la partioj, kiuj estas plene liberaj en la elekto de siaj asertoj kaj postuloj.

3) *Kontraŭdireco*: ĉiu partio havas la eblecon respondi al asertoj, argumentoj kaj postuloj de la alia.

4) *Senpereco*: la proceso rekte evoluas antaŭ la tuta necesa kворumo de la Kortumo aŭ antaŭ la ĉambroj; la juĝistoj senpere ricevas la impresojn.

5) *Publikeco*: regule la procesoj estas publikaj; nur se la partioj tion postulas, aŭ se la Kortumo tion decidas, oni ne allasos la publikon.

La t.n. *esplora aŭ inkvizicia principo*, kiun konas kelkaj juraj sistemoj kaj kiu rajtigas kaj devigas la juĝistaron esplori proprainiciate la faktojn, serĉante la atestantojn, dokumentojn ktp., ne ekzistas en la proceduro de la Internacia Kortumo: ĉiu partio zorgas pri siaj pruvoj.

Tiaj estas, en plej skizaj trajtoj, la organizo kaj funkciado de tiu ĉi grava internacia institucio. La instrumento, kiel oni povas rimarki, estas el jura vidpunkto sufiĉe perfekta. La Kortumo, laŭ sia strukturo, laŭ la reguloj, kiuj ĝin regas, sendube estas kapabla sukcese solvi multajn konfliktojn kaj tiamaniere helpi al konservo de la paco kaj al kvietigo de la spiritoj. De ĝia objektiveco, de ĝia bona volo leviĝi super la ŝtataneco de siaj membroj, multe dependas la konfido, kiun la homaro donos al ĝi. Tiu konfido – sendube eksterjura kategorio – tamen helpas firmigi la aŭtoritaton de la Kortumo kaj de ĝiaj verdiktoj. Sub premo de la publika opinio, la ŝtatoj estos devigataj ĉiam pli submetadi siajn konfliktojn al prijuĝo de la Kor-

tumo kaj konformiĝi al ĝiaj verdiktoj.

Ĝia rolo, tamen, jam hodiaŭ ne estas malgranda. El ĉiuj konfliktoj, kiujn prijuĝis la malnova Konstanta Kortumo de Internacia Justeco kaj la nova Internacia Kortumo, multaj estis ne tro gravaj, sed kelkaj estis fakte tre danĝeraj por la paco. Oni pensu nur al unu el la lastdataj aferoj, kiun prijuĝis la Kortumo, nome al la konflikto inter Britio kaj Albanio pro la t.n. incidentoj en la markolo de Korfu, kaj oni tuj rimarkos ĝian gravecon. Mi ne volas paroli pri la proceso mem, en kiu, dum certa tempo mi havis la honoron pledi kiel advokato-konsilisto, nek pri la jura forto aŭ malforto de la verdikto. Mi deziras nur rimarkigi, ke du britaj militŝipoj estis detruitaj, ke pli ol 40 personoj estis mortigitaj, ke la milita ŝiparo de unu ŝtato sen permeso eniris la teritoriajn akvojn de la alia k.t.p., kio pli frue estus sufiĉa kaŭzo por milito. Tamen ambaŭ partioj submetis la aferon al prijuĝo de la Kortumo kaj tiamaniere ĝi estis likvidita. Nei, do, la gravecon de la Kortumo, ne estus juste.

De la alia flanko oni ne pravas, se oni donas al ĝi tro da signifo en la nunaj cirkonstancoj. Ĝia kompetenteco dependas de la libera volo de la ŝtatoj en konflikto. Se nur unu el tiuj ŝtatoj ne deziras transdoni la aferon al la Kortumo, ĝi ne povas funkcii kaj ne ekzistas juraj rimedoj por devigi tian ŝtaton transdoni la konflikton al la Kortumo. Tial estas antaŭvideble, ke ankaŭ estontece la pli granda parto de la internaciaj konfliktoj, precipe de la plej gravaj, tute ne atingos la Kortumon. Tion oni povas bedaŭri, sed fakte estas tiel, aŭ almenaŭ ŝajnas tiel hodiaŭ.

Le rolon de la Kortumo oni, do, rajtas nek tro taksi nek tro bagateli. Por nun tiu rolo estas ankoraŭ sufiĉe modesta, sed eĉ tia modesta rolo estas tamen tre konsiderinda, ĉar ĝi kontribuas almenaŭ parteton al la grandaj klopodoj konservi la pacon per juraj rimedoj.

ĈAPRITO VII

LA INTERNACIA KRIMO

La ideo pri la kriminala respondeco pro kontraŭjuraj agoj faritaj dum la milito estas relative nova.

En la antikva epoko nek la milito mem estis konsiderata kiel krima, nek kia ajn konduto de la malamikaj partioj unu al la alia kiel kontraŭa al kriminala juro. Ekzistis, kiel menciite aliloke, diversaj reguloj koncerne la formon de proklamado de la milito aŭ koncerne la kontraktadon de la paco; ekzistis reguloj pri la senditoj, pri la traktadoj, ankaŭ pri la milittraktadoj. Sed ĉiuj ĉi reguloj apartenis al ĝenerala internacia juro kaj ne havis karakteron de kriminala juro. Ili ne havis kriminalan sankcion, kaj la personoj, kiuj malobeis al tiuj reguloj, ne povis esti konsiderataj kiel kriminale respondecaj.

En la pli nova tempo, pro la ĉiam pli oftaj kaj ĉiam pli teruraj militoj, unuflanke, kaj pro la kreskanta konsciigo pri la komunaj interesoj kaj pri la nepre necesa solidareco de la homa speco, aliflanke, aŭdiĝis ĉiam pli fortaj voĉoj, postulantaj ne nur la reguligon de la militaj aktivecoj, sed ankaŭ la kriminalan respondecon en okazo de malatento al almenaŭ iuj el tiuj reguloj.

Iom post iom tiuj postuloj eliris el la fermitaj rondo de teoriistoj. Pli larĝaj popoltavoloj ekinteresiĝis pri la demando. Ankaŭ la politikistoj, precipe se iliaj ŝtatoj estis la venkintoj, komencis akcentadi la kriman karakteron de kelkaj agoj de la malamiko. Sed, farante tion, ili samtempe kondamnis sin mem pro la samaj aŭ similaj agoj, kiujn ili faris aŭ faros en la estonteco!

Tiamaniere la ideo pri la kriminala respondeco en la internacia vivo traboradis al si la vojon por fariĝi hodiaŭ unu el la plej gravaj problemoj de la internacia juro.

La unuajn ĝermojn de tiu penso en la moderna senco ni trovas komence de la XIX j.c. Kiam Napoleono, post la famaj "100 tagoj", oficiale rezignis pri la trono, oni proponadis, ke li estu juĝata de angla tribunalo. La Viena Kongreso deklaris, ke Napoleono, pro sia fuĝo de sur la insulo Elbo, "metis sin ekster la civitanajn kaj

sociajn rilatojn". Tamen, la proponita juĝado ne okazis. En Aŭgusto 1815 estis decidite, ke Napoleono devas esti konsiderata kiel militkaptito de Britio, Rusio, Aŭstrio kaj Prusio. Kiel tia, li estis sendita al insulo Skta Heleno.

En la packontraktoj el la epoko antaŭ la Unua Mondmilito oni ofte mencias, ke ĉiuj militkrimoj "estas transdonataj al forgeso". Tiu ĉi klaŭzo klare montras, ke la konscienco de la homaro jam akre ribelis kontraŭ diversaj fiagoj, faritaj dum la milito. „Transdoni al forgeso” signifas fakte pardoni, aŭ, esprimante sin jure, amnestii. Kaj amnestii iun agon oni povas nur en la okazo, se ĝi estas krimo. Amnestiante la militkrimulojn oni implice rekonadis, ke iliaj agoj estis krimaj, ke, do, principe ili povus esti punitaj, sed ke – kutime pro politikaj kaŭzoj – oni pardonis al la kulpuloj. Cetere, nek ekzistis internacia kriminala tribunalo, nek estis antaŭvidita la proceduro por tiaj okazoj.

Post la Unua Mondmilito la aliancaj potencoj sentis sin devigataj okupiĝi ankaŭ pri la demando de la militkrimuloj kaj de ilia punado. En la Versaja Packontrakto (Versailles) estis preskribite, ke Vilhelmo la Dua devas esti metita antaŭ tribunalon, kiu juĝos lin "pro la plej granda malobeco al internacia moralo". Estis antaŭvidite, ke la tribunalo konsistos el reprezentantoj de Francio, Britio, UŜo, Italio kaj Japanio. Sed, kiel konate, Vilhelmo ne estis tiam en la manoj de la Aliancanoj. Jam la 10-an de Novembro 1918 li estis transirinta la nederlandan limon kaj troviĝis en tiu lando. La aliancaj potencoj petis de la nederlanda registaro, ke ĝi transdonu al ili la germanan eksimperiestron, sed Nederlando tion rifuzis. En sia respondo, la nederlanda registaro pravigadis sian nean starpunkton en tiu afero per la nederlanda konstitucio kaj per siaj "jarcentaj tradicioj", laŭ kiuj Nederlando "ĉiam estis rifuĝejo de la viktimoj de internaciaj konfliktoj".

Kritikante la Versajan Kontrakton koncerne tiun punkton, la granda franca internaciisto Le Fur diras: "Tiu artikolo (temas pri la art. 227 de la Versaja Kontrakto, rim. de I.L.) estis tiel kunmetita – oni povus diri intence – ke ĝi ne povu esti aplikita. Ĉar en tiu momento Vilhelmo la Dua estis en Nederlando, la sola maniero por havigi ekstradicion estis agi laŭ la reguloj, kiuj validas por ĝi. La kontraktoj pri ekstradicio antaŭvidas precize difinitajn krimojn, sed ĉi tie oni parolis pri "la plej granda malobeco al internacia moralo"; sekve, ne povis okazi ekstradicio. Ŝajnas, cetere, ke la akceptita teksto estis kompromiso inter tiuj, kiuj ne deziris ke suvereno estu juĝata, kaj tiuj, kiuj deziris puni unu el la ĉefaj respondeculoj ne tiom de la milito mem (kiu tiam ne estis malpermesita de la pozitiva internacia juro), kiom de la malobeco al la leĝoj pri la milito . . ."

Tiamaniere Vilhelmo ne estis juĝata.

Koncerne la aliajn militkrimulojn la Versaja Kontrakto (art. 228) antaŭvidis, ke ili estos juĝataj de milittribunaloj de la aliancanaj potencoj. Subskribante la Versajan Kontrakton, Germanio rekonis tiun rajton al la Aliancanoj. Tamen, ankaŭ tio ĉi restis nur morta litero. Longe oni nenion faris Fine la Aliancanoj postulis de Germanio, ke ĝi mem juĝu kaj punu la oficiojn, kiuj estis kulpaj pro militkrimoj. Fakte, en Germanio okazis kelkaj procesoj, sed ĉiuj kulpuloj estis aŭ liberigitaj aŭ punitaj tute sensignife.

Inter la du mondmilitoj – precipe post la fama Pakto Briand-Kellog, kiu proklamis la militon krimo – ĉiam pli aktualiĝis la demando kiamaniere efike protekti la pacon per rimedoj de kriminala internacia juro. Precipe grava estis la problemo pri kreo de tribunalo por juĝado kaj punado de la militkrimuloj. Kvankam pri tiuj aferoj oni multe diskutis, tamen nenio estis farita sur tiu kampo.

Tiam eksplodis la Dua Mondmilito. La krimoj, faritaj dum la pasinta milito, transpasis ĉion, kion eĉ la plej riĉa fantazio povis imagi. Oni ne nur mortigis homojn. Oni mortigadis ilin sisteme, preskaŭ science. Veraj hombuĉejoj kreigis ĉie tra Eŭropo. Milionoj da senkulpaj estuloj perdis sian vivon en plej teruraj suferoj. Ilia sango ruĝigis la konsciencojn. Iliaj agoniaj vekrioj larmigis la okulojn. Iliaj oferoj postulis justecon!

Ion, almenaŭ ion oni devis fari.

La Aliancanoj plurfoje deklaris – kaj en unuopaj diplomataj notoj kaj en solenaj komunaj dokumentoj – ke ĉiuj militkrimuloj estos juĝataj kaj juste punitaj post la milito.

Jam en la jaro 1943 oni komencis klare distingi du kategoriojn de militkrimuloj.

Al la unua kategorio apartenas tiuj militkrimuloj, kiuj en diversaj landoj, kiel apartenantoj de la okupantaj armeoj, faris diversajn krimojn. Pri ili oni diskutis dum la Moskva Konferenco en Oktobro 1943, kiun partoprenis la ministroj pri eksterlandaj aferoj de UŜoNo, Britio kaj Sovjetunio. En la Deklaracio pri la Respondeco de la Militkrimuloj, akceptita de la menciita Konferenco, estis dirite, ke tiuj germanaj oficioj kaj soldatoj, kaj tiuj membroj de la nazia partio, kiuj estas respondecaj por la sennombraj krimoj, faritaj en la okupitaj teritorioj, estos transdonitaj al la landoj, en kiuj ili agis. Tiuj krimuloj estos juĝataj de la enlandaj ŝtataj tribunaloj. La Moskva Deklaracio rilatas ne nur al la efektivaj farintoj de la militkrimoj, sed ankaŭ al la helpintoj, instigintoj kaj ordonintoj. Ĝi ne koncernas la ĉefajn militkrimulojn, nome tiujn, kies krima aktiveco ne estis ligita al certa teritorio.

La dua kategorio de militkrimuloj estas la grupo de la t.n. „ĉefaj

militkrimuloj". Montriĝis, nome, ke krom la personoj, kiuj rekte estis farintoj de krimoj en la okupitaj teritorioj, ekzistis ankaŭ aliaj personoj, kiuj mem, per siaj propraj manoj, ne pendumadis, ne sufokadis, ne turmentadis, sed kiuj, tamen, estas ĉefe respondecaj.

Pri la krimuloj, apartenantaj al tiu dua kategorio, la Konferenco de Potsdam, okazinta en la j. 1945, decidis, ke ili estos "kiom eble plej baldaŭ transdonitaj al justa juĝado".

Fakte, kelkajn tagojn post tiu decido, la 8-an de Aŭgusto 1945, la reprezentantoj de Britio, UŜo, Sovjetunio kaj de la Provizora Registaro de Francio subskribis apartan "Kontrakton pri la Persekutado kaj Punado de la Ĉefaj Militkrimuloj de la Eŭropaj Aksaj Potencoj". Al la Kontrakto estis aldonita la Statuto de la Internacia Milittribunalo, kiu estis subskribita la saman tagon.

La aktoj de la 8-a de Aŭgusto havas unuarangan signifon por la internacia vivo. Ili markas novan etapon en la evoluo de la internacia juro. Grava branĉo, tiu de la internacia kriminala juro, komencis tiun tagon sian efektivan vivon.

La aktoj de la 8-a de Aŭgusto klare distingas tri kategoriojn de militkrimo. Ĉar unu el tiuj kategorioj nomiĝas "krimo kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito" aŭ mallonge nur "militkrimo", tial estas pli bone nomi la tri kategoriojn per pli taŭga nomo: internacia krimo. Ĝi ampleksas jenajn krimojn:

- a) krimoj kontraŭ la paco,
- b) krimoj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito,
- c) krimoj kontraŭ la homeco.

a) Al la unua kategorio, nome al la *krimoj kontraŭ la paco*, apartenas diversaj krimaj aktivecoj, ekz. la planado, preparado aŭ instigado al atakmilito (agreso), aŭ al milito, per kiu oni rompas la internaciajn kontraktojn, interkonsentojn aŭ garantiojn. Estas konsiderata kiel krimo kontraŭ la paco ne nur la agreso mem, sed ankaŭ ĉiu ajn partoprenado en la komplotoj por ĝia realigo.

Kiel oni vidas, ne ĉiu milito estas konsiderata kiel krima. Nur la atakmilito (agreso) estas jure krima, nur ĝi estas malpermesita de la internacia juro kaj la malobeo al tiu malpermeso estas kriminale sankciita. Tio estas klara per si mem: justa, defenda milito, nome milito farata por sin defendi kontraŭ la agreso, ne povas esti konsiderata kiel krima. Ĝi tute ne estas malpermesita.

Ke la agreso estas internacia krimo, pri tio, do, hodiaŭ ne povas ekzisti ia ajn dubo. Tio estas simpla kaj komprenebla por ĉiuj. Pli malfacile prezentiĝas la afero, se oni volas precize difini la signifon de la vorto "agreso". Kelkaj agoj sendube kaj evidente estas "agreso". Neniu povas dubi, ekzemple, ke la nazia Germanio estis la agresanto en la pasinta milito. Sek ekzistas ankaŭ situacioj, en

kiuj oni malfacile povas diri, kiu fakte estas la agresanto. En la teorio oni provis doni multajn difinojn, sed ĝis nun neniu plene kontentigis. Tial, almenaŭ provizore, oni devos kontentiĝi per la utiligo de la granda literaturo pri tiu demando, per la spertoj de la estinta Ligo de Nacioj, per la procesmaterialoj de Nürnberg kaj de Tokio, eventuale ankaŭ per aliaj rimedoj por decidi en ĉiu konkreta okazo, ĉu temas pri agreso aŭ ne.

b) Tute egale ĉu temas pri malpermesita milito (agreso) aŭ pri permesita, la milito devas esti gvidata laŭ certaj principoj kaj reguloj. La malobeo al la plej gravaj el tiuj reguloj – eĉ se temas pri permesita milito – estas konsiderata hodiaŭ kiel aparta krimo. Tiu krimo, nomata kutime "*militkrimo*", rilatas al ĉiuj agoj faritaj kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito. Temas precipe pri agoj, kiujn malpermesis la Kvara Haga Konvencio de la j. 1907 kaj ĝia Aldona Regularo. La Statuto de la Milittribunalo mencias, kiel ekzemplojn, nur kelkajn el ili: mortigo, turmentado aŭ sendado al devigaj laboroj de la civila loĝantaro en la okupitaj landoj; mortigo aŭ turmentado de la militkaptitoj; rabado de la privata aŭ publika havaĵo; superflua detruado de urboj, lokoj kaj vilaĝoj; ruinigoj, kiuj ne estas pravigeblaj per la bezonoj de la milito.

c) Al la tria kategorio de la internacia krimo apartenas la *krimoj kontraŭ la homeco*. La unuopaj krimoj de tiu kategorio estas tre multnombraj. La mortigo, la ekstermado, sklavigado aŭ disloĝigado de la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito estas, ekzemple, krimo kontraŭ la homeco. Ankaŭ la persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj apartenas al tiu kategorio de internacia krimo, se tiuj agoj estas faritaj en kunligiteco kun kiu ajn alia internacia krimo.

Kvankam la unuopaj internaciaj krimoj povas esti faritaj ankaŭ antaŭ la milito aŭ ekster ĝi (ekz. la planado de la agreso, aŭ la persekutoj pro politikaj kaŭzoj), tamen ĉiu el tiuj agoj, por ke ĝi estu krima, devas esti iamaniere ligita al la milito. Tio estas grava manko, precipe kiam temas pri la krimoj kontraŭ la homeco. Tial en la lastaj jaroj oni multe klopodis protekti la homan personon per efikaj juraj rimedoj ankaŭ ekster la kadroj de la ĵus prezentita internacia krimo. Pri tiuj klopodoj ni parolos en la sekvanta ĉapitro.

En la Statuto de la Internacia Milittribunalo troviĝas tre grava artikolo pri la *krimaj organizaĵoj*. La Tribunalo povas konstati, ke iu organizaĵo aŭ grupo havas kriman karakteron. En tiu okazo ĉiuj apartenintoj al tia organizaĵo povas esti juĝataj de la naciaj (enlandaj) tribunaloj pro la nura aparteno. Antaŭ la juĝisto tia akuzito devos pruvi, ke li mem, kvankam li apartenis al la organizaĵo, tamen ne faris krimajn. Anstataŭ ke la prokuroro pruvu la kulpecon de la akuzito, tiu ĉi, do, devos pruvi sian senkulpecon. Cetere, la ideo pri

la krimala respondeco de organizaĵoj estas sufiĉe moderna. En la teorio ĝi havas multajn kontraŭulojn kaj estas sufiĉe dubinde, ĉu ĝi povos plue evolui en la praktiko.

Kiel konate, la unua granda proceso kontraŭ la ĉefaj militkrimuloj okazis en Nürnberg. Ĝi komenciĝis la 20-an de Novembro 1945 kaj finiĝis kelkajn monatojn poste per verdikto, kiu kondamnis la plej grandajn krimulojn al mortopuno. Simila proceso okazis ankaŭ en Tokio.

Dum la procesoj la akuzitoj havis la plej larĝajn eblecojn de defendo. La procesoj estis publikaj, kaj la tuta mondo havis la okazon prijuĝi la korektecon kaj la justecon de la afero.

En ĉiuj procesoj la akuzitoj, interalie, provis senkulpigi sin per la argumento, ke iliaj agoj ne estis malpermesitaj laŭ interna jura ordo de iliaj ŝtatoj. La verdiktoj montras, ke la internacia leĝo estas supera al la interna jura ordo. Se la internacia juro proklamas iun agon krima, tiam la interna jura ordo de kiu ajn ŝtato ne povas ĝin deklari permesita. En tiu rilato la verdiktoj havas ankaŭ grandegan teorian signifon. Ili pravigas la starpunkton de tiuj teoriistoj, kiuj opinias la principojn kaj regulojn de la internacia juro superaj al la diversaj internaj juraj sistemoj.

La morala signifo de la procesoj estas grandega. Kvankam la punado de la internaciaj krimuloj per si mem sendube ne malaperigos la militojn, tamen ĝi estas grava kontribuaĵo al la paco. Ankaŭ en la internacia juro – kiel, cetere, en ĉiuj juraj branĉoj – la timo pro la sankcioj estas la komenco de la sagaco kaj singardemo. Ĝi povas influi la ŝtatgvidantojn bone pripensi antaŭ ol efektiviĝi novan agresan militon, kiu hodiaŭ estas malpermesita de la pozitiva internacia juro.

Ankaŭ el alia vidpunkto la procesoj estas tre gravaj. La materialoj publikigitaj dum la procesoj montras klare, ke la akuzitoj estis plene konsciaj pri la krimeco de siaj agoj. Ili estis ne nur preparintaj ĝis la plej etaj detaloj la agreson kaj la diversajn fiagojn, sed ili estis ankaŭ ellaborintaj tre precizajn instrukciojn por kaŝi tiujn agojn. Laŭ tiuj instrukcioj, ĉiu el la faritaj krimoj devis esti pravigota aŭ kiel hazardo, aŭ kiel represalo, aŭ ĝi devis esti, tute simple, neata. La krimuloj, do, bone sciis, ke iliaj agoj estas malpermesitaj laŭ la internacia juro, precipe laŭ la ĝeneralaj juraj principoj, rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj. Ĝuste tial ili klopodis kaŝi aŭ nei sian kriman aktivecon. Ili certe esperis, ke ankaŭ ĉifoje oni "transdonos al forĝeso" iliajn krimojn, sed ili eraris. La unuan fojon en la historio de la homaro ŝtatgvidintoj estis juĝataj de kompetenta tribunalo pro la internaciaj krimoj, kiujn ili faris ĝuste kiel ŝtatgvidantoj.

Dum kaj post la procesoj aŭdiĝis opinioj, ke la juĝado ne estis

esprimo de jura koncepto, sed rezulto de perforto, de politika oportuno, de venĝo fare de la venkintoj. Oni riproĉis, ke ne ĉiuj internaciaj krimuloj estis juĝataj, ke ankaŭ ĉe la alia flanko estis farataj diversaj krimoj kaj ke ne estas juste kondamni nur unujn, dum la aliaj restas netuŝataj.

Sendube, la fakto ke la Aliancanoj venkis en la pasinta milito, ebligis la areston de la akuzitoj kaj ilian transdonon al la tribunalo. Sen la venko, la punado, evidente, ne estus ebla. Sed tiu ĉi fakto per si mem ne forprenas al la juĝado ĝian plenan juran karakteron. La fakto, ke kiu ajn krimulo estas fizike kaptita kaj transdonita al justeco ne forprenas de liaj krimoj la juran karakteron de krimo! La juĝado estis bazita sur la principoj kaj reguloj de la internacia juro. Temis pri proceso en vera senco de la vorto pro agoj, klasifikitaj de la internacia juro kiel krimoj.

Ankaŭ la aliaj riproĉoj estas senbazaj. La justeco postulas, ke la krimuloj estu punitaj. Se ne ĉiuj krimuloj povas esti juĝataj kaj punitaj, tio, tamen, ne povas liberigi de juĝado kaj punado tiujn, kiuj troviĝas je dispono de la tribunalo. Bele aspektus la kriminala juro de kiu ajn lando, se ĉiu krimulo povus sin senkulpigi per la argumento, ke ekzistas aliaj krimuloj, kiuj ne estas juĝataj!! Se estus tiel, la tuta kriminala juro perdus sian sencon. La farinto de la krimo devas esti punita, ĉar li faris la krimon. Li devas esti liberigita, se li ne faris ĝin. Sed li ne povas resti senpuna sub la preteksto, ke "ankaŭ aliaj faris samajn krimojn"!

Tamen, la problemoj de "tiuj aliaj" ekzistas. Ĝi estas unu el la grandaj problemoj de la nuntempa internacia vivo. Sed la senco de tiu problemoj ne estas: kiel liberigi de la puno la kaptitajn internaciajn krimulojn pro la pseŭdoargumento, ke ankaŭ "aliaj faris samajn krimojn". Ĝia senco estas tute alia, nome: kiamaniere atingi, ke ne nur la venkitaj krimuloj estu juĝataj; kiamaniere juĝi kaj puni ne nur la ŝtatgvidantojn, kiuj faris internaciajn krimojn, sed ankaŭ tiujn el la ŝtatgvidantoj, kiuj estas respondecaj pro tiaj agoj.

Problemo, eble, entute nesolvebla por la momento!

Unu afero, tamen, estas certa: la koncepto de la internacia krimo hodiaŭ estas firme formita en la internacia juro kaj en la jura scienco. La personoj, kiuj, elŭzante la ŝtatan potencon, volis detrui la liberecon, la justecon, la homecon estis kondamnitaj en la nomo de la libereco, justeco kaj homeco. Ĝi estas forta admono al ĉiuj politikaj respondeculoj, al ĉiuj ŝtatgvidantoj. Morgaŭ ili povos esti la venkintoj. Kaj tiam oni eble juĝos iliajn agojn laŭ la samaj principoj, kiujn ili mem rekonis kiel jure validajn en la nuntempa interŝtata vivo.

Esti juĝanta signifas samtempe – almenaŭ iusence – esti juĝata!

ĈAPRITO VIII

LA FUNDAMENTAJ HOMAJ RAJTOJ KAJ ILIA JURA PROTEKTO

La 10-an de Decembro 1948 la Ĝenerala Asambleo de U.N. akceptis en Parizo la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj.

La tutmonda gazetaro kaj ĉiuj radiostacioj de la terglobo registris tiun ĉi gravan akiraĵon de la homo en lia lukto por la libereco. En parlamentoj kaj en popolkunvenoj, en universitatoj kaj en fabrikoj, ĉie, sur ĉiuj kvin kontinentoj, la amasoj sopirantaj liberecon, trankvilon kaj pacon arde salutis la historian akton. Profundaj pensuloj – filozofoj kaj sciencistoj – dediĉas al ĝi sian intelektan aktivecon; ĵurnalistoj kaj verkistoj klopodas ĝin diskonigi; profesoroj, instruistoj kaj edukistoj analizas ĝin antaŭ la studentoj kaj lernantoj. La teksto mem de la Deklaracio estis oficiale aŭ neoficiale publikigita aŭ disaŭdigita en preskaŭ ĉiuj ekzistantaj lingvoj. Ĝi aperis en sciencaj revuoj, en taggazetoj, en broŝuroj kaj flugfolioj. Tutaj ekspozicioj estis kaj estas aranĝataj por ĝin popularigi. Hodiaŭ ne troviĝas iom pli klera homo, kiu ne estus aŭdinta almenaŭ iom pri tiu vere signifa dokumento.

La Universala Deklaracio havas tute apartan valoron por la Esperanto-movado. Fakte, la Internacia Lingvo estas, interalie, esprimo de la ideo pri rasa, nacia, religia kaj, konsekvence, lingva egaleco. Tial ĝi povas prosperi nur en kondiĉoj de plena kaj efektiva respekto al esencaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de la homo. Kaj movado, celanta ĝian disvastigon, ne povas ne subteni almenaŭ morale ĉiujn strebadojn, kiuj kondukas al tiuj favoraj kondiĉoj.

La graveco de la Universala Deklaracio por ĉiu el ni kiel homoj kaj aparte por ĉiu el ni kiel adeptoj kaj uzantoj de la Internacia Lingvo estas pli ol evidenta. Ne estos, do, neinterese pritrakti la problemon iom pli detale, des pli ke, kvankam la teksto de la Deklaracio estas vaste konata, multe malpli estas konataj ĝiaj vera signifo kaj praktika atingopovo.

1) *Iom da historio*

Por kompreni pli bone la Universalan Deklaracion, estas necese ĵeti almenaŭ suprajn rigardon al la ĉefaj dokumentoj, proklamintaj la homajn rajtojn kaj la fundamentajn liberecojn en la pasinteco.

La historio de la deklaracioj pri la homaj rajtoj komenciĝas kun la lukto de la kreskanta kaj fortiĝanta burĝaro kontraŭ la feŭda absolutismo. La feŭda ekonomia kaj socia sistemo, bazita sur jure rekonitaj privilegioj de pugno da terposedantoj, venis en konflikton – historie kondiĉitan, cetere – kun la novaj ekonomiaj kaj sociaj fortoj, ekĝermintaj kaj poste ekflorintaj en la urboj. Por konservi la tiaman sociordon, konvenan por la reganta feŭda klaso, sed tute nekonforman al la novaj formoj de industria produktado, la politika potenco de la feŭda ŝtato estis devigata apliki ĉiam pli drastajn, ĉiam pli absolutismajn metodojn. Tio pliakrigis la premon kontraŭ la amasoj, sed – kiel ĉiam – tio ankaŭ plifortigis la reziston de la popolo, antaŭ ĉio de la burĝaro. Ĝi ne plu kontentiĝis pri nura duaranga partopreno en la ŝtata potenco, pri nura divido de la potenco kun la nobelaro. Ĝi ekpostulis la nuligon mem de la feŭda ŝtato, de ĉiuj privilegioj, de ĉiuj malegalecoj. La burĝaro volis havi la ŝtaton en siaj propraj manoj por povi, pere de ĝi, krei tian socian kaj juran ordon, kiu respondos al la nova ekonomio.

En tiu giganta lukto inter la mortanta feŭdismo, ĉepinte kun la reĝo, kaj la subpremataj popolamasoj ĉefrunte kun la burĝaro, batalis ankaŭ la ideoj. Unuflanke troviĝis la "tradiciaj rajtoj kaj privilegioj", defendataj de la teoriistoj de feŭdismo; aliflanke estis la idealo de libereco kaj egaleco de ĉiuj homoj, pritraktata de la progresemaĵ pensuloj.

La deklaracioj de la homaj rajtoj estis kondiĉitaj de la materia evoluo de la socio, preparitaj de la filozofio kaj scienco, akiritaj per akra batalado kontraŭ la tro rigida kaj tro kruela ŝtata potenco. Estas interese rimarkigi, ke la rekonado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj ĉiam okazis dum aŭ post sukcesaj revolucioj, popolleviĝoj, ribeloj aŭ liberigaj militoj. Ilia proklamado servis por levi la moralon de la amasoj, por doni al ili novan esperon, ke post la venko realiĝos pli justa socia ordo. Foje proklamitaj en formo de solenaj deklaracioj, ili fariĝis saltobreto por atingo de pluaj liberecoj kaj por plilarĝigo de la malnovaj. Aliflanke, ofte piedpremataj de la novaj regantaj rondoj, ili estis kaj estas utiligataj kiel ideologia armilo por restarigo de libereco kaj justeco. La batalo ankoraŭ ne finiĝis!

Ĉirkaŭ unu jarcenton antaŭ la fama Deklaracio, proklamita de la Franca Revolucio, la *angla parlamento* sukcesis venkigi kelkajn

fundamentajn homajn kaj civitanajn rajtojn. En la jaro 1688 ĝi detronigis Jakobon la Duan kaj tuj voĉdonis la konatan "Deklaracion pri Rajtoj", kiun devis akcepti la nova reĝo Vilhelmo la Tria. La Deklaracio antaŭ ĉio proklamis, ke la reĝeco kaj la reĝa potenco ne havas siajn radikojn en la dia ordono aŭ en la t.n. dieca juro, sed ke ĝi estas konsentita rajto, kiun, sekve, oni povas repreni, se la reĝo uzurpas pli da potenco ol oni donis al li. La aliaj punktoj de la Deklaracio kontentigis la postulojn pri liberecoj kaj garantioj, por kiuj la Angloj luktis dum jarcentoj. Temis pri la perioda kunvenado de la parlamento, pri la voĉdonado de la impostoj kaj leĝoj, pri la rajto je petskribo, pri certaj garantioj en la juĝado.

La 4-an de Julio 1776. le reprezentantoj de *Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko*, kiuj estis leviĝintaj kontraŭ la metropolo por plena sendependiĝo, akceptis ĉiuvoĉe en la kongreso la "Deklaron pri Rajtoj". Tiu ĉi Deklaro enhavis la aserton, ke "la Unuiĝintaj Kolonioj estas kaj havas la rajton esti ŝtatoj liberaj kaj sendependaj". En la jaro 1791 estis akceptitaj 10 amendamentoj, kiuj estas ĝenerale konsiderataj kiel parto de la Konstitucio. La unua amendamento entenis la kvar klasikajn liberecojn, nome la liberecon de religio, de preso, de parolo kaj de unuiĝo. La kvara amendamento parolis pri la netuŝebleco de la privata, hejma vivo, dum la kvina amendamento enhavis garantiojn pri korekta juĝado. Poste estis aldonitaj al la menciitaj 10 amendamentoj, tri novaj. En la jaro 1865-a estis malpermesita la sklaveco kaj la servuto; la amendamento de la jaro 1868 difinis la kvaliton de amerika civitano kaj malpermesis al la unuopaj ŝtatoj de la Federacio mallarĝigi aŭ limigi la rajtojn, ligitajn al tiu ĉi kvalito; fine, en la jaro 1870, estis jure rekonita la egaleco de ĉiuj rasoj koncerne la voĉdonan rajton.

Sub la influo de la progresemaĵoj filozofoj de la 18-a j.c., inspirita precipe de la penso de Montesquieu kaj de la liberecaj ideoj, entenitaj en la angla kaj usona deklarioj, la franca Konstitucia Asambleo voĉdonis en Aŭgusto 1789 la gloran Deklaracion pri la Rajtoj de la Homo kaj Civitano.

La Deklaracio proklamis la liberecon kaj juran egalecon de la homoj (art. 1). La celo de ĉiu politika komunajo estas la konservo de la naturaj rajtoj de la homo, nome de la libereco, propraĵo, sekureco kaj rezisto kontraŭ la subpremo (art. 2). Por ke la ŝtato povu plenumi bone tiun taskon, la suvereneco apartenas al la tuta nacio (art. 3). La Deklaracio difinis la koncepton pri libereco: ĝi konsistas en la ebleco fari ĉion, kio ne malutilas al la aliaj. Sekve, la realigo de la naturaj rajtoj fare de ĉiu homo havas nur tiujn limigojn, kiuj certigas al la aliaj membroj de la socio la ĝuadon de tiuj samaj rajtoj. La limigoj povas esti fiksitaj nur de la leĝo (art. 4).

En la kreado de la leĝoj rajtas partopreni ĉiuj civitanoj ĉu rekte ĉu pere de la elektitaj reprezentantoj, ĉar – laŭ la Deklaracio – la leĝo estas esprimo de la ĝenerala opinio. La leĝo devas esti sama kaj egala por ĉiuj. Estante egalaj antaŭ la leĝo, ĉiuj civitanoj havas egalan rajton je ĉiuj dignoj, postenoj aŭ publikaj oficoj en la ŝtato. La sola mezurilo por atingi ilin estas la civitanaj virto kaj kapablo (art. 6). La Deklaracio starigis plurajn principojn pri la persona sekureco kaj korekteco de juĝado. Ĝi antaŭvidis, ke oni povas esti akuzata aŭ arestata nur en la kazoj fiksitaj de la leĝo kaj laŭ la formoj preskribitaj de ĝi (art. 7). Neniu povas esti punita krom surbaze de leĝo, akceptita kaj publikigita antaŭ la faro de la krima aŭ delikta ago (art. 8).

La artikoloj 10 kaj 11 proklamis la liberecon de religia konscienco, de la penso kaj de opinio. Ĉiu homo rajtas libere paroli, skribi kaj presigi ĉion, kion li deziras.

La franca Deklaracio opinias, ke por garantii la rajtojn de la homo kaj civitano estas necesa publika forto. La publika potenco, do, estas kreita por la avantaĝo de ĉiuj kaj ne por la privata utilo de tiuj, al kiuj ĝi estas donita. La publika potenco, kreita en la intereso de la homaj rajtoj, postulas materiajn rimedojn por sia ekzisto. Tial la civitanoj devas kontribui proporcie al sia riĉeco por ĝin vivteni (art. 13). Unu el la gravaj rajtoj de la civitanoj estas decidi pri la impostoj (art. 14).

Estas interese rimarkigi, ke la artikolo 16 de la Deklaracio insistas pri tio, ke ŝtato en kiu la garantioj de la homaj rajtoj ne estas sekurigitaj kaj en kiu la malkunigo de la 3 povoj (leĝdona, plenuma kaj juĝa) ne estas difinita, ne havas konstitucion.

Fine, la Deklaracio proklamas la proprajn sankta kaj netuŝebla rajto. Neniu povas esti senigita de sia propraĵo krom en okazo de publika neceso, sub kondiĉo de justa kaj anticipa kompenso.

Kiel oni vidas, la franca Deklaracio proklamas, ke la *suvereneco* apartenas al la nacio. Laŭ la malnova, feŭda-absolutisma koncepto, la suvereneco apartenis al la reĝo. Ĝi rekonas du kategoriojn de *liberecoj*: la moralajn liberecojn kaj la fizikajn liberecojn. La moralaj liberecoj estas la libereco de penso kaj de opinio, la libereco de religia aparteno, la libereco de parolo kaj la libereco de preso. La fizikaj liberecoj konsistas en libereco de cirkulado kaj en la malpermeso esti senkaŭze arestita aŭ turmentata. Por certigi la *sekurecon* de la civitanoj, la Deklaracio starigis la faman principon *nullum crimen sine lege, nulla poena sine lege*, nome la principon, ke ne ekzistas krimo, se ĝi ne estas kiel tia antaŭvidita en la leĝo, kaj ke neniu povas esti punita per punoj pli severaj ol la preskribitaj de la leĝo en la momento de la ago. La *civitanaj rajtoj* estas la rajtoj je

propaĵo, egaleco antaŭ la leĝo, partopreno en la leĝdona funkcio, principa alireblo al ĉiuj publikaj oficoj. *Por garantii* la menciitajn liberecojn kaj rajtojn, la Deklaracio starigis la principon de la mal-kunigo, de la disiĝo de la ŝtata potenco je tri funkcioj. Krome, la Deklaracio rajtigis la civitanojn ribeli, se la rajtoj de la homo kaj de civitano ne estas observataj.

La Deklaracio estis metita en la komencon de la franca Konstitucio de la jaro 1791. Poste ĝi servis kiel modelo por aliaj deklaracioj pri homaj rajtoj, kiuj, paralele kun la disvastiĝo de la demokratio kaj kun la faligo de feŭdismo en diversaj landoj de Eŭropo kaj de la cetera mondo tra la tuta 19-a kaj 20-a j.c., estis akceptataj kaj proklamataj ĉu en formo de apartaj deklaracioj, ĉu simple per enmeto en diversajn konstituciojn. La rajtoj kaj liberecoj entenitaj en la franca Deklaracio estis jen pliampleksitaj, jen mallarĝigitaj, jen pliprecizigitaj en tiu aŭ alia interna jura sistemo, sed esence ĉiam temis pri tiuj samaj individuecaj liberecoj kaj rajtoj, kiuj tiamaniere fariĝis tipaj kaj klasikaj.

Estas, cetere, menciindaj du gravaj faktoj:

A) La liberecoj kaj rajtoj formulitaj en la franca Deklaracio havis sendube profundan revolucion, progreseman signifon en la epoko, kiam ili estis proklamitaj, sed kun la tempo ili perdis sian valoron, ĉar la ekonomia evoluo postulis kaj novajn garantiojn por ilia fakta realigo, kaj aldonon de novaj rajtoj kaj liberecoj al la jam proklamitaj, kaj la ŝanĝon de kelkaj liberecoj, kiuj en la praktiko montriĝis, vere, liberecoj por unuj, sed katenoj por la aliaj. La pliparto de la akiritaj klasikaj liberecoj, kiuj kompare kun la feŭda servuteco signis grandan paŝon antaŭen, estis fakte ĝueblaj nur de tre malmultaj homoj, dum por la amasoj ili estis tute aŭ grandparte nur iluziaj. Al kio, ekzemple, povas servi la principo pri la libereco de penso, de parolo, de kunvenado, de preso, de cirkulado k.t.p., se la materiaj rimedoj, necesaj por la efektiva realigo de tiuj liberecoj, troviĝas en la manoj de tute mallarĝa popoltavolo, dum la amasoj ne disponas pri ili? Al kio povas servi la formala rajto partopreni en la ŝtata potenco, se manko de plej necesaj vivrimedoj, manko de kulturo kaj klereco fakte malebligas la realigon de tiu rajto? Por homo malriĉa, senlabora, socie neasekurita, sen la plej elementa klereco, la proklamitaj liberecoj kaj rajtoj estis tro abstraktaj kaj formalaj! Li povis eventuale fieri pri ili, sed konkretigi ilin li ne povis.

Tial aŭdiĝis ĉiam pli energiaj postuloj por la rekonno de aliaj – sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj – rajtoj, kiel ankaŭ por la dono de efektivaj, materiaj garantioj por ilia realigo.

Tiuj novaj rajtoj, liberecoj kaj garantioj estis unue formulitaj en

la *sovjeta interna ordo* post la Oktobra Revolucio de la j. 1917. Same kiel la franca Deklaracio unue proklamis la principon de nacia suvereneco, tiel same la Deklaracio pri la Rajtoj de la Popoloj de la 17-a de Novembro 1917 proklamis la principon de *suvereneco de la popolo*. Ĝi enhavis jenajn punktojn: 1) suverena egaleco de ĉiuj popoloj, 2) rajto je ekŝiĝo el la unueca ŝtato kaj kreo de plene sendependa ŝtato, 3) nuligo de ĉiuj privilegioj, bazitaj sur la religia aŭ nacia aparteno, 4) libera evoluo de la naciaj malplimultoj. La principo pri egaleco de ĉiuj nacioj kaj rasoj estis poste formulita ankaŭ en la sovjeta Konstitucio de la j. 1936 (art. 123). La *novaj, t.n. sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj rajtoj*, estas la rajtoj je laboro, ripozo, materia sekureco en okazo de maljuneco, malsano aŭ perdo de la laborkapablo, la rajto je grupiĝo en sociaj organizaĵoj (sindikatoj, klerigaj, sportaj, junularaj kaj aliaj asocioj) kaj la rajto je senpaga edukiĝo en ĉiuj lernejoj. La principo de egaleco inter la viro kaj virino sekvigis la rekonon de apartaj rajtoj al virinoj gravedaj kaj havantaj malgrandajn infanojn.

La menciitaj novaj rajtoj estas preskribitaj en la artikoloj 118–123 de la Konstitucio de la 5-a de Decembro 1936. En la sama Konstitucio troviĝas la klasikaj liberecoj, nome, la libereco de konscienco, parolo, preso, kunvenoj, procesioj kaj demonstracioj, netuŝebleco de la persono, netuŝebleco de la hejmo kaj de la privata vivo, sekreto de la korespondaĵoj (art. 124–128). Fine, la art. 129 antaŭvidas la rajton je azilo por la personoj, kiuj serĉas rifuĝon en Sovetunio.

B) Alia grava fakto, kiun ni konsideras nepre menciinda, estas, ke la homaj rajtoj formale rekonitaj en pli aŭ malpli alta grado, en tiu aŭ alia formo, tre ofte estis tute malatentataj de la regantaj rondoj. La samaj rajtoj, same formale rekonitaj en pluraj internaj juraj ordoj, havis alian aplikon en unu lando kaj tute alian aplikon en alia lando. Depende de la fakta fortorilato inter la ŝtata potenco kaj la popolo, tiuj rajtoj estis – senkonsidere al la materia ebleco ilin efektiviĝi – pli aŭ malpli realigeblaj, aŭ eĉ absolute nerealigeblaj. En multaj landoj la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, solene proklamitaj en deklaracioj aŭ en konstitucioj, estis fakte piedpremataj de la ŝtata aparato. Ofte ili estis kaj estas nur bela ornamaĵo, utiligata grandskale por propagandaj celoj.

2) *Klopodoj sur internacia kampo*

La fakto, ke en multaj regionoj de la terglobo la homaj rajtoj ne estis rekonitaj, ke en aliaj regionoj, kie ili estis formale rekonitaj, ili ne estis observataj, starigis la demandon kiamaniere garantii efike

la plenan realigon de la homaj rajtoj en la tuta mondo. Aŭdiĝis postuloj pri *internacia garantio* de la homaj rajtoj kaj liberecoj.

Sur tiu ĉi vojo la *Berlina Kontrakto* de la jaro 1878 signas la unuan provon protekti la homajn rajtojn per la internacia juro. Tiu ĉi kontrakto, kiel konate, rekonis Serbion, Rumanion kaj Montenegron kiel sendependajn ŝtatojn kaj ĝi kreis Bulgarion kiel princlandon. La *Berlina Kontrakto* postulis de la menciitaj landoj, kiel antaŭkondiĉon de tiu rekono, ke ili respektu kelkajn fundamentajn rajtojn: la liberecon de religio, la principon de samaj politikaj rajtoj por ĉiuj civitanoj senkonsidere al ilia religia aparteno, la juran egalecon de ĉiuj loĝantoj senkonsidere al ilia raso aŭ religio.

Post la Unua Mondmilito estis kreitaj kelkaj novaj ŝtatoj en centra Eŭropo kaj sur Balkano. La *packontraktoj* devigis tiujn ŝtatojn garanti en siaj konstitucioj kelkajn gravajn rajtojn de la naciaj malplimultoj. Tiamaniere la personoj, apartenantaj al la naciaj malplimultoj, havis la protekton de la internacia juro koncerne tiujn fundamentajn homajn rajtojn kaj liberecojn.

Sur la kampo de internacia protekto estas menciindaj ankaŭ la *Konvencioj de la Ruĝa Kruco* kaj la t.n. *Hagaj Konvencioj* de la jaro 1899 kaj 1907. Tiuj konvencioj, celantaj humanigi la militojn, devigis la militantajn ŝtatojn respekti ĝis certa grado la homan personecon. Temis precipe pri la vunditoj, militkaptitoj kaj la civila loĝantaro.

La *Pakto de la Ligo de Nacioj* nur malrekte kaj tre singardeme aludis al la homaj rajtoj. Ĝi antaŭvidis, ke la ŝtatoj, membroj de la Ligo de Nacioj, klopodos certigi justajn kaj homecajn laborkondiĉojn. Krome, la Pakto devigis la subskribintojn juste traktadi la indiĝenan loĝantaron en la regionoj, kiuj troviĝis sub ilia administrado. Fine, la artikolo 22 de la Pakto, kiu koncernis la teritoriojn sub mandato, menciis nur tute abstrakte, ke la bona farto kaj la evoluo de la popoloj sub mandato formas "sanktan mision de la civilizo".

Ĝi estis ĉio, kion antaŭvidis la Pakto de la Ligo de Nacioj sur la kampo de internacia protekto de la homaj rajtoj.

Tial en la Ligo de Nacioj plurfoje aŭdiĝis seriozaj voĉoj, kiuj postulis efektivan internacian protekton de la homaj rajtoj. La XIV-a kunveno de la Asambleo pridiskutis la problemon kaj precipe la demandon pri juraj sankcioj, sed ĝi nenion konkludis.

En la Ligo de Nacioj oni, same tiel, postulis, ke la reĝimo pri la protekto de la naciaj malplimultoj – reĝimo, kiun devis akcepti nur kelkaj ŝtatoj – estu universale larĝigita, tiel ke ĝin apliku ĉiuj ŝtatoj. Du seriozaj argumentoj estis akcentataj favore al tiu solvo. Unue, la principo de egaleco postulis, ke ĉiuj ŝtatoj, membroj de la Ligo, havu samajn devojn. Due, la plej elementa justeco necesigis, ke ĉiuj

malplimultoj havu samajn rajtojn, tute egale en kiu ŝtato ili vivas. Temis pri gravaj rajtoj je vivo, konscienco kaj libereco, kaj vere ne estis kompreneble kial tiujn rajtojn havus la nacia malplimulto A en ŝtato B, sed ne havus ilin la nacia malplimulto B en ŝtato A.

Malgraŭ la logikeco kaj justeco de tiuj postuloj, ili tamen ne estis realigitaj en la kadro de la estinta Ligo de Nacioj. Ĉiuj ĉi provoj plene malsukcesis.

La afero tre interesis ankaŭ la rondojn de sciencistoj kaj filozofoj. Tiel, ekzemple, la *Instituto de Internacia Juro* okupiĝis pri la problemoj en la jaro 1921 dum la kunveno de Romo. Ĝi pridiskutis la Deklaracion pri la Rajtoj kaj Devoj de la Nacioj, ellaboritan en la jaro 1916 de la Amerika Instituto de Internacia Juro. La Instituto kreis apartan komisionon, kiu havis la taskon pristudi la internacian protekton de la homo, de la civitano kaj de la malplimultoj. Surbaze de la laboroj, plenumitaj de la komisiono, la Instituto fine akceptis en sia kunveno de New York, la 12-an de Oktobro 1929, la t.n. Deklaracion de Internaciaj Rajtoj de la Homo. Kvankam ĝi ne havis ian ajn devigan karakteron, tamen ĝia signifo estis granda. Ĝi formulis la sopirojn de milionaj amasoj kaj ĝi estis esprimo de la jura penso de la plej grandaj sciencistoj en la tiama mondo. Tial ĝi havis grandan moralan forton. Cetere, la Deklaracio estis la sola tiaspeca akto, kiu havis universalan karakteron antaŭ la Deklaracio de la 10-a de Decembro 1948.

3) *La Homaj Rajtoj kaj la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj*

Komence de la jaro 1933 Hitler kaj la nazioj ekregis Germanion. Komenciĝis unu el la plej mallumaj periodoj de la homara historio. Ĉiuj homaj rajtoj kaj la plej elementaj liberecoj estis nuligitaj. Sennombraj krimoj kontraŭ la internacia juro, precipe kontraŭ la ĝeneralaj juraj principoj, komunaj al ĉiuj civilizitaj popoloj, viciĝis unu post la alia kaj grandiĝis de tago al tago. Eĉ la plej malmola homa konscienco estis skuita. Profunda indigno disvastiĝis tra la mondo. La plej grandaj pensuloj levis sian protestan voĉon. Tamen, neniam efikaj mezuroj estis entreprenitaj por malhelpi la naziojn en ilia kontraŭhomeca agado.

Nur la atakmilito, kiun komencis Hitler en la jaro 1939, malfermis perspektivojn por puni la krimulojn kaj por ordigi la mondon surbaze de justeco kaj respekto de la homeco.

Unu el la ĉefaj celoj de la Aliancanoj estis la konstruo de nova, libereca mondo. Jam en la fama *Atlantika Ĉarto* de la 14-a de Aŭgusto 1941 estis akcentita la principo, ke ĉiu popolo rajtas elekti la formon de regado, kiun ĝi deziras, kaj ke la teritoriaj ŝanĝoj povas okazi nur en konsento kun la interesita loĝantaro.

La Atlantika Ĉarto enhavis ankaŭ la du famajn liberecojn, nome la liberecon de la mizero kaj la liberecon de la timo. En sia parolado de la 6-a de Januaro 1941, direktita al la Usona Kongreso, la prezidanto Roosevelt klarigis, kion signifas tiuj du liberecoj. Li diris: "La libereco de la mizero – ĝi, tradukite en simplajn vortojn, signifas tian ekonomian ordon, kiu certigos al la loĝantaro de ĉiu ŝtato sanan pacepokan vivon La libereco de la timo – ĝi, tradukite en simplajn vortojn, signifas tioman kaj tielan malaltigon de la armigo en la tuta mondo, ke neniu nacio estos kapabla fari agon de fizika atako kontraŭ kiu ajn alia nacio, kie ajn en la mondo."

Poste, en la daŭro de la milito, plurfoje estis akcentita la firma decido de la Aliancanoj puni la militkrimulojn kaj restarigi la homajn rajtojn kaj liberecojn en la tuta mondo. Tiel, ekzemple, la *Moskva Konferenco* de la jaro 1943 akceptis 4 deklaraciojn, en kiuj oni parolis ankaŭ pri la demokratizaj liberecoj kaj pri la fundamentaj rajtoj. En la Deklaracio pri Italio oni parolis pri la libereco de parolo, religio, politikaj konvinkoj, preso kaj kunvenado, kaj oni substrekis, ke ĉiuj ĉi liberecoj estos redonitaj al la itala popolo. Aliflanke, en la sama Deklaracio estis akcentite, ke ĉiuj personoj, kiuj faris militkrimojn, estos arestitaj kaj juĝitaj. En la Deklaracio pri la respondeco de la militkrimuloj estis dirite, ke ĉiuj germanaj oficiroj kaj soldatoj, ĉiuj membroj de la nazia partio, kiuj estas respondecaj pri sennombraj krimoj, faritaj en la okupitaj landoj, estos transdonitaj al la koncernaj landoj, por ke la popoloj, kontraŭ kiuj ili pekis, juĝu ilin.

Dum la *Berlina Konferenco* de la jaro 1945 la Aliancanoj, kiel ni vidis, rekonfirmis sian decidon puni la ĉefajn militkrimulojn, kies krima aktiveco ne estis teritorie ligita al difinita lando. En la sama epoko estis subskribita en Londono la fama akto de la 8-a de Aŭgusto 1945, pri kiu ni parolis en la antaŭa ĉapitro.

El vidpunkto de la homaj rajtoj apartan gravecon havas la krimo kontraŭ la homeco. Tiu krimo estas difinita kiel mortigo, ekstermo, sklavigo, dislokigo kaj aliaj nehumanaj agoj, faritaj kontraŭ la civila loĝantaro antaŭ aŭ dum la milito, kiel ankaŭ persekutoj pro politikaj, religiaj aŭ rasaj kaŭzoj, faritaj en kunligiteco kun la efektivigo de kiu ajn alia internacia krimo, apartenanta al la kompetenteco de la Tribunalo. El la difino estas klare videble, ke multaj krimoj kontraŭ la homeco restis nepunitaj, ĉar ili ne estis ampleksitaj per la difino. Ĝi, nome, postulas, ke tiuj krimoj estu faritaj en kunligiteco kun kiu ajn alia internacia krimo, do, laŭ la terminoj de la Statuto, kun la krimo kontraŭ la paco aŭ kun la krimo kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito. Montriĝis, sekve, la bezono pli efike protekti la homajn rajtojn per difino ankaŭ de tiuj krimoj kontraŭ

la homeco, kiuj ne estis ampleksitaj per la difino en la aktoj de la 8-a de Aŭgusto 1945. Tiu bezono estis poste realigita per la konvencio pri genocido.

Paralele kun la persekutado de la militkrimuloj kaj kun la jura, teoria kaj praktika difinado de la krimo kontraŭ la homeco, la homaj rajtoj kaj liberecoj estis denove rekonitaj en diversaj konstitucioj, akceptitaj post la milito. Oni povas diri, ke hodiaŭ preskaŭ ne ekzistas interna jura ordo, kiu ne rekonus formale almenaŭ kelkajn homajn rajtojn kaj liberecojn.

Tamen, la longjaraj spertoj, montrintaj klare, ke ekzistas granda diferenco inter la formala envicigo de la homaj rajtoj en konstituciojn kaj deklaraciojn, unuflanke, kaj ilia fakta aplikado aliflanke, nepre postulis internaciajn garantiojn. La homoj luktis kaj sangis dum la pasinta milito por la libereco. Milionoj falis havante tiun idealon antaŭ siaj okuloj. Oni devis kontentigi la sopirojn de la amasoj.

Tial la *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* en la solena enkonduko rekonfirmas la fidon je la fundamentaj rajtoj de la homo, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la egaleco de ĉiuj viroj kaj virinoj, de ĉiuj nacioj: grandaj kaj malgrandaj. La *Ĉarto* mencias la homajn rajtojn plurfoje ankaŭ en la teksto mem. Laŭ la art. 1/3 la respekto de la homaj rajtoj estas unu el kondiĉoj de internacia kunlaboro. En la artikolo 13/b estas preskribite, ke la Ĝenerala Asambleo rekomendas la mezurojn por la realigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj, senkonsidere al la diferencoj rasaj, seksaj, lingvaj aŭ religiaj. En la artikolo 55/c estas dirite, ke la Unuiĝintaj Nacioj helpas la ĝeneralan respekton kaj protekton de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj por ĉiuj senkonsidere al la diferencoj rasaj, seksaj, lingvaj aŭ religiaj. Unu el la ĉefaj taskoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilo estas la progresigo de la respekto kaj protekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj (art. 62/2 de la *Ĉarto*). Ankaŭ la artikoloj 68 kaj 76/c mencias la homajn rajtojn. La laste citita artikolo rilatas al la teritorioj sub kuratoreco. Sekve la *Ĉarto* starigas kiel ĝeneralan principon por la tuta mondo la respekton de la homaj rajtoj.

Simile al la paktkontraktoj post la Unua Mondmilito, la *novaj paktkontraktoj*, subskribitaj la 10-an de Februaro 1947 en Parizo inter la Aliancanoj, unuflanke, kaj Italio, Hungario, Rumanio, Bulgario kaj Finnlando, aliflanke, devigas la ekssatelitojn de Germanio respekti la fundamentajn homajn rajtojn kaj liberecojn.

Tiamaniere, antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, la jura situacio koncerne tiun materion, prezentiĝis jene:

a) *Sur nacia kampo* la internaj juraj sistemoj ĝenerale rekonis la homajn rajtojn en pli aŭ malpli alta grado, en tiu aŭ alia formo. Krome, la landoj, kiuj suferis pro la invado de la aksaj trupoj kaj kies loĝantaro estis viktimo de diversaj militkrimoj, akceptis leĝojn, surbaze de kiuj la militkrimuloj estis persekutataj kaj punataj.

b) *Sur internacia kampo* la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj solene proklamis la fidon je la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. La packontraktoj de la 10-a de Februaro 1947 devigis kvin ŝtatojn rekonigi kaj observi iujn el la homaj rajtoj. Krome, surbaze de la aktoj de la 8-a de Aŭgusto, la ĉefaj militkrimuloj estis juĝataj kaj punitaj de internaciaj tribunaloj.

Restis, do, necese harmoniigi ĉiujn ĉi jurajn dokumentojn kaj, eluzante la ampleksan teorion kaj grandan praktikon, formuli en solena dokumento la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. Tiu dokumento devus esprimi la ĝeneralajn principojn, validajn en la tuta mondo, por ĉiuj homoj, senkonsidere al la diferencoj de la ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj en diversaj landoj; senkonsidere al la ŝtataneco, nacieco, religio, lingvo, sekso de la homo.

4) *La laboroj de Unuiĝintaj Nacioj – Genocido*

Unu el la celoj de Unuiĝintaj Nacioj estas la internacia kunlaborado. Laŭ la art. 1/3 de la Ĉarto ĝi estas atingata, interalie, per la evoluigo kaj kuraĝigo de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Du organoj de la Organizaĵo estas, laŭ la Ĉarto, ŝarĝitaj pri tiu demando. Laŭ art. 13/1b la Ĝenerala Asambleo havas la kompetentecon rekomendi la mezurojn, necesajn por la realigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, dum laŭ la art. 62/2 la saman kompetentecon havas ankaŭ la Ekonomia kaj Socia Konsilo. Inter la du organoj, tamen, ne povas okazi konflikto de kompetenteco, ĉar en pluraj rilatoj la Ekonomia kaj Socia Konsilo estas subigita al la Ĝenerala Asambleo.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj nenie difinas precize la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn, kvankam, kiel ni vidis, ĝi mencias ilin plurfoje kaj eĉ konsideras ilian realigon antaŭkondiĉo por atingi unu el la ĉefaj celoj, nome la internacian kunlaboradon. Ekestis, do, demando kion oni devas konsideri kiel homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn; kiuj, fakte, estas tiuj rajtoj kaj liberecoj.

Aliflanke, stariĝis la problemo kiel ne nur realigi la fiksojn universalajn rajtojn kaj liberecojn, sed ankaŭ kiel malhelpi la ripetigon de teruraj krimoj kontraŭ la homa personeco.

Ĉiuj ĉi gravaj taskoj – nome la fikso de politikaj, sociaj kaj eko-

nomiaj rajtoj, kiuj povas esti konsiderataj kiel universale fundamentaj; la eltrovo de metodoj por ilia efika protekto; la difino kaj subpremo de la krimo kontraŭ rasaj, naciaj, religiaj aŭ aliaj homgrupoj, nomata genocido – estis konfiditaj unue al la Ekonomia kaj Socia Konsilo.

Komence de la j. 1946 la Ekonomia kaj Socia Konsilo formis apartan Komisionon pri la Homaj Rajtoj. Ĝi konsistis komence el 9 membroj kaj poste el 18 membroj, tiel ke en ĝi estis reprezentitaj ĉiuj ĉefaj juraj kaj politikaj sistemoj de la mondo. Laŭ la vortoj de Henri Laugier, helpsekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kiu inaŭguris la laborojn de la Komisiono, ĝia tasko estis "daŭrigi dum la paco la lukton, kiun la popoloj gvidis dum la milito, defendante kontraŭ ĉiuj atakoj la rajtojn kaj la dignon de la homo". Ĝi devis redakti tian deklaron pri la homaj rajtoj laŭ la principoj de la Ĉarto, kiu povos "per sia efiko triumfi super ĉiuj obstakloj".

La Komisiono formis du subkomisionojn. Unu el ili okupiĝis pri la libereco de la informado kaj de la preso, la alia pristudis la lukton kontraŭ la diskriminaciaj mezuroj kaj la protekton de la malplimultoj. En sia laboro la Komisiono estis helpata ankaŭ de aliaj organoj, precipe de la subkomisiono kaj poste Komisiono pri la Stato de la Virino, de la Internacia Konferenco por la Preslibereco (Genevo, 1948), de diversaj scienculaj kaj aliaj neŝtataj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj, kiuj prezentis siajn projektojn de deklarioj pri la homaj rajtoj. La Komisiono povis ankaŭ vaste utiligi la enketon de UNESKO pri la filozofiaj fundamentoj de la homaj rajtoj.

En junio 1948, dum sia tria kunvenperiodo, la Komisiono akceptis la unuan projekton de Internacia Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. Ĝi decidis, ke la tuta *Ĉarto de la Homaj Rajtoj* konsistos el tri partoj: a) Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, b) Internacia Pakto pri la Homaj Rajtoj, c) Mezuroj por Apliko de la Homaj Rajtoj. Sekve, la projekto de la Deklaracio formis nur la unuan parton de la tuta Ĉarto.

Tiu projekto estis submetita al la tria kunvenperiodo de la Ĝenerala Asambleo, okazinta en Aŭtuno 1948 en Parizo. Ĝi estis pritraktata dum pluraj semajnoj en la Tria Komisiono de la Asambleo. Ĉirkaŭ 150 amendoj estis pridiskutitaj. El ili, parto estis akceptita kaj la plimulto rejetita. Fine, post la akcepto en la Komisiono, la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj estis akceptita la 10-an de Decembro 1948 en la Ĝenerala Asambleo per 48 voĉoj kontraŭ neniuj. Dek reprezentantoj sin detenis de la voĉdono.

La franca Deklaracio estis formulita en tri tagoj. La Universala Deklaracio de la Unuiĝintaj Nacioj estis diskutata kaj peze ellaborata dum preskaŭ tri jaroj!

Paralele kun la klopodoj difini la universalajn homajn rajtojn,

fluis la laboroj koncerne la krimon pri *genocido*. La 11-an de Decembro 1946 la Ĝenerala Asambleo akceptis rezolucion, en kiu ĝi rekonfirmis, ke la genocido estas krimo de internacia juro. Ĝi komisiis la Ekonomian kaj Socian Konsilon "entrepreni la necesajn studojn kun la celo redakti projekton de konvencio pri la genocid-krimo". Ne estas loko por prezenti ĉi tie la longan vojon, kiu kondukis al la fina ĉiuvoĉa akcepto de la projekto de Konvencio pri Genocido fare de la Asambleo. La unuan projekton ellaboris la Sekretariejo de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi estis poste diskutata en la Komisiono pri la Progresiva Kodigo de la Internacia Juro. En Parizo ĝin pritraktis la Sesa Komisiono de la Ĝenerala Asambleo. Fine, la 9-an de Decembro 1948, ĝin akceptis, kiel projekton de ĝenerala konvencio, la Asambleo.

La genocido estas aparta krimo de internacia juro. Laŭ la projekto de la Konvencio, *la genocido estas difinita kiel krimo direktita kontraŭ tutaj homgrupoj*; ĉiu ago, farita kun la celo detrui plene aŭ parte nacian, rasan aŭ religian grupon estas konsiderata kiel krimo de genocido. Same tiel, la mortigo, la korpaj damaĝoj kaŭzantaj kripligon aŭ senfruktecon, la dislokigo de personoj – ĉio surbaze de rasa, nacia aŭ religia aparteno de la viktimoj – estas puneblaj kiel krimo de genocido. Ne nur la ago mem, direktita al la ekstermo de rasaj, naciaj aŭ religiaj grupoj, sed ankaŭ ĉiu provo, helpado, kunagado, konspirado kaj instigo al farado de tiu krimo, estas konsiderataj kiel agoj, ampleksitaj de la koncepto genocido.

La genocido ne anstataŭigas la tri kategoriojn de internacia krimo, difinitajn en la aktoj de la 8-a de Aŭgusto 1945. Ĝi estas nova kategorio de internacia krimo, kiu, diference de la krimo kontraŭ la homeco, povas esti farita ankaŭ en tempo de paco kaj sen iu ajn kunligiteco kun la ceteraj, jam preparolitaj, internaciaj krimoj. Tiamaniere estas plenigita grava malpleno. Laŭ la aktoj de la 8-a de Aŭgusto, multaj teruraj krimoj kontraŭ la homeco restis nepunitaj. Nun ankaŭ tiaj krimaj agoj estas leĝe difinitaj kiel krimoj, kio prezentas novan seriozan averton por ĉiuj tiaspecaj krimuloj.

La Konvencio pri genocido havas la taskon protekti unu el plej fundamentaj homaj rajtoj: la rajton je ekzisto. Milionoj da homoj estis viktimoj de tiu krimo en la proksima pasinteco. Ili estis mortigitaj, turmentataj, dislokigitaj, arestataj nur tial, ĉar ili apartenis al difinita raso, nacio aŭ religio. Ĉio ĉi estis farata de la ŝtata potenco aŭ kun ĝia helpo, surbaze de internaj leĝoj, kiuj permesadis tiun plej teruran krimon. Per la menciita Konvencio la ŝtatoj devigas sin malhelpi tiun krimon, persekutadi kaj punadi la krimulojn.

Estas, sendube, tre bedaŭrinde ke la subpremo de genocido estas lasita en la manoj de la unuopaj ŝtatoj. Multe pli fortaj garantioj

estus donitaj, se la malhelpado de la genocido, la persekutado kaj punado de la kulpuloj troviĝus en la manoj de iu internacia organismo, precipe de iu internacia tribunalo. Tamen, la fakto mem, ke la krimo estas difinita, ke la membroj de Unuiĝintaj Nacioj akceptis tiun difinon, signifas gravan paŝon antaŭen. Neniu krimulo povos sin defendi dirante, ke la interna jura sistemo de lia lando ne malpermesis al li fari tiajn agojn, kiuj estas difinitaj kiel genocido. Li ne povos sin defendi per la principo *nullum crimen sine lege*, aŭ per tio ke la superuloj ordonis al li agi kontraŭ certaj homgrupoj. La genocido estas fiksita, ĝi estas difinita kiel krimo de internacia juro. Sekve, la internaj juraj ordoj devas konformiĝi al tiu stato. Ili ne povas permesi ion, kion la internacia juro malpermesas. Se la jura ordo de iu ŝtato malharmonias kun la principoj aŭ reguloj de internacia juro, tiu interna jura sistemo estas kontraŭleĝa kaj la civitanoj rajtas malobei tiujn internajn jurajn ordonojn, kiuj kontraŭas al la internacia juro. Krome, la personoj respondecaj pri la kontraŭleĝeco de la koncerna jura sistemo, devas esti konsiderataj kiel rompantoj de la internacia jura ordo. Sur la kampo de internacia kriminala juro, nome sur la kampo de subpremo de ĉiuj kategorioj de internacia krimo – krimo kontraŭ la paco, krimo kontraŭ la leĝoj kaj kutimoj de la milito, krimo kontraŭ la homeco, genocido – ili devas esti konsiderataj kiel krimuloj, kontraŭ kiuj oni devas apliki la plej severajn punojn.

La Konvencio pri Genocido – same kiel la aktoj de la 8-a de Aŭgusto 1945 – ne protektas ĉiujn homajn rajtojn. *Ili nur protektas la rajton je vivo kaj sano kontraŭ la krimaj atakoj al tiu rajto*. Sed, inter la krima atako al iu homa rajto kaj la plena realigo de tiu rajto estas granda skalo da nuancoj. La principo pri egaleco de ĉiuj homoj senkonsidere al ilia rasa, nacia religia aŭ lingva aparteno, senkonsidere al ilia sekso, povas esti diversmaniere malatentata. Oni povas, ekzemple ne doni al la virinoj certajn politikajn rajtojn, oni povas al kelkaj rasaj, naciaj aŭ religiaj grupoj apliki nejustajn metodojn en la publika vivo (ekzemple malpermeso uzi iujn publikajn ejojn), oni povas ankaŭ alimaniere malatenti al la principo pri egaleco. Tiuj agoj estas kontraŭaj al homeco kaj ankaŭ, laŭ nia opinio, al nuntempa internacia juro. Tamen, ili ne povas esti konsiderataj, en tiuj limoj, kiel internaciaj krimoj. Nur la plej brutaj atakoj al homaj rajtoj, la atakoj al la vivo kaj sano de la homo pro lia aparteno al difinita homgrupo, estas konsiderataj kiel krimoj.

La internacia kriminala juro de la nuntempo protektas, do, la homajn rajtojn nur de la *krimaj* atakoj, direktitaj kontraŭ ili.

5) *La enhavo de la Universala Deklaracio*

La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj havas solenan Enkondukon kaj tekston de tridek artikoloj.

En la *Enkonduko* estas akcentite, ke la rekono de la digno, esence ligita al ĉiuj membroj de la homa familio, estas fundamento de libereco, justeco kaj paco en la mondo; ke la malestimo kaj malrespekto de la homaj rajtoj kaŭzis barbarajn agojn, kiuj indignigis la konsciencon de la homaro; ke la homaj rajtoj devas esti protektataj de jura reĝimo, por ke la homoj ne estu devigataj ekribeli kontraŭ la tiraneco kaj premo; ke, en la intereso de amikecaj rilatoj inter la nacioj, la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj rekonfirmis sian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la homdigno kaj egaleco, dum la membroj de la Organizaĵo sin devigis certigi, en kunlaboro kun la Unuiĝintaj Nacioj, la universalan kaj efektivan respekton de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj; ke, sekve, la difino de komuna koncepto pri la homaj rajtoj kaj liberecoj havas la plej grandan gravecon por la plenumo de tiu devigo. La Enkonduko, do, klarigas la kaŭzojn, pro kiuj estis necese proklami la Universalan Deklaracion, kaj la celon, kiun la Unuiĝintaj Nacioj deziras atingi per ĝi.

La teksto mem de la Deklaracio havas 30 artikolojn. Kvankam ĝi ne estas formale dividita, tamen en ĝi estas klare distingeblaj tri partoj. La *unua parto* (art. 1–22) rilatas al la klasikaj rajtoj kaj liberecoj; la *dua parto* difinas la novajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn (art. 22–28); la *tria parto* konsistas el la tri lastaj artikoloj, nomataj tegmento-artikoloj, ĉar ili iamaniere kovras la tutan Deklaracion, starigante kelkajn ĝeneralajn principojn pri ĝia signifo kaj interpretado.

La unuaj tri artikoloj de la Deklaracio esprimas la tri grandajn ideojn de la filozofio de la XVIII jarcento. En la art. 1 estas starigita la principo pri *libereco*, *egaleco* kaj *frateco* de ĉiuj homoj. La ideo pri egaleco estas pli detale klarigita en la artikolo 2, dum la art. 3 aparte parolas pri la rajto je libereco, kiu inkluzivas la rajton je vivo kaj je persona sekureco.

La artikoloj 4–15 pritraktas la *logikajn sekvojn de la principoj proklamitaj en la unuaj tri artikoloj*. Ili estas: 1) malpermeso de sklaveco aŭ servuteco, 2) malpermeso de torturoj aŭ nehumanaj punoj, 3) rajto je jura personeco, 4) plena egaleco antaŭ la leĝo, 5) rajto je protekto de la fundamentaj rajtoj, rekonitaj de la konstitucio aŭ de la leĝo, antaŭ la kompetentaj naciaj organoj, 6) malpermeso de arbitraj arestoj, malliberigoj aŭ ekziloj, 7) egaleco antaŭ la tribunaloj kaj publikeco de la procesoj, sendependeco kaj senpar-

tieco de la juĝistaro, 8) supozo de senkulpeco antaŭ ol la krimo aŭ delikto estas pruvita, principo *nullum crimen, nulla poena sine lege* (neniu krimo, neniu puno sen leĝo), 9) malpermeso de arbitra enmikso en la privatajn aferojn, familion, hejmon aŭ korespondadon, 10) libereco de cirkulado en sia propra lando kaj en eksterlando, 11) rajto je azilo, krom en okazo de t.n. nepolitikaj krimoj aŭ de krimoj faritaj kontraŭ la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Sekvas ses artikoloj, pritraktantaj la *rajtojn kaj liberecojn de la homo sur apartaj kampoj*. La artikolo 15 proklamas la rajton je ŝtataneco kaj la rajton ŝanĝi sian ŝtatanecon. Al la familio estas dediĉita la art. 16, kiu starigas la principon de libera konsento de la edziĝmatura paro, deziranta geedziĝi, kaj la principon de rajto je edzeco; ĝi proklamas la devon de la socio kaj de la ŝtato protekti la familion. En la art. 17–20 estas rekonitaj la klasikaj *liberecoj de pensado, konscienco, religio, opinio kaj esprimado, organiziĝo kaj kunvenado*.

La pure politikaj civitanaj rajtoj estas fiksitaj en la art. 21. Laŭ tiu artikolo, la homo havas rajton partopreni, ĉu rekte ĉu pere de libere elektitaj reprezentantoj, en la regado de sia lando. Li havas rajton je ĉiuj publikaj oficoj. Estas proklamita la principo, ke la aŭtoritato de la ŝtata potenco kuŝas sur la libera volo de la popolo. La voĉdona rajto estas universala kaj egala por ĉiuj, dum la elektoj devas esti honestaj, periodaj kaj sekretaj, aŭ la libereco de la voĉdono devas esti similmaniere garantiita.

La artikoloj 22–28 rilatas al la *modernaj liberecoj kaj rajtoj*. El ili, la artikolo 22 havas karakteron de ĝenerala enkonduko. Ĝi proklamas la rajton je socia sekureco, kies konsekvenco devas esti la realigo de certaj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, necesaj al la homa digno kaj al la libera evoluo de la homa personeco. Tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj estas difinitaj en la artikoloj 23–38. Laŭ la Deklaracio, ili estas: 1) la rajtoj al laboro, al egala kompenso por egala laboro, al organiziĝo en laboristaj sindikatoj, 2) la rajto al ripozo, 3) la rajto al socia asekuro kaj al vivnivelo sufiĉa por certigi la bonfarton kaj sanon de la persono kaj de liaj familianoj, 4) la rajto al senpaga elementa edukiĝo kaj al egala atingeblo de la supera edukiĝo, 5) la rajto al libera partopreno en la kultura vivo, al ĝuado de la artaj valoroj kaj al profitado de la sciencprogreso.

Fine, la artikoloj 28 ĝis 30 inkluzive konkludas la Universalan Deklaracion. En la art. 28 estas rekonita la rajto de la homo al tiaj socia kaj internacia ordoj, en kiuj la proklamitaj rajtoj kaj liberecoj povos trovi sian plenan realigon. La ĝuado de la rajtoj kaj liberecoj povas esti limigita nur de la leĝo kun la ekskluziva celo

certigi la saman ĝuadon al la aliaj homoj kaj kontentigi la postulojn de la moralo, de la publika ordo kaj de ĝenerala bonfarto en demokrata socio (art. 29). En neniu okazo tiuj rajtoj povas esti uzataj en maniero kontraŭa al la celoj kaj al la principoj de Unuiĝintaj Nacioj. La lasta artikolo proklamas iom superfluan, ĉar memkompreneblan principon: en la interpretado de la Deklaracio, nenio povas esti komprenita kiel donanta al iu ŝtato, grupo aŭ persono la rajton fari ion, kio detruus iun rajton aŭ liberceon, proklamitan en la Deklaracio.

6) *La jura signifo kaj la atingopovo de la Universala Deklaracio*

Kia estas la jura signifo kaj la atingopovo de la Universala Deklaracio?

Se oni rigardas ĝin el pure formala vidpunkto, ĝi prezentiĝas kiel *rekomendo*. La Unuiĝintaj Nacioj povas, pere de siaj organoj, fari aŭ rekomendojn aŭ decidojn. Estas sendube, ke inter la du kategorioj, nur la veraj decidoj, faritaj konforme al la Ĉarto kaj en kazoj speciale antaŭviditaj en ĝi, havas devigan karakteron. Kontraŭe, la rekomendoj havas tute apartan karakteron de deziresprimo, eble kun ioma nuanco de premo, sed ili ne povas esti konsiderataj kiel devigaj.

La Ĝenerala Asambleo akceptis la Deklaracion en la senco de la art. 13/1b de la Ĉarto, kiu antaŭvidas por tiu kazo la formon de rekomendo. Tial, el formale-jura vidpunkto, la Universala Deklaracio kiel tia estas nur simpla rekomendo, do nedeviga deziresprimo. Tiun saman opinion esprimis S-ino Roosevelt, la prezidantino de la Komisiono, parolante pri la projekto de la Deklaracio: „La projekto de la Deklaracio – ŝi diris – estas nek kontrakto, nek internacia akordo, kaj ĝi ne havos ian ajn juran devigon. Ĝi estas deklaro de principoj pri la fundamentaj rajtoj kaj liberecoj de la homo, destinita esti aprobita per formala voĉdono de la membroj de la Asambleo”.

Se, do, oni izolas la Universalan Deklaracion kaj de la kaŭzoj, pro kiuj ĝi estis kreita, kaj de la celo, por kiu ĝi estas destinita, kaj de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi ekestis, kaj, fine, de la tuta historia evoluo sur la kampo de homaj rajtoj kaj liberecoj, ĝia jura valoro ne estus tre granda kaj ĝiaj fortoj kaj atingopovo minimumaj. Eĉ en tiu okazo, kompreneble, al la Universala Deklaracio ne mankus ia jura signifo. Ankaŭ la rekomendoj, ja, havas sian juran sencon, ankaŭ ili havas ian juran valoron. Tamen, la rekomendoj ne estas devigaj kaj, sekve, la malatento de la Deklaracio ne povus esti konsiderata kiel malobeo al ordonoj de internacia juro, kvankam tiu malatento en ĉiu okazo signifus nekonformiĝon al la prema deziro, esprimita de la plej grava internacia organizaĵo.

Tute alie aspektas la problemo, se oni konsideras ĉiujn supre menciitajn elementojn, precipe se oni analizas la enhavon de la Deklaracio en kunligiteco kun la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj plurfoje mencias – ni tion jam vidis – la homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn. En la solena enkonduko la Ĉarto "rekonfirmas la fidon je la fundamentaj homaj rajtoj". En la teksto mem la Ĉarto plurfoje parolas pri la "progresigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj" aŭ pri la "respekto efektiva de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj" aŭ simile. El tiu formulado klare sekvas, ke la *Ĉarto rekonas la ekziston de la homaj rajtoj kaj liberecoj*. Oni povas rekonfirmi la fidon je io, aŭ progresigi ion, aŭ stimuli la respekton kaj protekton de io, nur se tiu "io" fakte jam ekzistas. La Ĉarto, do, ne kreas la homajn rajtojn kaj liberecojn. Ĝi tute simple utiligas tiun koncepton kiel jam ekzistantan.

Ke la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj havas devigan karakteron, pri tio ne povas esti ia ajn dubo. Tial, *ĉiuj partoj de la Ĉarto, kiuj rilatas al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, estas ankaŭ devigaj*. Ili formas parton de la nuntempa internacia juro. Oni povas, do, aserti, sen ia ajn timo pri eraro, ke la *internacia juro rekonas la ekziston de la homaj rajtoj* kaj ke la malobservo de tiuj rajtoj devas esti konsiderata kiel rompo de ĝia regulo.

Tamen, la Ĉarto ne precizigas la homajn rajtojn. Ĝi nek difinas ilin, nek tutnombras ilin. Tion faras la Universala Deklaracio. Ĝi estas logike kaj organike ligita al la Ĉarto. La Deklaracio nur pli-precizigas tion, kio, laŭ la Ĉarto, jam estas deviga parto de internacia juro. Ĉar, kion oni povus kompreni sub "homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj", se ne ĝuste tion, kion la oficialaj reprezentantoj de 48 ŝtatoj deklaris universalaj rajtoj de la homo, dum 10 aliaj reprezentantoj sin detenis de la voĉdono? Oni ne forgesu, ke eĉ ne unu sola voĉo estis esprimita kontraŭ la Deklaracio!

La juraj aktoj povas havi deklaran aŭ konstitutivan karakteron. La unuaj nur rekonas ion, kio jam ekzistas. La aliaj estas rajtokreaĵ. La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj havas, evidente, la unuan karakteron. Tion diras ankaŭ ĝia nomo mem. La Deklaracio, do, same kiel la Ĉarto, ne kreas iajn novajn rajtojn de la homo, sed ĝi nur tutnombras tiujn homajn rajtojn, kiujn oni povas konsideri kiel universale ekzistantajn. Tial, *kvankam ĝi estas nur rekomendo, tamen ĝia enhavo estas fakte deviga*. Tiu enhavo estus deviga eĉ se tute ne ekzistus la Deklaracio, ĉar jam antaŭ la Deklaracio la homaj rajtoj ekzistis; jam antaŭ la Deklaracio ili estis solene rekonitaj de la internacia juro pere de la Ĉarto de OUN. Nun, post la akcepto de la Universala Deklaracio, tiuj jam ekzistantaj rajtoj estas precizigitaj en jura dokumento havanta unuarangan aŭtoritaton, ĉar ĝi

estas rekomendo de la plej grava internacia organizaĵo, al kiu apartenas preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo. Ne povas esti dubo, ke sub la vortoj "homaj rajtoj" kaj "fundamentaj liberecoj" oni devas kompreni ĝuste la rajtojn kaj liberecojn, fiksitajn en la Deklaracio.

Ankaŭ aliaj argumentoj luktas por la deviga karaktero de la Deklaracia enhavo. La internacia juro havas du ĉefajn fontojn: la internaciajn konvenciojn kaj la internacian juran kutimon. Tamen, kiel parto de deviga internacia juro devas esti konsiderataj ankaŭ la ĝeneralaj juraj principoj rekonitaj de ĉiuj civilizitaj popoloj. La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj koncize resumas la ĝeneralajn jurajn principojn, rekonitajn de la civilizitaj nacioj, sur la kampo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Se, sen tiaspeca Deklaracio, povus ekesti iaj duboj koncerne la demandon ĉu iu homa rajto aŭ fundamenta libereco estas fakte rekonita de la civilizitaj nacioj, nun, post la proklamo de la Deklaracio, tiaj duboj ne povas ekzisti. Kvankam nur rekomendo, *la Deklaracio estas evidenta pruvo, ke la civilizitaj nacioj rekonas la liberecojn kaj rajtojn, kiujn ĝi entenas, kiel ĝeneralajn jurajn principojn. Ankaŭ tial la enhavo de la Deklaracio estas jure deviga.* Tiu enhavo estus deviga, eĉ se la Carto absolute nenion dirus pri la homaj rajtoj, eĉ se ĝi ne rekonus ilin plurfoje. En tiu okazo ĝi estus deviga kiel ĝeneralala jura principo.

Fine, grava helprimedo por la konstato de la reguloj de internacia juro estas la kortumaj decidoj kaj la teoriaj verkoj de la plej gravaj fakuloj (art. 38/1d de la Statuto de la Internacia Kortumo). Tio signifas, ke en okazo de dubo pri iu jura regulo, pri ĝia senco kaj atingopovo, la decidoj de la Internacia Kortumo kaj la teorio estas utiligataj. Se, do, teoria verko de konata fakulo povas esti uzata kiel rimedo por konstati aŭ por korekte interpreti iun juran regulon, des pli povas esti utiligata tiel grava dokumento, kia estas la Universala Deklaracio, verko ne de unu fakulo, sed de granda nombro da oficialaj ŝtataj reprezentantoj kaj de fakuloj apartenantaj al ĉiuj juraj sistemoj de la terglobo. Ankaŭ laŭ tiu vojo, oni vidas, la enhavo de la Universala Deklaracio fariĝas deviga.

Surbaze de ĉiuj menciitaj argumentoj, ni opinias, ke la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, kvankam ĝi estas formale nur rekomendo, tamen laŭ sia enhavo estas deviga. Sekve, ĉiu atako kontraŭ la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, farita kie ajn en la mondo kaj fare de kiu ajn, devas esti konsiderata kaj estas malatento kaj malobeo al la internacia leĝo.

Alia demando estas tiu de la efektiva internacia protekto de la homaj rajtoj. Pluraj proponoj estis faritaj, sed neniuj estis akceptitaj. La Deklaracio mem parolas nur tre singarde pri la rajto je ribelo,

se la homaj liberecoj kaj rajtoj ne estas observataj. En la Enkonduko al la Deklaracio estas, nome, dirite, ke la homaj rajtoj devas esti protektataj de reĝimo de juro, „por ke la homo ne estu devigata turni sin al ribelo”. Diference de la franca Deklaracio, kiu parolas klare pri la rajto je ribelo, ĉi tie oni nur modeste mencias, ke la homo povus esti „devigata turni sin al ribelo”. Tamen, estas evidente, ke en la nunaj cirkonstancoj, pro la manko de efektiva internacia protekto de ĉiuj homaj rajtoj kaj liberecoj, *la ribelo estas la ĉefa rimedo por lukti kontraŭ la tiraneco kaj subpremo*. Tiaspeca ribelo, direktita kontraŭ la piedpremantoj de la homaj rajtoj kaj liberecoj, ne povas esti konsiderata kiel kontraŭleĝa. Ĝi estas utiligata nur kiel rimedo por *restarigi la liberecon kaj justecon*.


Alia potenca rimedo estas la eduko, sed ĝi havas nur moralan karakteron. Sur tiu ĉi kampo UNESKO montras konsiderindan aktivecon diskonigante, klarigante kaj popularigante la Deklaracion kun la celo respektigi ĉie la homajn rajtojn.

* * *

La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj havas grandegan ne nur moralan, sed ankaŭ juran signifon. Ĝi ankoraŭfoje rekonas la esencan egalecon de la homo kaj ĝi fiksas liajn rajtojn en ĉiuj anguloj de la terglobo, tute egale al kiu raso, nacio, religio, lingvo aŭ sekso li apartenas. Ĝi estas simbolo de la tuthomeco kaj de la universaleco de la mondo, kiu estas propraĵo de la homo, super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj, flagoj kaj konvinkoj. La Universala Deklaracio estas esperiga standardo, sub kiu kolektiĝas milionaj amasoj kaj ĉiuj vere intelektaj elitoj, konsiderantaj la homon unue kaj antaŭ ĉio homo, kaj dezirantaj plene realigi mondon de libereco, egaleco, justeco; mondon, en kiu la feliĉo de la tuto baziĝos sur la feliĉo de unuopuloj kaj tiu de la unuopulo sekvos el la feliĉo de la tuto.

TRIA PARTO

INTERŜTATAJ ORGANIZAĴOJ



ĈAPITRO IX

LA BAZO KAJ LA FORMIĜO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ

La Unuiĝintaj Nacioj naskiĝis dum la milito kaj kiel rezulto de la milito.

Tial, por kompreni pli bone la esencon kaj la rolon de tiu plej grava interŝtata organizaĵo de la nuntempa mondo, estas utile refreŝigi almenaŭ la ĉefajn eventojn de la antaŭmilita periodo kaj mallonge prezenti la etapojn, kiuj iom post iom preparis la Ĉarton de San Francisko.

1) *Du evolulinioj de la mondpolitiko*

Post la Unua Mondmilito estis fondita la Ligo de Nacioj. Ĝia ĉefa celo estis konservi la pacon. Kun multege da entuziasmo oni kredis je ĝi. Grandaj estis la esperoj, ke la Ligo sukcesos realigi tiun taskon, ke la mondo, fine, ekmarŝos la vojon de amikeca kunlaborado.

La Ligo de Nacioj havis, tamen, multajn mankojn. Unu el ili – certe ne la malplej grava – estis la foresto de pluraj ŝtatoj. La eksvenkitoj, UŜoNo, Rusio ne estis ĝiaj membroj. UŜoNo revenis al politiko de izolismo kaj neniam aliĝis al la Organizaĵo. Germanio estis akceptita en la jaro 1926, sed ĝi ekŝiĝis en Oktobro 1933. Sovjetunio aliĝis nur en la j. 1934, kiam nek Germanio nek Japanio estis plu membroj. La Ligo neniam, do, estis mondorganizaĵo.

Baldaŭ venis la seniluziigoj! Unu post la alia! Kaj la esperoj fariĝis malesperoj! La grandaj politikaj eventoj okazadis kaj solvigadis ekster la kadro de la Ligo.

Ekde la j. 1933 – proksimume – oni povis ĉiam pli klare rimarki du ĉefajn evoluliniojn en la mondpolitiko.

Unuflanke troviĝis la ŝtatoj grupiĝintaj en la Ligo de Nacioj. Iliaj interesoj ofte kontraŭis unu al la alia. Inter ili okazadis ankaŭ konfliktoj. Tamen la komuna trajto de ilia politiko estis pacemo. Pro tiu aŭ alia kaŭzo, ĉiuj ĉi ŝtatoj deziris pli aŭ malpli sincere la pacon kaj klopodis konservi la Organizaĵon. El iom fora distanco kun ili

simpatiis USoNo. La politika evolulinio de tiu grupo estis descenda. Ĝi atingis, fine, la nulon en la j. 1939.

Aliflanke estis la tri "malkontentaj" ŝtatoj: Germanio de Hitler, Italio de Mussolini kaj Japanio. La evolulinio de ilia politiko estis suprenira. Ĝi atingis sian kulminan punkton en la j. 1940.

a) *Fortiĝo de la Akso*. – La venko de hitlerismo en Germanio en la j. 1933 signifis, interalie, ankaŭ la komenciĝon de aperte agresa (ataka) ekstera politiko de tiu ŝtato. Sen ia ajn konsidero al la internacia juro, sen ia ajn konsidero – tute aparte – al la internaciaj kontraktoj, kiujn Germanio estis libervole subskribinta, Hitler kaj liaj helpantoj agis plene laŭ sia plaĉo. Unu post la alia estis malatentataj la internaciaj sindevigoj de Germanio.

Jam en Oktobro 1933 Germanio ekŝiĝis el la Ligo de Nacioj. Ĝi tion faris ne doninte la preskribitan averton. Ĝi ankaŭ ne observis la aliajn procedurajn regulojn, kiuj estis antaŭviditaj por tiaj kazoj. Tiele ĝi, unu plian fojon, malobeis la sindevigon, kiun ĝi mem estis akceptinta.

Iom poste, en Marto 1935, Hitler unuflanke forjetis ĉiujn klaŭzojn de la Versaja Packontrakto, kiuj rilatis al malpermeso de ĝenerala deviga soldatservo en Germanio. Same tiel li komencis kreadi militan aviadilaron, kvankam ankaŭ tio estis malpermesita de la Versaja Kontrakto. Li, do, denove malobeis al internacia juro.

Eluzante la malkonkordon de siaj kontraŭuloj, Germanio de Hitler, piedpremante siajn proprajn solenajn promesojn kaj deklarojn, realigis siajn sklavigajn celojn unu post la alia. En la j. 1938 ĝi alproprigis Aŭstrion, kvankam la sendependecon de tiu ŝtato garantiis la Kontrakto de St. Germain kaj kvankam Germanio mem estis promesinta respekti ĝin. En Septembro de la sama jaro Hitler sukcesis dismembrigi Ĉehoslovakion. En Marto 1939 li faris novan krimon kontraŭ tiu lando kaj plene forprenis de ĝi la liberecon kaj la restaĵojn de sendependeco.

La apetito de nazia Germanio fariĝadis ĉiam pli granda. Ju pli ĝi englutis, des pli ĝi volis preni. Nenio plu povis ĝin kontentigi. Ĝi volis fariĝi la sola mondpotenco. Ĝi celis ekregi ĉiujn aliajn popolojn. Ĝia politiko estis konforma al la ideoj, kiujn Hitler estis klare espriminta en "Mein Kampf".

La 1-an de Septembro 1939 Hitler provokis la Duan Mondmiliton kaj li trovis fidelajn aliancanojn en la landoj, kies politikaj reĝimoj esence egalas al tiu de Germanio.

La ideologio kaj celoj de la japana imperialismo estas malpli konataj, ol tiuj de la nazisocialismo.

Same kiel Germanio, ankaŭ Japanio forlasis la Ligon de Nacioj por havi plene liberajn manojn. Ĝi tion faris en 1933, kelkajn mona-

tojn antaŭ Germanio, sed same tiel kontraŭjure, kiel ĝi. La Ligo de Nacioj estis tiam jam plene senpova. Ĝi aplikis neniajn sankciojn, nek entreprenis iajn ajn pli energiajn paŝojn por protekti Ĉinion, kontraŭ kiu Japanio gvidis sangan militon ekde 1931.

La ideologio de la tiama japana imperialismo estis tre simila al la germana naziismo. En multnombraj dokumentoj troviĝas same tiaj stultaj asertoj pri la "supereco de la raso Jamato", kiajn proklamadis la tondruloj de hitlerismo pri la "supereco de la ĝermana raso". Se la nazioj en Okcidento faradis planojn pri la sklavigo de ĉiuj popoloj kaj pri la regado de la tuta mondo, ne malpli fantaziajn planojn konstruadis la ideologoj de la japana imperialismo pri konkerado de Azio kaj de la aliaj kontinentoj. La tiamaj japanaj regantoj – same kiel iliaj germanaj ideaj fratoj – ne rekonadis la egalecon de la homoj, de la nacioj kaj de la rasoj. "Nur tie, kie ekzistas diferencoj – skribis la japana generalo Araki – konstruiĝas la digno: ni ne povas akcepti la ideon pri la egaleco de la rasoj."

La ĉefaj celoj de la japana imperialismo estis koncize skizitaj en la t.n. Tanaka-memorando ⁽¹⁾. Tie oni povis legi: "Por sin protekti . . . Japanio havas nur unu eblecon . . . ĝi estas la politiko de "sango kaj fero". Realigante tiun politikon, ni devos kunpuŝiĝi kun UŜoNo . . . Estontece, se ni deziras regi Ĉinion, ni nepre devos subigi Amerikon . . . Sed, por konkeri Ĉinion, ni unue devas okupi Manĉurion kaj Mongolion. Por konkeri la mondon, ni devas unue konkeri Ĉinion. Se ni sukcesos venki Ĉinion, la aliaj ŝtatoj de Azio kaj la landoj de la Suda Maro timos nin kaj kliniĝos antaŭ ni."

Aliloke, en la sama memorando, estis skizita la plano por konkeri la mondon. "Por akiri realajn rajtojn en Manĉurio kaj en Mongolio – skribis Tanaka – ni utiligu tiun ĉi teritorion kiel bazon. Poste, sub preteksto de industria kaj komerca aktivecoj, ni penetros en la ceteran parton de Ĉinio . . . Poste, kiam ni posedos la naturajn riĉaĵojn de Ĉinio, ni marŝos plue por konkeri Hindion, Arkipelagon, Centran Azion, Malgrandan Azion kaj eĉ Eŭropon".

Ankaŭ la teorio pri la necesa "vivspaco" ne estis monopolo de Hitler. La kresko de la loĝantaro en Japanio estis proksimume 700.000 personoj jare. Por ili – laŭ la opinio de la tiamaj regantaj rondoj – ne estis sufiĉe da loko en Japanio. Ilin oni devis koloniigi en Ĉinio. La memorando estis klara ankaŭ tiurilate: "Se ni realigas aktivan politikon por pligrandigi niajn rajtojn en Manĉurio kaj en Ĉinio, estos kreitaj la antaŭkondiĉoj de potenca nacia ekzisto kaj ni havos neniajn zorgojn. Krome, ni povos prizorgi niajn 700.000 samlandanojn jare."

⁽¹⁾ La memorando portas la daton de la 25-a de Julio 1927. Ĝin ellaboris la tiama prezidanto de la japana registaro, Tanaka, kaj ĝi estis prezentita al la imperiestro por aprobo.

Ke Japanio fakte provis realigi siajn planojn pri konkero de la mondo, pruvis la postaj okazaĵoj.

La lasta membro de tiu triopo, kvankam ne tiel forta kiel la du unuaj, havis tamen ne malpli grandajn ambiciojn. Por povi libere agi, ankaŭ Italio forlasis la Ligon. Mussolini ne nur revis pri la restarigo de la grandeco de la iama Romia Imperio, sed ankaŭ klopodis praktike efektivigi sian celon. La itala faŝismo bezonis "vivspacon" por "spiri libere" tute same, kiel ĝiaj du kolegoj. Tial Mussolini atakis Abisenion. Tial li atakis Albanion. Tial li enigis tranĉilon en la dorson de Francio. Kaj por doni pli da patoso – li ĝin tre ŝatis – al la tuta afero, Mussolini nomis sian reĝon imperiestro. Eble li tion faris ankaŭ por efekte influi la pasian fantazon de siaj sekvantoj kaj por konvinki sin mem pri la "grandeco" de sia verko!

Kio pli normala, ol ke tiuj tri mondkonkerontoj trovu kontakton kaj fariĝu aliancanoj? Ne por ĉiam, kompreneble, sed nur por atingi siajn plej proksimajn celojn.

Fakte, post plurjara intima kunlaborado – dum kiu ne malofte manifestiĝis ankaŭ pli aŭ malpli gravaj malkonkordoj, en tiu epoko lerte kaŝitaj – Germanio kaj Italio subskribis en Berlino la 22-an de Majo 1939 kontrakton pri milita-politika alianco. La akso Berlino-Romo estis en Septembro 1940 plilongigita ĝis Tokio. Tiam estis subskribita la fama Triopa Pakto (kontrakto) inter Germanio, Italio kaj Japanio.

Ĝi estis vera komploto kontraŭ la libereco de la mondo. „Japanio konsideras kaj rekonas la gvidadon de Germanio kaj de Italio en la konstruado de la nova ordo en Eŭropo. Germanio kaj Italio konsideras kaj rekonas la gvidadon de Japanio en la konstruado de la nova ordo sur la granda orientazia spaco". Tio estis la esenca punkto de la Triopa Pakto. Tio, samtempe, estis la bazo de kunlaborado de la Akso. Kunlaborado sincera tiom, kiom ĝi koncernis la neniigon de la liberaj nacioj kaj la dividon de la rabotaj riĉaĵoj. En tiu senco la Triopa Pakto estis realisma.

Sed estas klare, ke la eventuala venko de la Akso tuj kaŭzus la disigon de la konspirintoj. La unua viktimo estus Italio mem, kiel la plej malforta. Poste eksplodus nova militego ĝis ekstermo inter Germanio kaj Japanio, ĉar la fina celo de ambaŭ estis la sama: konkeri la mondon. Kaj du mondregantoj ne povas kunekzisti!

Kaj la atakintoj de Eŭropo kaj tiuj de Azio havis en la komenco tre signifajn militajn kaj politikajn sukcesojn. Sub la boto de Hitler ĝemis la milite venkita Eŭropo. La italaj faŝistaj trupoj tenis larĝajn teritoriojn de Afriko. La japanaj teraj, maraj kaj aeraj fortoj donadis

pezajn batojn al la Usonanoj kaj Angloj sur la spacoj de Malproksima Oriento.

La situacio ŝajnis senesperiga.

b) *Malkonkordo de la pacemaj ŝtatoj.* – Tute inverse prezentiĝis la afero en la alia tendaro. Tiuj ŝtatoj sincere deziris la pacon. Sovjetunio ĝin deziris, ĉar ĝi devis kaj volis dediĉi sian ĉefan atenton al solvado de internaj problemoj. Britio kaj Francio ĝin deziris, ĉar por ili estis grave konservi la akiritajn poziciojn kaj ĉar iliaj demokratiaj amasoj estis, ĝuste pro sia demokrateco, aperte kontraŭaj al milito. UŜoNo ĝin deziris, ĉar la preskaŭ neelĉerpeblaj materialaj fontoj kaj la grandega industria kapacito de tiu lando prezentis sufiĉajn garantiojn por ĝia plua trankvila prosperado en kondiĉoj de paco, por akiro de novaj merkatoj sen uzo de perfortaj rimedoj.

Tiu tendaro, tamen, ne estis unueca. Sennombraj antagonismoj ĝin disŝiradis. Grandega estis la reciproka malkonfido inter la okcidentaj potencoj kaj Sovjetunio. Tiu malkonfido ne multe malpliĝis eĉ post kiam Sovjetunio fariĝis membro de la Ligo de Nacioj. Britio rigardis kun timo la konstantan ekonomian fortiĝon de UŜoNo, dum UŜoNo klopodis akiri tiujn poziciojn en la mondo, kiujn pli frue firme tenis Britio. En la Ligo de Nacioj mem kaj ekster ĝi senĉese manifestiĝadis la malnova rivaleco inter Francio kaj Britio por la prestiĝo precipe en la aferoj de Eŭropo.

Tiele, kontraŭaj interesoj, naciaj ĵaluzoj, malkonfidoj regis la rilatojn inter la landoj, minacataj de la milito. Tiuj disigaj elementoj estis tiam pli fortaj ol la kunligaj, ol la danĝero de la komuna katastrofo.

Se la tiamaj gvidantoj de la pacemaj ŝtatoj estus havintaj pli da komprenemo pri la fakta situacio, pri la veraj celoj de la Akso, pri la teruraĵoj, kiujn travivos la homaro en la sekvintaj jaroj, ili estus povintaj trovi komunan bazon de kunlaborado. Ilia konkordo certe estus savinta la pacon.

Tion bone sciis ankaŭ Hitler.

Jen kion diris unu el liaj ĉefaj kunlaborantoj, Keitel, dum la proceso de Nürnberg:

Demandita kiaj estus la militaj konsekvencoj, se Britio, Francio kaj Sovjetunio protektus Ĉeĥoslovakion kaj se la traktadoj kun Germanio kaj Italio, kiuj poste finiĝis per la Munkena Pakto, estus interrompitaj, Keitel respondis: "La germanaj fortoj estus absolute senpovaj kontraŭ tia koalicio. Estus frenezaĵo ataki en tiu okazo." La morgaŭan tagon la akuzito pliprecizigis sian deklaron: "Mi dezirus aldoni ankoraŭ ion al tio, kion mi diris hieraŭ pri la germana preteco por la milito en tiu periodo. Se, anstataŭ la Munkena Konferenco, Britio, Francio kaj Sovjetunio estus unuiĝintaj, por Hitler

estus absolute neeble efektiviĝi la atakon”.

Oni memoru, ke Keitel estis ĉefo de la supera ĝenerala stabo kaj ke, kiel tia, li estis bonege informita pri la stato de la militpreparoj de Germanio kaj pri ĝiaj faktaj eblecoj en la epoko de la munkena krizo.

Cetere, la saman ideon esprimis Churchill mem, okaze de sia vizito al Washington, fine de la j. 1940, kiam li deklaris: ”Se post la lasta milito ni estus tenintaj kune, se ni estus entreprenintaj komunajn mezurojn por nia sekureco, neniam estus nin denove frapinta tiu damno.”

Bedaŭrinde, anstataŭ ”teni kune” kaj montri firman pugnon al la minacantoj, oni cede ĵetadis al la lupoj ĉiam pli grandajn pecojn, esperante kontentigi iliajn nesatigeblajn apetitojn.

La trupoj de Hitler eniras Aŭstrion. La subskribintoj de la kontrakto de St. Germain, kiuj estis garantiintaj la sendependecon de tiu ŝtato, faras nenion por plenumi sian garantian promeson.

Hitler postulas la Sudetlandon. Oni flugas al Munkeno kaj oni kontentigas lian diktatoran volon. Inter la 1-a kaj 10-a de Oktobro 1938, en kvar etapoj, la naziaj trupoj okupas tiujn regionojn. Francio kaj Britio iom timeme garantias la novajn limojn de Ĉeĥoslovakio. Germanio kaj Italio promesas doni samajn garantiojn. Sed la du lastaj, kiel kutime, malobservas siajn promesojn. Kaj la garantioj de Britio kaj de Francio, kiel konate, montriĝis poste senefikaj.

La sekvinta viktimo devis esti Pollando. La internacia streĉiteco kreskis de tago al tago. Hitler bone sciis, ke li riskas multon. Li ankaŭ sciis, ke ne estas eble por li militi sur du frontoj. La malkonkordo de liaj kontraŭuloj helpas liajn planojn. Tute neatendite, vere sensacie por la tiama mondo, Moskvo kaj Berlino subskribas la faman kontrakton pri neatakado. Tio, eble, ”donos tempon” al Moskvo, sed tio ankaŭ malligas la manojn al Hitler.

Li atakas Pollandon. La Poloj heroece rezistas kelkajn tagojn. Britio kaj Francio respondas. Eksplodas la Dua Mondmilito – la plej sanga, la plej terura, kiun iam ĝisvivis la homaro.

c). *Bazo de kunlaborado de la Unuiĝintaj Nacioj.* – La Dua Mondmilito havis por ĉiuj nacioj, minacitaj de la nazi-faŝisma agresemo, defendan aŭ liberigan karakteron. En la pasinta milito ne temis nur, kiel en la antaŭaj, pri korektado de tiu aŭ alia limo, pri kontentigado de tiu aŭ alia nacia aspiro, pri konkerado aŭ perdo de ekonomiaj pozicioj. Ne, en la Dua Mondmilito temis pri fakta regado de la mondo fare de la agresintoj kaj, sekve, pri esti aŭ ne esti por ĉiuj aliaj popoloj. Ne nur la senhonte proklamitaj celoj de la gvidantoj de la Akso, sed ankaŭ la praktiko en la okupitaj landoj montris klare, ke la popoloj estos sklavigitaj aŭ ekstermitaj kaj ke

la liberaj nacioj perdos sian sendependecon. Tial, el vidpunkto de la atakitaj landoj, la milito estis liberiga: en ĝi la atakitaj popoloj celis konservi aŭ reakiri sian nacian sendependecon, sian liberecon.

Ĝuste tiu karaktero de la milito, kaŭzita de la finaj celoj de la Akso, diktis la formigon de komuna politika bazo, sur kiu iom post iom konstruiĝis la Unuiĝintaj Nacioj.

La ŝtatgvidantoj de la grandaj aliancanaj potencoj faris dum la milito plurajn tre klarajn deklarojn pri la celoj de la milito.

Tiel, ekzemple, Roosevelt diris en sia parolado de la 6-a de Januaro 1942: "Niaj propraj celoj estas klaraj; ni celas detrui la la militismon, kiun al la subigitaj popoloj altrudis iliaj militaj mastroj . . . Ni hodiaŭ batalas por la sekureco, por la progreso, por la paco, ne nur por ni mem, sed por ĉiuj homoj, ne nur por unu generacio, sed por ĉiuj generacioj."

Parolante en la nomo de Britio, Churchill deklaris en Junio 1943: "Ni ne postulas gajnojn, ni ne deziras teritoriajn pligrandigojn, ni ne atendas kompensojn, sed ni ne akceptos kompromison."

Kelkajn monatojn pli frue, en Februaro 1943, ankaŭ Staljin estis difininta la celojn de la milito jene: "Diference de Hitlera Germanio, Sovjetunio kaj ĝiaj aliancanoj gvidas la militon por liberigi la popolojn de Eŭropo kaj de SSSRo elsub la Hitlera tiraneco".

Tiuj pensoj ĝenerale respondas al la ideoj de gravega dokumento, konata sub la nomo "Atlantika Ĉarto". Ĝin ellaboris kaj proklamis la 14-an de Aŭgusto 1941 Roosevelt kaj Churchill. Poste aliĝis al ĝi, unu post la alia, ankaŭ la ceteraj membroj de la kontraŭhitlera koalicio. Sovjetunio deklaris sian aprobon de la Ĉarto en Septembro 1941.

La Atlantika Ĉarto enhavas "iajn komunajn principojn" de la du landoj, "principojn, sur kiuj tiuj landoj bazas siajn esperojn pri pli bona estonteco de la mondo", kiel estis akcentite en la Enkonduko de la Ĉarto. En la Ĉarto mem USoNo kaj Britio deklaris, ke ili ne postulas teritoriajn pligrandigojn, sed ke ili ankaŭ ne akceptos kiun ajn teritorian ŝanĝon, kiu ne estas farita kun la aprobo de la interesitaj popoloj. La du grandaj potencoj promesis respekti la rajton de ĉiu popolo "elekti al si la formon de regado, en kiu ĝi deziras vivi".

La aliaj principoj, proklamitaj de la Ĉarto, estas: ekonomia kunlaborado de ĉiuj nacioj kun la celo atingi ekonomian progreson kaj socian sekurecon; partopreno de ĉiuj ŝtatoj en la mondkomerco kaj en la utiligo de la fontoj de krudmaterialoj, libera navigado sur ĉiuj maroj; restarigo de tia paco, kiu al la nacioj certigos sufiĉajn rimedojn por trankvila vivo interne de iliaj limoj; senarmigo de la agresaj nacioj kun la celo konservi la pacon.

El tiuj kelkaj citaĵoj oni vidas, ke la bazo de kunlaborado konsistis

el pluraj punktoj, kiuj estis esence kontraŭaj al la celoj de la potencoj de la Akso. La agprogramo de la brita-usona-sovjeta koalicio celis la nuligon de la rasa ekskluziveco, la restarigon de la egaleco inter la nacioj, la liberigon de la subigitaj nacioj kaj la restarigon de iliaj suverenaj rajtoj, la restarigon de la demokrataj liberecoj kaj la detruon de la nazia aŭ faŝisma reĝimoj.

La programo estis sufiĉe larĝa kaj sufiĉe esperiga. Ĝin akceptis ne nur ĉiuj ŝtatoj de la kontraŭhitlera koalicio, sed ĉirkaŭ ĝi ankaŭ kolektiĝis milionaj amasoj tra la tuta mondo.

Sur tiu ĉi idea bazo konstruiĝadis en pluraj etapoj la Unuiĝintaj Nacioj.

2) Ĉefaj etapoj en la formiĝo de U.N.

La necesa kunlaborado, kiu ne povis esti realigita antaŭ la milito, efektiviĝis – sub la premo de la eventoj – dum la milito. En la kadro de la komune ellaborita strategio, estis faritaj multnombraj decidoj pri la etapoj kaj metodoj de aktiveco kun la fina celo detruo la militan potencon de la Akso.

Ĉiuj ĉi decidoj, kaj politikaj kaj militaj, respeguladis la tiaman profundan realismon de la Aliancanoj en la taksado de la situacio kaj en la prijuĝado de la evolulinio de la interŝtataj kaj internaciaj rilatoj. Neniam oni decidadis ion, kio ne estus realigebla en la proksima estonteco. Tial ili povis esti pli malpli precize efektivigitaj en la antaŭviditaj tempolimoj, kio finfine kondukis al plena venko la 9-an de Majo 1945 en Eŭropo kaj la 2-an de Septembro de la sama jaro en Azio.

Paralele kun la pliboniĝado de la milita situacio sur la frontoj, la ideo pri kreo de nova tutmonda organizaĵo por konservo de la paco, kiu anstataŭigus la malsukcesintan Ligon de Nacioj, ricevadis ĉiam pli konkretajn formojn.

Sur la vojo al tiu celo estas sufiĉe klare distingeblaj kvar ĉefaj etapoj: la unuan karakterizas la harmoniigo de la vidpunktoj inter la Aliancanoj, kaj ĝi finiĝas per la akcepto de la Deklaracio de 26 ŝtatoj la 1-an de Januaro 1942; la dua estas markita de gravaj venkoj sur la batalkampoj, kaj ĝi finiĝas per la plifortiĝo de la Alianco dum la gravaj konferencoj de Moskvo, Teherano kaj Kairo fine de la j. 1943; la trian etapon signas la ellaboro de la ĉefprincipoj de la nova organizaĵo en Dumbarton Oaks en Aŭgusto–Septembro 1944; la kvara finiĝas kun la akcepto de la Ĉarto fine de Junio 1945 en San Francisko.

a) *La unuaj kontaktoj.* – En la momento, kiam Germanio atakis Sovjetunion, ekzistis nenia kontrakto inter Britio kaj Sovjetunio pri reciproka helpo. Tamen, en Moskvo estis tuj starigita kontakto

inter la reprezentantoj de ambaŭ landoj. Jam post kelkaj tagoj, la 12-an de Julio 1941, Britio kaj Sovjetunio subskribis interkonsenton pri komunaj aktivecoj en la milito kontraŭ Germanio. La ĉefa celo de la interkonsento estis formuli rapide du gravajn principojn: tiun pri interhelpo kaj tiun pri rezigno fari apartan packontrakton kun Germanio.

La interkonsento havis provizoran karakteron. Poste, en Majo 1942, la du ŝtatoj subskribis en Londono la Kontrakton pri Alianco en la Milito kontraŭ Hitlera Germanio kaj ĝiaj Aliancanoj en Eŭropo, kaj pri Kunlaboro kaj Reciproka Helpo post la Milito. La Kontrakto preskribis, ke ambaŭ partioj donos unu al alia ĉian eblan helpon en la milito, ke neniu el la subskribintoj komencos la traktadojn kun Germanio, nek subskribos kun tiu ŝtato la packontrakton, sen antaŭa interkonsento kun la alia. En la Kontrakto oni parolis, interalie, pri la kreo de organizaĵo de sekureco kaj pri la ekonomia reekfloro en Eŭropo. Kaj Britio kaj Sovjetunio devigis sin klopodi realigi tiun celon "en intima kaj amika kunlaborado".

Kvankam la unua interkonsento inter USoNo kaj SSSRo – pri la principoj de reciproka helpo en la milito kontraŭ la agreso – estis subskribita nur en Junio 1942, tamen la Prezidanto de USoNo, surbaze de la aktoj de la Kongreso de la 11-a de Marto 1941, estis farinta decidon, en kiu estis akcentite, ke la defendo de SSSRo havas vivgravecon por la sekureco de USoNo. Surbaze de tiu decido, ankaŭ tiuj du ŝtatoj subskribis du provizorajn interkonsentojn, laŭ kiuj USoNo helpis al Sovjetunio.

Grandegan signifon havis la menciita Atlantika Ĉarto, en kiu estis klare formulitaj la celoj de la milito. La akcepto de ĝiaj principoj fare de ĉiuj ŝtatoj-viktimoj de la agreso, prezentis la necesan ideologian bazon por firmigo de la kontraŭhitlera koalicio per novaj sindevigoj. Fakte, la 1-an de Januaro 1942 la oficialaj reprezentantoj de 26 ŝtatoj subskribis en Washington gravan dokumenton, konatan sub la nomo Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj. En ĝi ili deklaris, ke la plena venko super la malamiko estas nepre necesa por protekto de la vivo, de la libereco, de la sendependeco, de la homaj rajtoj kaj justeco. La 26 Nacioj interkonsentis pri kunlaborado kaj pri reciproka helpo "en la komuna batalo kontraŭ la sovaĝaj kaj bestaj potencoj, kiuj celas sklavigi la tutan mondon". Ĉiu el la subskribintaj ŝtatoj devigis sin ne konkludi apartan armisticon ⁽¹⁾ aŭ pacon kun kiu ajn el la malamikaj ŝtatoj.

(1) Armistiko: stato inter la ĉeso de la militaj aktivecoj kaj la subskribo de la packontrakto; interkonsento pri la ĉesigo de la militaj operacioj inter la malamikoj.

La ŝtatoj, kiuj subskribis tiun Deklaracion aŭ kiuj poste aliĝis al ĝi, estis kutime nomataj "Unuiĝintaj Nacioj". Sub tiu nomo ili estis ofte menciataj en diversaj aktoj kaj dokumentoj, ekzemple en la Brita-Sovjeta Kontrakto pri Alianco. Tiele la nomo hejmiĝis en la internacia kaj interŝtata praktiko.

La unuiĝo de la kontraŭnaziaj ŝtatoj surbaze de komuna lukto ĝis la fina venko, iliaj sindevigoj al reciproka helpado, ekskludo de apartaj armistico aŭ paco kun kiu ajn el la malamikaj potencoj – jen la karakterizaj trajtoj de la unua etapo.

b) *Plifortiĝo de la Alianco*. – En la j. 1943 la agresintoj suferis grandajn militajn malsukcesojn. En Februaro la sovjeta armeo venke finigis la faman batalon de Staljingrad. Post alia signifa venko – tiu de Kursk – ĝi plue progresis sur ĉiuj frontoj. Ĝis Novembro 1943 la sovjetaj trupoj progresis pli ol 500 kilometrojn sur la centra parto de la fronto, kaj ĉirkaŭ 1300 kilometrojn en la sudaj regionoj. Tiamaniere ĉirkaŭ du trionoj de la okupita teritorio estis rekonkeritaj de la sovjeta armeo.

La milita potenco de la okcidentaj Aliancanoj multe kreskis kaj tiu ĉi fakto reflektiĝis ankaŭ sur la batalkampoj. La atakoj de la usona-brita aviadilaro fariĝadis ĉiam pli fortaj kaj ĉiam pli detruaj. La Aliancanoj disrompis la germanajn kaj italajn fortojn en Libio, Tripoliso kaj Tunizio. Ili sukcese elŝipigis siajn trupojn unue en Sicilion kaj poste ankaŭ sur la duoninsulon mem. Tio, baldaŭ, kaŭzis la senkondiĉan kapitulacon de Italio la 11-an de Septembro 1943.⁽¹⁾ Tiamaniere forfalis el la malamikaj vicoj unu el la membroj – certe ne la plej malgrava.

En Jugoslavio la liberaj partizanaj taĉmentoj kaj la popola armeo liberigis per siaj propraj fortoj larĝajn teritoriojn de sia lando kaj kaŭzis grandajn perdojn al la okupantoj.

Ĉiuj ĉi faktoj – la venkoj de la sovjeta armeo en Oriento, la sukcesoj de la aliancana milita forto en la Sudo kaj la senkompromisa batalo de Jugoslavio – havis ankaŭ grandegajn moralajn konsekvencojn. Restariĝis la fido je la venko de la justeco. Kreskis la kredo je la fortoj de libereco kaj progreso. La malesperintoj leviĝis, kaj la kuraĝuloj fariĝis herooj. Spirito de rezisto kaj batalemo ekregis la amasojn de la nesklavigeblaj. La naziaj vagonaroj, militaj kolonoj, pontoj, fabrikoj flugis en aeron ĉie tra Eŭropo. La horizontoj klariĝis. La perspektivoj de la fina venko malfermiĝis.

En tiaj cirkonstancoj okazis fine de la jaro 1943 la grandaj konferencoj en Moskvo, Teherano kaj Kairo.

⁽¹⁾ Italio subskribis la kondiĉojn de kapitulaco la 3-an de Septembro, sed la kapitulaco mem okazis nur la 11-an de Septembro.

Por la formiĝo de Unuiĝintaj Nacioj apartan gravecon havas la Moskva konferenco, kiu daŭris de la 9-a ĝis la 30-a de Oktobro. La konferencon partoprenis la ministroj pri eksterlandaj aferoj de Sovjetunio, UŜo kaj Britio. Pri iuj demandoj estis akceptitaj finaj decidoj. Pri aliaj problemoj oni estis atinginta principan interkonsenton, dum la tria kategorio de problemoj estis nur pridiskutita.

La tri ŝtatoj, interalie, akceptis la Deklaracion pri Ĝenerala Sekureco. En ĝi estis ankoraŭfoje akcentite, ke la tri grandaj ŝtatoj daŭrigos sian komunan aktivecon por organizi kaj konservi la pacon kaj la sekurecon. La unuan fojon oni klare parolis pri la fundamento, sur kiu devos baziĝi la estonta internacia organizaĵo por konservo de la internacia paco. Ĝi estis la principo de suverena egaleco de ĉiuj pacemaj ŝtatoj. Tia formulado de la fundamenta principo montras klare, ke oni ne rekonis egalajn suverenajn rajtojn al ĉiuj ŝtatoj, sed nur al tiuj, kiuj laŭ sia reĝimo promesis paceman politikon. Aliflanke, estis rekonita plena egaleco de la suverenaj ŝtatoj. Tio signifas, kiel ni klarigis aliloke, ke la suvereneco de unu ŝtato estas limigita de same tia suvereneco de kiu ajn alia ŝtato.

c) *La interparoloj de Dumbarton Oaks kaj la konferenco de Jalta.* – La plua favora evoluo de la milita situacio sur la batalkampoj kaj la principa akordiĝo pri la neceso fondi novan internacian organizaĵon ebligis la kunvokon de aparta konferenco por ellabori la projekton de statuto por tiu organizaĵo. La konferenco okazis en Dumbarton Oaks, proksime de Washington, en Aŭgusto kaj Septembro 1944. Ĝi ne estis konferenco de grandaj politikistoj, sed renkontiĝo de fakuloj. Ĝia celo estis ellabori fakajn proponojn por kreo de ĝenerala internacia organizaĵo de sekureco.

Pri la rezultoj de la interparoloj en Dumbarton Oaks estis poste publikigita oficiala komuniko. Ĝi enhavis tiujn principojn, sur kiuj – rezulte de la atingita interkonsento – devus baziĝi la nova tutmonda organizaĵo.

La projekto antaŭ ĉio akcentadis, ke la ĉefa celo de la organizaĵo devas esti "la konservo de la internacia paco kaj sekureco, kaj la tiucela entreprenado de efikaj kolektivaj mezuroj". Oni akceptis, do, la principon de kolektiva sekureco. Ĝi signifas, ke la paco estas nedividebla, ke, sekve, rompo de la paco en kiu ajn parteto de la mondo interesas ĉiujn ŝtatojn kaj ke, tial, ili ĉiuj devas entrepreni komunajn paŝojn por konservi aŭ restarigi ĝin.

El la aliaj principoj de la projekto, aparte menciindaj estas la suverena egaleco de ĉiuj pacemaj ŝtatoj kaj la forjeto de la perforto kiel rimedo en la internaciaj rilatoj. La projekto ankaŭ rekonfirmas la gravan principon de internacia juro pri la plenumo de la akceptitaj sindevigoj.

En la aliaj ĉapitroj de la projekto oni parolis pri la membreco, pri la organoj de la estonta organizaĵo, pri iliaj funkcioj kaj rajtoj kaj pri la metodoj por efektiviĝi eventualajn ŝanĝojn en la estonta statuto. Unu tuta ĉapitro de la projekto – la oka – pritraktis la mezurojn por konservo de la internacia paco kaj sekureco, por la malhelpado aŭ sufokado de la agreso.

Pri unu punkto ne estis eble atingi interkonsenton en Dumbarton Oaks. La membroj de la konferenco havis diferencajn vidpunktojn koncerne la voĉdonadon en la estonta Konsilo de Sekureco. Pri tiu demando oni tie akceptis nenian decidon. La afero estis solvita nur poste, dum la konferenco de Jalta (Krimeo), en Februaro 1945. Tie Roosevelt, Churchill kaj Staljin interkonsentis, ke ĉiuj decidoj de la Konsilo de Sekureco devos esti faritaj kun la aprobo de la kvin konstantaj membroj de tiu organo, nome kun la aprobo de UŜo, Sovjetunio, Britio, Francio kaj Ĉinio.

d) *La konferenco de Unuiĝintaj Nacioj en San Francisco.* – La proponoj de fakuloj, ellaboritaj en Dumbarton Oaks, estis transdonitaj al la registaroj de la tri grandaj potencoj por trastudo. Ili estis senditaj ankaŭ al la aliaj Unuiĝintaj Nacioj, ĉar ili devis servi kiel diskutbazo de nova konferenco, akceptonta la statuton de la organizaĵo. Intertempe en Jalta estis solvita la demando pri la proceduro kaj voĉdonado en la Konsilo de Sekureco. Tiamaniere estis kreitaj ĉiuj necesaj antaŭkondiĉoj por kunvoki grandan konferencon de ĉiuj Unuiĝintaj Nacioj, kies celo estis ellabori kaj akcepti la definitivan tekston de la Ĉarto. Ĝi okazis en la lastaj tagoj de la milito, inter la 26-a Aprilo kaj la 26-a de Junio 1945 en San Francisco.

Por doni ioman ideon pri la grandeco kaj la laboro de tiu konferenco, sufiĉas menciigi, ke ĝin partoprenis la reprezentantoj de 50 Unuiĝintaj Nacioj. Entute ĉeestis 282 delegitoj kaj 1444 fakuloj kaj konsilantoj. Dum du monatoj okazis entute 335 kunsidoj de la pleno, apartaj komisionoj kaj diversaj komitatoj.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, solene subskribita la 26-an de Junio 1945 en San Francisco, havas 19 ĉapitrojn kun entute 111 artikoloj. Al la Ĉarto estas aldonita la Statuto de la Internacia Kortumo, kiu havas pliajn kvin ĉapitrojn kun 70 artikoloj.

La nura grandeco de la Ĉarto montras, do, ke la principoj kaj reguloj, kiuj regas la novan organizaĵon, estas multe pli detalaj, ol tiuj de la estinta Ligo de Nacioj, kies Pakto konsistis el nur 26 artikoloj. El teknika-jura vidpunkto la Ĉarto estas multe pli perfekta, ol la Pakto de la Ligo de Nacioj. La rajtoj kaj la devoj de la membroj estas pli precize formulitaj. Same tiel la fundamentaj celoj de la organizaĵo estas multe pli klaraj, ol estis la celoj de la estinta Ligo. Fine la rimedoj por konservi la pacon, pri kiuj disponas la nova

organizaĵo, estas el jura vidpunkto multe pli fortaj, ol estis la rimedoj, pri kiuj disponis la Ligo de Nacioj.

La Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj devis esti ratifita de minimume 29 membroj-fondintoj ⁽¹⁾, inter kiuj la 5 grandaj potencoj. Ĝis la 5-a de Oktobro ĝin ratifis entute 30 ŝtatoj. La 24-a de Oktobro 1945 subskribis la tiama ministro pri eksterlandaj aferoj de UŜo, Byrnes, solenan protokolon pri la ekvalidiĝo de la Ĉarto.

Intertempe la milito finiĝis. La Preparkomisiono de la Organizaĵo kaj la Plenumkomitato, elektitaj de la Konferenco en San Francisko por pretigi la unuan kunvenon de la Ĝenerala Asambleo, finis siajn laborojn. Ankaŭ la aliaj membroj ratifis unu post la alia la Ĉarton. Ne plu estis malhelpoj, ke la Organizaĵo ankaŭ praktike ekfunkciu.

Fakte, estis kunvokita la Ĝenerala Asambleo al sia unua kunveno. Ĝi komenciĝis la 10-an de Januaro 1946 je la 4-a horo posttagmeze en la Centra Halo de la Westminster-Palace en Londono, en la ĉeesto de la reprezentantoj de 51 Unuiĝintaj Nacioj.

La okuloj de la mondo estis direktitaj tien. La koroj de milionoj pleniĝis per nova espero. La lukto por la paco komenciĝis!

Ĉu la esperoj ankoraŭfoje restos nur esperoj?

(1) Kiel membroj-fondintoj de la Organizaĵo estas konsiderataj la ŝtatoj kiuj ĉeestis la konferencon de San Francisko. Pollando, kvankam ĝi ne povis partopreni la laborojn de San Francisko, tamen, estas membro-fondinto kaj por ĝi estis lasita libera loko sur la Ĉarto, por ke ĝi poste povu subskribi la dokumenton.

ĈAPITRO X

LA FUNKCIADO DE UNUIGINTAJ NACIOJ

La Enkonduko de la Ĉarto en alta kaj solena tono esprimas la motivojn, pro kiuj estis fondita la Organizaĵo. Ĝi "belege formulas la idealojn, por kiuj viroj kaj virinoj donadis siajn vivojn dum la milito", kiel diris la brita Ministro-prezidanto, C. Attlee, en sia parolado de la 10-a de Januaro 1946 okaze de la solena malfermo de la unua kunveno de la Ĝenerala Asambleo en Londono.

En la Enkonduko estas antaŭ ĉio dirite, ke la Unuiĝintaj Nacioj decidis kunligi siajn penadojn por "savi la estontajn generaciojn de la fantomo de la milito, kiu jam dufoje en la daŭro de nia vivo kaŭzis al la homaro nepriskribeblajn suferojn". Plue, oni parolas tie pri la "fido je la fundamentaj rajtoj de la homo, je la digno kaj valoro de la homa persono". Estas rekonfirmita la principo pri la egaleco de ĉiuj nacioj, grandaj kaj malgrandaj, de ĉiuj homoj – viroj kaj virinoj. Same tiel la Enkonduko akcentas, ke la celo de Unuiĝintaj Nacioj estas la kreo de tiaj kondiĉoj, en kiuj estos eble realiĝi la justecon kaj la observon de ĉiuj sindevigoj, entenitaj en la internaciaj kontraktoj kaj en la aliaj fontoj de internacia juro. Fine, en la Enkonduko oni parolas pri la bezono helpi la socian progreson kaj la plibonigon de la vivkondiĉoj "en ĉiam pli granda libereco".

La Enkonduko, do, proklamas la plej gravajn celojn de la Organizaĵo: monda paco, egaleco de ĉiuj nacioj kaj de ĉiuj unuopuloj, restarigo de la internacia juro, ekonomia kaj socia progreso.

1) *Nomo kaj celo*

La nova Organizaĵo nomiĝas "Unuiĝintaj Nacioj". En San Francisko diversaj ŝtatoj proponadis aliajn nomojn. Tiel, ekzemple, la delegacio de Urugvajo estis proponinta la nomon "Unio de Popoloj". Kubo estus preferinta la nomon "Mondsocieto de Nacioj", dum la reprezentantoj de Meksikio estis por la nomo "Konstanta Ligo de Nacioj". La projekto de Dumbarton Oaks estis antaŭvidinta la nomon "Ligo de Nacioj".

Ĉiuj ĉi proponoj estis forĵetitaj. Oni akceptis la nomon Unuiĝintaj Nacioj, ĉar tiel nomiĝis, kiel ni vidis, la koalicio dum la milito. Estas sendube, ke tiu nomo pleje taŭgas. Ĝi montras la historian vojon de formiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, ĝi indikas ilian rolon en la milito kaj la kondiĉojn por sukcesa realigo de la rolo, kiun la Organizaĵo devus ludi en la postmilita periodo. Tiu nomo sintezas la estintecon kun la deziroj por la estonteco.

Kvankam la nomo estas nur Unuiĝintaj Nacioj, tamen en la praktiko, precipe en la gazetaro, oni kutime ĝin nomas Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, aŭ, mallongigite, O.U.N.

La ĉefa celo de la Organizaĵo estas sendube la sekurigo de la paco en la tuta mondo. Laŭ la Ĉarto, la Unuiĝintaj Nacioj realigos tiun celon per "efikaj kolektivaj mezuroj", direktitaj al:

- a) malhelpado kaj forigado de „ĉio, kio endanĝerigas la pacon”;
- b) subpremado de ĉiu ajn ago de agreso;
- c) solvado de ĉiuj konfliktoj aŭ situacioj, danĝeraj por la paco.

La Organizaĵo, do, estas devigata entreprenadi kolektivajn mezurojn, en la nomo kaj kun la apogo de ĉiuj siaj membroj, por konservi la pacon aŭ por subpremi la jam faritajn agojn de agreso. Estas menciinde, ke koncerne la unuan punkton, nome la konservon de la paco, la Organizaĵo ne limigos sin nur al forigado de "ĉio kio endanĝerigas la pacon", sed ĝi klopodos atingi, ke tiaj danĝeraj situacioj entute ne ekestu. Tiucele la membroj sin devigis kunlabori en la solvado de ekonomiaj kaj sociaj problemoj.

Kiel oni vidas, la Unuiĝintaj Nacioj devus evoluigi sur tiu kampo pluroblan aktivecon: de la malhelpado de ĉio kio endanĝerigas la pacon, tra la forigado de ĉiu fajrero de danĝero, plue tra la klopodoj solvadi pace la eventualajn konfliktojn kaj danĝerajn situaciojn, ĝis la subpremado de ĉiu ajn jam farita agresago. Por ĉiu el tiuj plurgradaj taskoj, la Organizaĵo disponas pri efikaj juraj rimedoj kun pli aŭ malpli granda deviga forto.

2) *Membreco*

Krom la ŝtatoj, kiuj subskribis kaj ratifis la Ĉarton de San Francisko kaj kiuj estas konsiderataj kiel membroj-fondintoj, al la Organizaĵo povas aliĝi ankaŭ aliaj pacemaj ŝtatoj, se ili akceptas la sindevigojn el la Ĉarto kaj se ili estas kapablaj plenumi ilin. Laŭ la Ĉarto, en la Organizaĵon ne povas esti akceptita kia ajn ŝtato, sed nur tia, kiu donas sufiĉe da garantioj pri sia pacemo. Laŭ la Pakto de la Ligo de Nacioj, tiaspeca limigo por fariĝi membro ne estis antaŭvidita. La nova principo per si mem estas bona. Tamen, en la praktiko estas sufiĉe malfacile decidi ĉu temas fakte pri pacema ŝtato aŭ ne.

Pri la akceptado de la novaj membroj decidas la Ĝenerala Asambleo surbaze de rekomendo de la Konsilo de Sekureco. La Ĝenerala Asambleo decidas pri tio per plimulto de du trionoj, ĉar tiu afero apartenas al la tiel nomataj "gravaj demandoj", pri kiuj ĝi ĉiam decidas laŭ tiu maniero. La Konsilo de Sekureco devas akcepti la rekomendon per plimulto de minimume sep siaj membroj, inter kiuj devas troviĝi la kvin t.n. konstantaj membroj, nome la kvin grandaj potencoj.

Ankaŭ la Pakto de la Ligo de Nacioj preskribadis, ke estas necesa dutriona plimulto de la ĉeestantaj membroj, por ke nova ŝtato estu akceptita. Sed la Pakto ne antaŭvidis la antaŭan decidon en formo de rekomendo fare de la tiama Konsilo. Nun neniu ŝtato povas esti akceptita kiel membro de la Unuiĝintaj Nacioj, se la Konsilo de Sekureco tion ne rekomendas kaj se la Ĝenerala Asambleo tion ne decidas. Estas, do, necesa duobla decido: tiu de la Konsilo en formo de rekomendo kaj tiu de la Asambleo en formo de vera decido.

Laŭ la supraj principoj pluraj ŝtatoj estis akceptitaj en la Organizaĵon, tiel ke hodiaŭ ĝi havas entute 60 membrojn. Ankaŭ aliaj ŝtatoj estis petintaj la aliĝon, sed la situacio evoluis tiel, ke kontraŭ unuj voĉdonis Sovjetunio, kontraŭ la ceteraj esprimis sian nean starpunkton la aliaj konstantaj membroj de la Konsilo, kaj tiele iliaj petoj ne estis solvitaj ĝis la hodiaŭa tago.

La maniero, laŭ kiu oni povas ekŝiĝi el la Organizaĵo, ne estas preskribita. La Pakto de la Ligo de Nacioj havis pri tio regulon. Tio, kompreneble, tute ne signifas, ke la membroj ne povas ekŝiĝi.

Iu ŝtato-membro povas esti eksigita, se ĝi insiste malobservas la principojn de la Ĉarto. La eksigon decidas la Ĝenerala Asambleo je la propono de la Konsilo de Sekureco. Por tiu decido estas necesa kvalifikita plimulto, same kiel por la akcepto en la membrecon. Ĉar ankaŭ la propono de la Konsilo de Sekureco devas esti farita per plimulto de 7 voĉoj inkluzive de la voĉoj de ĝiaj 5 konstantaj membroj, neniu el la 5 grandaj potencoj povas esti eksigita kontraŭ sia volo.

La ŝtatoj-membroj de la Organizaĵo devas konsciencie plenumi ĉiujn preskribojn de la Ĉarto. Sed la Ĉarto donas al ili ankaŭ gravajn rajtojn. Ili partoprenas en la solvado de internaciaj problemoj. Iliaj reprezentantoj elektas la organojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj povas esti elektataj en tiujn organojn. La Ĉarto protektas siajn membrojn de agreso kaj garantias iliajn suverenajn rajtojn. Tial, kaj ankaŭ pro la honoro kaj prestiĝo, multaj ŝtatoj esprimis la deziron fariĝi membroj de la Organizaĵo, sed neniu el la membroj ĝis nun ekŝiĝis.

3) *Organoj*

Por plenumi siajn multnombrajn taskojn, la Organizaĵo havas apartajn organojn. En la Ĉarto (art. 7) estas menciitaj kiel la ĉefaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj: Ĝenerala Asambleo, Konsilo de Sekureco, Ekonomia kaj Socia Konsilo, Kuratora Konsilo, Internacia Kortumo kaj Ĝenerala Sekretario.

La funkcioj kaj kompetentecoj de tiuj organoj estas precize limigitaj. Ĉiu el ili devas plenumi iun taskon, kiu respondas al la fundamentaj celoj de Unuiĝintaj Nacioj. Limigo, tamen, ne signifas disigon de la aliaj organoj kaj apartigon de la komunaj interesoj. Male, el organiza vidpunkto, la organoj de Unuiĝintaj Nacioj estas tiel ligitaj inter si, ke ili fakte prezentas nur partojn de unueca tuto kun unuecaj komunaj celoj. Tiel oni volis atingi, ke ĉiu organo koncentrigu siajn atenton kaj laboron al tiu kampo, kiun difinis por ĝi la Ĉarto, kio, siavice, devus progresigi ankaŭ la komunajn celojn de la tuta Organizaĵo.

Tia organiza strukturo esence diferencas de la organizformoj de la Ligo de Nacioj. Ĝi havis nur la Asambleon kaj la Konsilon, al kiuj estis aldonita la Konstanta Sekretariejo. La kompetenteco inter la Asambleo kaj la Konsilo ne estis sufiĉe klare markita, kio ofte kreis konfuzon, ne necesajn prokrastojn kaj transjetadon de la respondeco de unu el tiuj du organoj sur la alian.

Krom la ĉefaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj, oni povas formi ankaŭ helporganojn, se por tio montriĝas bezono.

La Ĉarto akcentas, ke la ĉefaj kaj helpaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj estas egale alireblaj por la viroj kaj por la virinoj. Tio, cetere, estas konforma al la fundamentaj principoj de la Organizaĵo.

La Unuiĝintaj Nacioj ricevas helpon ankaŭ de flankaj organismoj, kiuj ne povas esti konsiderataj kiel veraj ĝiaj organoj. Temas pri la t.n. specialigitaj institucioj, kies rilatoj kun la Organizaĵo estas reguligitaj en apartaj kontraktoj inter tiuj organismoj kaj la Unuiĝintaj Nacioj pere de la Ĝenerala Asambleo.

Laŭ sia karaktero, la Konsilo de Sekureco kaj la Ĝenerala Asambleo estas politikaj organoj; la Ekonomia kaj Socia Konsilo, La Kuratora Konsilo kaj la Sekretariejo estas teknikaj organoj; la Internacia Kortumo estas jura-juĝa organo.

Oni ne povus diri, ke ĉiuj ĉefaj organoj havas la saman gravecon. La Ĝenerala Kunveno havas la plej larĝan kompetentecon, kaj ĉiuj aliaj organoj devas raporti al ĝi, sed la Konsilo de Sekureco havas la plej gravajn taskojn kaj nur ĝi povas apliki devigajn mezurojn, eĉ uzante militajn fortojn. La Ekonomia kaj Socia Konsilo kaj precipe la Kuratora Konsilo solvadas sendube tre gravajn proble-

mojn, sed ilia aktiveco estas subigita al la postuloj de la Ĝenerala Asambleo kaj ankaŭ de la Konsilo de Sekureco. La Internacia Kortumo havas tute apartan, memstaran pozicion.

La graveco de la organoj manifestiĝas ankaŭ en la karaktero de iliaj konkludoj. Tiurilate plej fortan juran povon havas la verdiktoj de la Internacia Kortumo. La Ĝenerala Asambleo nur malmulte decidas, sed pli multe povas rekomendi. Malpli la Konsilo de Sekureco havas grandan decidopovon, precipe en la plej gravaj aferoj: konservi aŭ restarigi de la paco. Laŭ sia jura karaktero, nur la decidoj estas devigaj, dum la rekomendoj estas nedevigaj deziresprimoj. Tial la rekomendoj de la Ĝenerala Asambleo havas sendube grandan moralan signifon, sed neniuj el la membroj estas jure devigata observi ilin. La du aliaj Konsiloj povas diskutadi, studadi la problemojn kaj fari rekomendojn ĉu al la Ĝenerala Asambleo, ĉu al la Konsilo de Sekureco, aŭ al la membroj mem de la Organizaĵo. Sed tiuj du organoj ne povas decidadi kaj tial la jura forto de iliaj konkludoj ne estas tre granda.

4) *Konsisto kaj funkcioj de la organoj*

Jen, mallonge, la konsisto, la taskoj kaj la roloj de la ĉefaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj:

a) *Ĝenerala Asambleo.* Ĉiu membro de la Organizaĵo estas reprezentita en la Ĝenerala Asambleo per maksimume 5 rajtigitaj delegitoj.

La Ĝenerala Asambleo povas diskutadi pri ĉiuj demandoj krom pri tiuj, kiuj apartenas al la ekskluziva kompetenteco de la Konsilo de Sekureco. Tiel, ekzemple, ĝi pritraktas la ĝeneralajn principojn de kunlaborado inter la membroj kun la celo konservi la internacian pacon kaj sekurecon. Pri tiu punkto ĝi povas "fari rekomendojn al la membroj de la Organizaĵo aŭ al la Konsilo de Sekureco, aŭ al la unuj kaj al la alia". Ĝi, tamen, ne povas fari devigajn decidojn pri la menciita problemoj.

La Ĝenerala Asambleo estas rajtigita studadi la demandojn pri senarmigo kaj pri reguligo de la armigo.

Estas interese, ke la Ĝenerala Asambleo rajtas atentigi la Konsilon de Sekureco je la situacioj, kiuj povus endanĝerigi la internacian pacon kaj sekurecon. Tamen, se la Konsilo jam agas surbaze de la kompetenteco, kiun donas al li la Ĉarto, la Ĝenerala Asambleo povas fari neniajn konkludojn, eĉ ne rekomendojn koncerne tiun konkretan konflikton aŭ danĝeran situacion. Nur se la Konsilo de Sekureco ankoraŭ ne diskutas tiun konflikton aŭ situacion, aŭ se ili ne plu troviĝas sur ĝia tagordo, la Ĝenerala Asambleo povas fari rekomendojn. Sed, ni ripetas, nur rekomendojn kaj ne decidojn.

La Ĝenerala Asambleo havas gravan rolon en la progresigo de la internacia kunlaborado sur la politika kampo kaj en la iompostioma evoluigo de la internacia juro. Unu el ĝiaj taskoj estas rekomendi taŭgajn metodojn por kodigo de la internacia juro. Plue, ĝi povas rekomendi diversajn mezurojn por progresigo de la internacia kunlaborado sur la kampoj de ekonomio, publika sano kaj koncerne sociajn, kulturajn kaj edukajn problemojn. Ĝi fiksas la budĝeton de la Organizaĵo, elektas la nekonstantajn membrojn de la Konsilo de Sekureco, elektas la dekok membrojn de la Ekonomia kaj Socia Konsilo kaj iujn membrojn de la Kuratora Konsilo. Krome, surbaze de la rekomendoj de la Konsilo de Sekureco, la Ĝenerala Asambleo decidas pri la akceptado de novaj membroj, pri la eksigo el la Organizaĵo, pri la elekto de la Ĝenerala Sekretario k.t.p.

Diference de la Ligo de Nacioj, kies Asambleo devis akceptadi la grandegan plimulton de siaj decidoj per ĉiuj voĉoj, la Ĝenerala Asambleo de Unuiĝintaj Nacioj normale decidas per plimulto de voĉoj de la ĉeestantaj kaj voĉdonantaj membroj. Nur pri la gravaj demandoj, menciitaj en la art. 18 de la Ĉarto, la Ĝenerala Asambleo decidas per du trionoj de voĉoj de la membroj ĉeestantaj kaj voĉdonantaj. Al tiuj gravaj demandoj apartenas la elektoj de la membroj de la Konsilo de Sekureco, de la Ekonomia kaj Socia Konsilo kaj de la Kuratora Konsilo. Same tiel, gravaj demandoj estas la konservo de internacia paco kaj sekureco, la budĝeto, la aliĝo kaj eksigo de la membroj k.a.

Komence de ĉiu kunveno la Asambleo elektas la prezidanton kaj la vicprezidantojn, kiuj, kune kun la prezidantoj de la ses grandaj komisionoj, formas la Prezidentaron. La ĉefa laboro de la Asambleo disvolviĝas en la ses grandaj komisionoj, kiuj portas la nomon laŭ la traktataj problemoj: 1) politikaj kaj sekurecaj, 2) ekonomiaj kaj financaj, 3) sociaj, humanecaj kaj kultura, 4) kuratoraj, 5) administraj kaj budĝetaj, 6) juraj. La komisionoj povas formi diversajn komitatojn por trastudi apartajn problemojn. Tiuj ĉi rajtas eventuale krei subkomitatojn.

b) *Konsilo de Sekureco*. En la sistemo de kolektiva protekto de la paco la ĉefan rolon ludas la Konsilo de Sekureco. Akceptante la Ĉarton, la membroj transdonis al ĝi "la ĉefan respondecon por konservo de la internacia paco kaj sekureco" kaj rekonis al ĝi la rajton agi en ilia nomo.

Laŭ la Pakto de la Societo de Nacioj, la milito estis en kelkaj okazoj – kiam, nome, la ŝtatoj elĉerpis ĉiujn antaŭviditajn kaj preskribitajn metodojn – jure permesita. La Ĉarto ĝin malpermesas absolute. La apliko de la militaj fortoj estas ebla nur en la komuna intereso. Pri tio decidas la Konsilo de Sekureco.

La interveno de la Konsilo povas okazi nur sub certaj kondiĉoj.

Aliloke estas jam menciite, ke la ŝtatoj-membroj de la Unuiĝintaj Nacioj devigis sin solvadi ĉiujn konfliktojn per pacaj rimedoj ⁽¹⁾. Sed la Konsilo de Sekureco, al kiu estas konfidita la tasko zorgi pri la mondpaco, povas ankaŭ proprainiciate esplori ĉu iu konflikto aŭ iu situacio povus esti danĝera por la paco. Ankaŭ la Ĝenerala Asembleo aŭ la Ĝenerala Sekretario, aŭ, eĉ, la ŝtatoj-nemembroj (sub certaj kondiĉoj) povas tion fari. En tiaj okazoj, se fakte temas pri danĝera konflikto aŭ danĝera situacio, la Konsilo de Sekureco povas rekomendi al la partioj, ke ili apliku unu el la pacaj metodoj por solvi la konflikton. Tion ĝi faros precipe, se la partioj mem ankoraŭ ne provis solvi la konflikton laŭ unu aŭ pluraj el tiuj metodoj.

Sed, se la partioj jam provis solvi la konflikton – tute egale ĉu laŭ la propra iniciato aŭ laŭ la rekomendo de la Konsilo – kaj ne sukcesis, la Konsilo de Sekureco mem povas rekomendi al la partioj la solvon. Ĝi tion faros ĉiam, kiam la partioj petas ĝin pri tiaspeca interveno. En tiuj okazoj la Konsilo fakte ludas la rolon de iaspeca konciliacia komisiono, aŭ, eĉ, de arbitracia organo ⁽²⁾.

La plej fortajn rajtojn havas la Konsilo en okazo de minaco al la paco, rompo de la paco aŭ ago de agreso (atako). En ĉiuj ĉi cirkonstancoj ĝi posedas ne nur la rajton rekomendi, sed ankaŭ decidadi, nome konkludadi devige kaj por la partioj kaj por ĉiuj aliaj membroj de la Organizaĵo. Se, nome, la konflikto aŭ la situacio aŭ ambaŭ ne plu estas nur danĝeraj por la paco, sed se ili transformiĝis en veran, rektan kaj tre proksiman minacon al la paco, aŭ se la paco jam estas rompita, aŭ se estas farita ago de agreso, la Konsilo de Sekureco tuj faros konkludon – aŭ en formo de rekomendo aŭ en formo de decido, laŭ sia pritakso de la situacio – por konservi aŭ restarigi la pacon. Ĉiuj interesitaj ŝtatoj devas obei tiun konkludon. Se ili ne observas ĝin, la Konsilo devas apliki kontraŭ ili devigajn mezurojn, kiuj povas konsisti el diversaj perfortaj rimedoj sen la utiligo de la militaj fortoj, aŭ el vera milita aktiveco de la Organizaĵo. La unuaj estas, ekzemple, la parta aŭ plena interrompo de ekonomiaj rilatoj, la interrompo de fervojaj, permaraj, peraeraj, poŝtaj, telefonaj-telegrafaj, radiaj kaj aliaj trafikaj ligoj, aŭ eĉ la interrompo de la diplomatiaj rilatoj. La duaj povas konsisti el militaj demonstracioj, blokado aŭ aliaj operacioj faritaj pere de la armitaj fortoj de la membroj de Unuiĝintaj Nacioj.

(1) Vidu ĉap. V, kaj VI.

(2) Vidu p. 55, kaj 56.

La Konsilo alvokas la membrojn de la Organizaĵo apliki unu aŭ plurajn el tiuj mezuroj, kaj la membroj estas jure devigataj observi tiun alvokon, ĉar, ja, temas pri decido.

En ĉiuj militaj aferoj, la Konsilon helpas la Komitato de la Milita Stabo. Ĝi estas subigita al la Konsilo de Sekureco. La jura pozicio de la Komitato estas tiu de teknika-konsila organo.

Kiel oni vidas, la nova Organizaĵo, almenaŭ teorie, disponas pri multe pli grandaj povoj por konservi la pacon, ol la estinta Ligo de Nacioj.

Krom tiu ĉefa tasko, la Konsilo de Sekureco havas ankaŭ aliajn gravajn funkciojn. Sen ĝia konsento, neniuj ŝtato povas esti akceptita en la Organizaĵon. Ĝi rekomendas la eksigon de la membroj. Por la elekto de la Ĝenerala Sekretario estas necesa la rekomendo de la Konsilo. Ankaŭ la planoj por reguligo de la armigo estas farataj de tiu organo. Ĝi partoprenas en la elekto de la juĝistoj de la Internacia Kortumo kaj plenumas diversajn aliajn taskojn, kiujn donas al ĝi la Ĉarto.

La Konsilo de Sekureco konsistas el 11 membroj. Kvin el ili estas konstantaj kaj ses nekonstantaj. La konstantaj membroj estas la kvin grandaj potencoj, nome UŜo, SŜŜR-o, Britio, Francio kaj Ĉinio. La nekonstantajn membrojn elektas la Ĝenerala Asambleo. Ilia ofico daŭras du jarojn, sed ĉiujare estas elektataj po tri nekonstantaj membroj.

Por povi pli efike agi, la Konsilo de Sekureco estas tiel organizita, ke ĉiu ĝia membro devas havi konstantan reprezentanton en la sidejo de la Organizaĵo. Sed, se ĝi tion opinias utila aŭ oportuna, ĝi povas kunveni – same kiel la Ĝenerala Asambleo – ankaŭ en alia loko.

Unu el la plej tiklaj problemoj de la nova Organizaĵo kaj eĉ de la nuntempa mondo, estas la demando pri eventuala reorganizo de la voĉdona sistemo en la Konsilo de Sekureco. Laŭ la Ĉarto, la Konsilo voĉdonas laŭ du manieroj. En ĉiuj proceduraj demandoj estas necesa plimulto de 7 voĉoj de kiu ajn el la Konsilaj membroj, por ke la konkludo estu valida. Por ĉiuj aliaj konkludoj, do por tiuj, kiuj ne rilatas al la proceduro, sed al la esenco mem de la diskutata demando, estas ankaŭ necesa plimulto de 7 voĉoj, sed inter tiuj 7 voĉoj devas troviĝi la voĉoj de la 5 konstantaj membroj de la Konsilo. Tamen, en tiu lasta okazo, se la Konsilo faras konkludon pri apliko de mezuroj por solvo de la konflikto per pacaj rimedoj, tiu membro de la Konsilo de Sekureco kiu eble estas unu el la partioj de la konflikto, devas sin deteni de la voĉdono. Tio praktike signifas, ke la Konsilo de Sekureco povos rekomendi ian pacan metodon por solvo de la konflikto ankaŭ kontraŭ la volo de unu el siaj konstantaj membroj. Sed, ĉar la Konsilo povas en tiuj okazoj nur rekomendi kaj ne decidi,

la koncerna membro ne estos jure devigata observi tiun rekomendon, ĉar la rekomendoj neniam estas devigaj. Se la Konsilo volus agi en la senco de la ĉapitro VII-a de la Ĉarto, nome se ĝi volus per deviga decido apliki perfortajn rimedojn por konservi aŭ restarigi la pacon kaj sekurecon, tion ĝi ne povus fari kontraŭ la volo de kiu ajn el la konstantaj membroj. Por tiuj okazoj, nome, ne estas antaŭvidita la deviga sindeteno de la voĉdono fare de tiu konstanta membro, kiu troviĝas en stato de konflikto kun alia ŝtato. Mallonge, la konstantaj membroj ne devas obei la rekomendojn kaj ne devas sin deteni en okazo de veraj decidoj: kontraŭ ilia volo la Konsilo de Sekureco estas senpova.

Tiu ĉi principo, nomata kutime "principo de unuanimeco", ŝajnas unuavide tre malbona. Fakte, ĝi estas pli realisma, ol oni kutime pensas. Ĝi respegulas sufiĉe fidele la faktan staton. Ĝia unua senco estis, ke la 5 grandaj potencoj devas agi konkorde kaj interkonsente decidadi pri la plej gravaj problemoj en la mondo. Se la principo estus konservinta tiun sian originalan sencon, ĝi tute ne estus tiel malbona, kiel ĝi ŝajnas. Finfine, per jura regulo oni ne povas ŝanĝi la faktajn rilatojn de la fortoj en la mondo. Objektive, reale, efektive tiuj fortoj ekzistas kaj ili estas ĝuste tiaj, kiaj ili estas. Tial eĉ se la principo ne estus akceptita en la prezentita formo, tamen ĝi regus la rilatojn de la ĉefaj potencoj en la mondo. Tial, laŭ nia opinio, la vera problemo ne estas ĉu kaj kiel ŝanĝi tiun principon, sed multe pli kiel atingi, ke la grandaj potencoj trovu fine komunan lingvon por savi sin mem kaj la tutan mondon de la pereco.

c) *Ekonomia kaj Socia Konsilo*. La problemoj, kiuj koncernas diversajn ekonomiajn, sociajn, kulturajn kaj humanecajn demandojn, apartenas al la kompetenteco de la Ekonomia kaj Socia Konsilo. Tiu organo povas aŭ mem studadi la menciitajn demandojn aŭ organizi tiajn studojn pere de apartaj komisionoj. Surbaze de la faritaj esploroj, la Ekonomia kaj Socia Konsilo rekomendas la solvojn al la Ĝenerala Asambleo, al la membroj de la Organizaĵo aŭ al la specialigitaj institucioj. Temas pri institucioj, havantaj ekonomian, socian, kulturen, edukan, sanigan aŭ similan karakteron, kiuj estas jam formitaj aŭ estos fonditaj en la estonteco surbaze de interŝtataj kontraktoj. Tiaj specialigitaj institucioj estas, ekzemple la Monda Poŝta Unio, la Telekomunika Unio, la Internacia Organizaĵo de Laboro, U.N.E.S.K.O. k.a. (1).

La Ekonomia kaj Socia Konsilo konkludis kun multaj specialigitaj institucioj apartajn kontraktojn, en kiuj estas preskribitaj la metodoj kaj formoj de kunlaborado. Tiujn kontraktojn aprobas la Ĝenerala

(1) Pri tiuj organizaĵoj vidu ĉap. XI.

Asambleo, kiu, cetere, donas al la Konsilo instrukciojn pri lia agado.

En la interŝtataj rilatoj la ekonomiaj kaj sociaj problemoj okupas tre signifan lokon. Sen ia stabileco kaj konstanteco en la tuta mondo, ne estas imageblaj amikaj internaciaj rilatoj kaj trankvilo. Tial la Unuiĝintaj Nacioj promesis klopodi plialtigi la vivnivelon kaj forigi la senlaborecon de la larĝaj amasoj (Art. 55 de la Ĉarto). Same tiel la Organizaĵo devigis sin antaŭenigi la ekonomian kaj socian progreson, la respekton kaj protekton de la homaj rajtoj kaj de la fundamentaj liberecoj. La realigo ankaŭ de tiuj gravaj celoj apartenas al la kompetenteco de la Ĝenerala Asambleo kaj, pere de ĝi, al la Ekonomia kaj Socia Konsilo.

La Ekonomia kaj Socia Konsilo konsistas el 18 membroj. Ilin elektas la Ĝenerala Asambleo. La mandato daŭras tri jarojn, sed ĉiujare estas elektataj po ses membroj. Diference de la regulo, akceptita por la elekto de la nekonstantaj membroj de la Konsilo de Sekureco, ĉi tie povas esti reelektitaj tiuj membroj, kies mandato ĵus finiĝis. En la Konsilo ĉiu membro havas unu voĉon.

d) *Kuratora Konsilo.* La Ĉarto antaŭvidas tri kategoriojn de teritorioj, al kiuj oni povas apliki la sistemon de kuratoreco. Al unua kategorio apartenas la teritorioj, kiuj en la momento de subskribado de la Ĉarto ankoraŭ troviĝis sub la reĝimo de mandato de la Ligo de Nacioj. La dua kategorio konsistas el dependaj teritorioj, kiuj povas esti prenitaj de la malamikaj ŝtatoj. Fine, al la tria kategorio apartenas tiuj dependaj landoj (kolonioj), kiuj estos libervole submetitaj al tiu reĝimo fare de la ŝtatoj, kiuj administras ilin.

La celo de kuratoreco estas progresigi la evoluon de la loĝantaro, vivanta sur tiuj teritorioj, en la direkto de aŭtonomio aŭ plena sendependeco. Tio signifas, ke la Unuiĝintaj Nacioj transdonas la kuratorecon super certaj ankoraŭ ekonomie kaj kulture postrestintaj teritorioj al iuj ŝtatoj ne por tio, ke la kuratora ŝtato ekspluatu la teritoriojn sub kuratoreco, sed por ke ili kun la tempo povu fariĝi plene liberaj, sendependaj ŝtatoj. La kuratoreco, krome, havas la celon firmigi la internacian pacon per justa kaj egaleca partoprenado de ĉiuj ŝtatoj-membroj en la ekonomiaj kaj komercaj rilatoj kun la teritorioj sub kuratoreco. Kompreneble, tiuj rilatoj devas ne malutili al la ĉefa celo de la kuratoreco, nome al plena emancipiĝo de tiuj popoloj. Tiele almenaŭ preskribas la Ĉarto!

La kuratoreco fondiĝas per aparta kontrakto inter la interesitaj ŝtatoj. En la kontrakto devas esti klare fiksitaj ĉiuj kondiĉoj de la administrado kaj menciita la ŝtato aŭ la ŝtatoj, kiuj efektivigos la administradon (Administra Potenco). Estas eble, ke la Organizaĵo mem prizorgu la administradon, sed estas ankaŭ eble, ke ĝin

prizorgu unu aŭ pluraj ŝtatoj (individua aŭ kolektiva administrado). En la kontrakto iu teritorio povas esti difinita kiel strategia. Tiam karakteron povas havi aŭ la tuta teritorio troviĝanta sub kuratoreco, aŭ nur unu ĝia parto.

La fakto, ke iu teritorio estas proklamita strategia, havas gravajn konsekvencojn ankaŭ el jura kaj teknika organiza vidpunkto. La kontraktoj pri kuratoreco devas esti aprobitaj. Se temas pri strategiaj teritorioj, la kontrakton aprobas la Konsilo de Sekureco. Male, se temas pri nestrategiaj teritorioj, tion faras la Ĝenerala Asambleo. Ankaŭ post la aprobo, la du organoj dividas la kompetentecon koncerne la teritoriojn sub kuratoreco. Se temas pri strategiaj teritorioj, la Konsilo de Sekureco estas kompetenta. Se temas pri la aliaj teritorioj, la kompetenteco apartenas al la Ĝenerala Asambleo. Al ambaŭ – al Asambleo kaj al Konsilo de Sekureco – helpas aparta organo: la Kuratora Konsilo.

La nombro de la membroj en la Kuratora Konsilo ne estas fiksa. Membroj de tiu organo estas ĉiuj ŝtatoj, kiuj laŭ la menciitaj kontraktoj administras tiajn teritoriojn. Se unu aŭ pluraj konstantaj membroj de la Konsilo de Sekureco administras neniun teritorion sub kuratoreco, tiam ankaŭ tiu aŭ tiuj ŝtatoj estas membroj de la Kuratora Konsilo. Kiam tiamaniere estas fiksita unu parto de la membroj de la Konsilo, la Ĝenerala Asambleo elektas la alian parton. Tiu alia parto devas konsisti el ĝuste tiom da membroj, ke, kune kun la konstantaj membroj de la Konsilo de Sekureco, kiuj administras neniun teritorion, ĝi egalas al la nombro de membroj, kiuj administras tiajn teritoriojn. Ĉiuj membroj de la Konsilo havas la samajn rajtojn. Ne gravas, do, ĉu ili fariĝis membroj tial, ĉar ili administras kuratorajn teritoriojn, aŭ tial, ĉar ili estas konstantaj membroj de la Konsilo de Sekureco, aŭ tial, ĉar ilin elektis la Ĝenerala Asambleo.

En la Kuratora Konsilo, same kiel en la Ekonomia kaj Socia Konsilo, ĉiuj konkludoj estas farataj per simpla plimulto. La konkludoj havas karakteron de rekomendoj.

La Konsilo havas la taskon studadi la raportojn de la Administraj Potencoj, akceptadi petskribojn de la loĝantaro, preparadi oficialajn inspektajn vizitojn al la teritorioj sub kuratoreco, zorgi ke la kuratorecaj kontraktoj estu plenumataj kaj ke la preskriboj de la Ĉarto estu observataj. Pri ĉio ĉi la Konsilo faras raportojn kaj proponojn al la Ĝenerala Asambleo aŭ, se temas pri strategiaj teritorioj, al la Konsilo de Sekureco. La decidan vorton havas tiuj du organoj.

e) *Sekretariejo*. Ekzistas unu centra teknika organo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu per sia laboro kunligas ĉiujn aliajn organojn, en

kiu estas koncentrigitaj ĉiuj fadenoj de la Organizaĵo kaj pere de kiu ĝi rilatas kun la membroj kaj kun la aliaj internaciaj organizaĵoj. Tiu organo estas la Sekretariejo. Ĝi konsistas el la Ĝenerala Sekretario kaj el necesa oficistaro. La Ĝeneralan Sekretarion elektas la Ĝenerala Asambleo, sed ĝi povas elekti nur personon, kiun al ĝi rekomendis la Konsilo de Sekureco.

La Ĝenerala Sekretario rajtas ĉeesti ĉiujn kunvenojn de la aliaj organoj. Li ankaŭ rajtas atentigi la Konsilon de Sekureco pri ĉio, kio – laŭ lia opinio – povus endanĝerigi la pacon kaj sekurecon.

La oficistaron de la Sekretariejo nomas la Ĝenerala Sekretario mem. Li devas atenti, ke la nomataj personoj havu la necesajn kvalifikojn kaj kapablojn. Same tiel li devas atenti al principo, ke la oficistaro devas konsisti el ŝtatanoj de kiom eble plej multe da Unuiĝintaj Nacioj.

Kaj la Ĝenerala Sekretario kaj la cetera oficistaro estas respondecaj nur al la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj. Ili ne rajtas ricevi instrukciojn de siaj propraj registaroj aŭ de kiu ajn alia registaro. Aliflanke, la membroj devas respekti la internacian karakteron de la pozicio kaj de la Ĝenerala Sekretario kaj de la oficistaro laboranta en la Sekretariejo.

f) *Internacia Kortumo*. Ĝi estas la jura kaj juĝa organo de la Organizaĵo. Pro ĝia graveco estis necese prezenti ĝian funkciadon kaj rolon en aparta ĉapitro ⁽¹⁾.

(1) Vidu ĉap. VI.

ĈAPITRO XI

ALIAJ INTERŜTATAJ ORGANIZAĴOJ

La Unuiĝintaj Nacioj estas la ĉefa interŝtata organizaĵo de la hodiaŭa mondo. Sed ĝi ne estas la sola. Krom ĝi, ekzistas ankaŭ aliaj gravaj organismoj, kiujn – uzante la terminojn de la Ĉarto – oni povas dividi je du grupoj: regionaj organizaĵoj kaj specialigitaj institucioj.

La unuajn pritraktas aparta ĉapitro de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj (ĉap. VIII). Pri la duaj parolas pluraj artikoloj de la Ĉarto (precipe art. 57 kaj 63).

1) *Regionaj organizaĵoj*

Diference de la Pakto de la Ligo de Nacioj, kiu ne antaŭvidis la kompletigon de la ĝenerala sistemo de kolektiva sekureco per apartaj kontraktoj aŭ organizaĵoj por regiona sindefendo, la Ĉarto eksprese⁽¹⁾ permesas la ekziston kaj funkciadon de tiaspecaj regionaj kontraktoj aŭ organizaĵoj. Eĉ pli, la Konsilo de Sekureco devas stimuli "la evoluon de la paca solvado de lokaj konfliktoj surbaze de tiuj regionaj kontraktoj aŭ pere de regionaj institucioj".

Jam la projekto de Dumbarton Oaks antaŭvidis la ekziston de regionaj organoj kaj la aplikon de regionaj mezuroj por konservi la internacian pacon. La kondiĉo estis, ke la regionaj kontraktoj

(1) Al la signifoj de tiu radiko, donitaj en la Plena Vortaro, mi sentas min devigata aldoni plian sencon. La franca esprimo *expressément* (angle *expressly*, germane *ausdrücklich*, serbe-kroate *izričito* k.t.p., kio respondas al la latina "*expressis verbis*") estis ĝis nun diversmaniere tradukata en Esperanton: intence, klare, malkaŝe k.t.p. Neniu el tiuj vortoj povas kontentigi la bezonojn de preciza jura termino. Tial mi uzas *eksprese* en la senco "malsubkomprenige" – proksimume! Ekzemple: "tiu kazo estas *eksprese* antaŭvidita en la leĝo" signifas, ke ĝuste tiu kazo (kaj ne iu alia) estas per klaraj vortoj, "malkaŝe", "eldirite" menciita, kaj ne signifas, ke oni povus konkludi pri ĝi el la kunteksto aŭ el abstrakta regulo.

aŭ la regionaj organizaĵoj harmoniu kun la celoj de Unuiĝintaj Nacioj. La Ĉarto akceptis tiun kondiĉon.

Se ekzistas tiaj regionaj kontraktoj aŭ se jam formiĝis tiaj regionaj organizaĵoj, la Konsilo de Sekureco devas klopodi, ke la eventuala konflikto estu solvita antaŭ ĉio surbaze aŭ pere de ili.

Pluraj regionaj kontraktoj estas jam subskribitaj fare de la membroj de Unuiĝintaj Nacioj. En ĉiu el ili estas menciite, ke ĝi estas en harmonio kun la Ĉarto, sed oni malfacile povus aserti, ke ĉiam estas fakte tiele.

El la organizaĵoj, kiujn oni povus konsideri kiel konformajn al la koncepto de regiona organizaĵo en la senco de la Ĉarto, estas menciinda nur la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj. La Araba Ligo havas kelkajn trajtojn de tiaspeca organizaĵo. La organizo de Eŭropo estas nur en formiĝo. Ĝia Konsulta Asambleo estas provizore senpova kaj la Konsilo neaktiva.

Regiona organizaĵo devus ampleksi grandajn teritoriojn, ekzemple tutan kontinenton aŭ alian larĝan spacon, sur kiu la diversaj ŝtatoj havas apartajn komunajn interesojn. La celo de regiona organizaĵo estas la progresigo ĝuste de tiuj komunaj interesoj. Aliflanke, en okazo de konflikto, la ŝtatoj-membroj de regiona organizaĵo devus klopodi solvi ĝin per rimedoj kaj laŭ la metodoj, kiujn antaŭvidas la kontrakto aŭ la Ĉarto de la koncerna organizaĵo. Nur en okazo de malsukceso, devus ekfunkcii la mekanismo de Unuiĝintaj Nacioj. Fine, la Konsilo de Sekureco devus esti helpata de la regionaj organizaĵoj, kiam ajn ĝi aplikas la devigajn rimedojn.

Laŭ sia jura karaktero, la regionaj organizaĵoj estas iaspecaj konfederacioj. En la nuna momento ili povas esti tre taŭgaj ĝermoj, el kiuj kun la tempo elkreskos la grandaj federaciaj ŝtatoj de la estonteco. La regionaj organizaĵoj estas, do, subtenindaj ne nur kiel elementoj de paco sur vastaj spacoj, sed ankaŭ kiel unua paŝo al plua unuecigo de la homaro.

a) *Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj.* – Post la liberiĝo de la mezamerikaj kaj sudamerikaj landoj sentiĝis ĉiam pli la bezono pri pli intima kunlaborado inter la ŝtatoj de la nova kontinento. Tiu ideo estas forte ligita al la nomo de la granda batalanto por la libereco Bolivar. Post la unuaj kongresoj en Panamo (1826) kaj Limo (1847/48 kaj 1864/65), okazis la granda konferenco de la latinaj-amerikaj ŝtatoj en Montevideo (1888/89). Tie estis ellaborita granda nombro da konvencioj pri kunlaborado sur la kampo de aŭtoraj rajtoj, patentoj, kriminala, komerca, procedura juroj k.a.

Post la konferenco de Montevideo okazis multaj aliaj konferencoj kaj kunvenoj, kiuj plifirmigis la rilatojn inter la amerikaj ŝtatoj

kaj multobligis iliajn reciprokajn ligojn.

La organizaĵo, fondita en la j. 1889, nomiĝis Internacia Unio de Amerikaj Respublikoj. Ĝi havis sian konstantan oficejon, kiu nomiĝis Konsilo (Oficejo) de la Panamerika Unio. Sub tiu nomo, pli ol sub sia vera nomo, la tuta organizaĵo estis konata de la larĝa publiko.

La strukturo de la organizaĵo estis plurfoje ŝanĝita. Sian nunan formon ĝi ricevis en la j. 1948 (la 30-an de Aprilo), kiam estis subskribita en Bogota la Ĉarto de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, konata sub la nomo Ĉarto de Bogota.

La organoj de la Organizaĵo estas la Interamerika Konferenco kaj la Administra Konsilo.

En la Interamerika Konferenco estas reprezentitaj ĉiuj ŝtatoj-membroj. Tiu organo regule kunvenas ĉiun kvinan jaron, sed ĝi povas esti kunvokita ankaŭ al eksterordinara kunveno. Krome estas antaŭviditaj apartaj konferencoj por pritrakti specialajn fakajn demandojn. La urĝajn komunajn problemojn povas solvi la kunvenoj de la ministroj pri eksterlandaj aferoj.

La Administra Konsilo kun la sidejo en Washington havas tre larĝajn povojn. Ĝi konsistas el la reprezentantoj de ĉiuj ŝtatoj. La prezidanto estas elektata ĉiun jaron. La reprezentanto de la sama ŝtato ne povas esti elektita du fojojn unu post la alia.

La Administra Konsilo estas helpata de tri teknikaj organoj: Interamerika Ekonomia kaj Socia Konsilo, Interamerika Jura Konsilo, Interamerika Kultura Konsilo.

La sekretario, nomata Panamerika Unio, havas sian sidejon en Washington. Ĝi konsistas el Ĝenerala Sekretario, elektata ĉiun dekan jaron, kaj el la necesa oficistaro. La Sekretariejo estas la centra teknika organo de la Organizaĵo.

La Organizaĵo evoluigis ampleksan aktivecon sur ĉiuj kampoj de ekonomia, kultura, jura kaj politika kunlaborado. Grandan signifon havas la laboro koncerne la pacan solvodon de internaciaj konfliktoj. En la kadro de la organizaĵo estis tiurilate ellaborita aparta sistemo, aplikota nur al la amerikaj ŝtatoj. Jam en la konferenco de Habana (1928) la atakmilito estis proklamita internacia krimo. La partoprenintaj ŝtatoj devigis sin solvadi siajn konfliktojn nur per pacaj metodoj ⁽¹⁾. Unu jaron poste estis en Washington subskribita la ĝenerala kontrakto pri deviga arbitrado. En la jaroj antaŭ la milito kaj dum la milito ĉiam pli firmiĝis la kunlaborado de la amerikaj ŝtatoj, kaj pluraj konvencioj kaj deklarioj formulis kaj reguligis la rilatojn inter ili. Tiele, ekzemple, la Konferenco de

(1) Vidu ĉap. V.

Habana, okazinta en 1940, proklamis la gravan principon, ke ĉiu elektera atako kontraŭ kiu ajn amerika ŝtato estos konsiderata kiel atako kontraŭ ĉiuj subskribintoj de la koncerna Deklaracio. Tiu tuta evoluo havis sian kulminan punkton en Bogota (1948), kiam estis akceptita ne nur la Ĉarto de la Organizaĵo, sed ankaŭ gravaj konvencioj pri la politikaj kaj civitanaj rajtoj de la virinoj, deklaracio pri la rajtoj kaj devoj de la homo, ekonomiaj interkonsentoj kaj la Pakto pri la Solvado de Konfliktoj. Tiu kontrakto anstataŭigas la antaŭajn. Ĝi devigas ĉiujn amerikajn ŝtatojn solvadi siajn konfliktojn per pacaj rimedoj: de la diplomataj traktadoj ĝis la Internacia Kortumo en Hago.

b) *Araba Ligo*. – Tiu organizaĵo estas multe malpli firme kunligita ol la Organizaĵo de la Amerikaj Ŝtatoj. Ĝi estis fondita per la kontrakto de la 22-a de Marto 1922. Membroj de la Ligo estas sep arabaj ŝtatoj. Ili devige promesis harmoniigi sian politikan aktivecon, entreprenadi komunajn paŝojn por sia defendo kaj solvadi siajn reciprokajn konfliktojn pere de arbitracio aŭ mediacio. La Ligo havas sian Konsilon sed ĝiaj decidoj estas devigaj nur por tiuj el la membroj, kiuj akceptas ilin. Ĉiu membro povas eksiĝi el la Ligo, kiam ĝi tion trovas oportuna.

La Ligo havas la celon ebligi intiman kunlaboradon inter la membroj ankaŭ koncerne ekonomiajn, financajn, kulturajn, sociajn kaj aliajn demandojn.

Ĝis nun, bedaŭrinde, la Araba Ligo ne sukcesis atingi iajn pli rimarkindajn pozitivajn rezultojn.

2) *Specialigitaj Institucioj*

En la dua duono de la XIX j.c., paralele kun la evoluo kaj multobliĝo de la teknikaj rimedoj de komunikado, kun la kresko de la produktorimedoj kaj kun la ĉiam pli sentebla interdependeco de la mondaj partoj, fondiĝis pluraj interŝtataj organizaĵoj. Ilia celo estis reguligi la rilatojn inter la ŝtatoj sur diversaj kampoj: ekonomia, trafika, kultura k.t.p.

El organiza vidpunkto tiuj interŝtataj organismoj tiel similis kaj similas unu al la alia, ke vere oni povas paroli pri tipa strukturo. Kutime ili havas tri organojn: la ĝeneralan konferencon, la plenumkomitaton kaj la oficejon.

La ĝenerala konferenco konsistas el la reprezentantoj de ĉiuj

ŝtatoj-membroj de la koncerna organizaĵo. Ĝi donas la ĝeneralajn instrukciojn por la agado, kutime en formo de konvencioj, decidis pri la budĝeto, elektas aŭ nomas la membrojn de la aliaj organoj.

La plenumkomitato konsistas el malgranda nombro da membroj, kiujn kutime elektas la ĝenerala konferenco. Kelkfoje la pli grandaj aŭ la pli interesitaj ŝtatoj havas en la plenumkomitato konstantajn lokojn. La plenumkomitato faras siajn decidojn en la limoj de la statuto de la koncerna organizaĵo, de la instrukcioj donitaj al ĝi de la ĝenerala konferenco kaj, eventuale, de apartaj konvencioj.

La oficejo, nomata kelkfoje sekretario, estas la konstanta teknika organo, kiu kolektas kaj donas informojn, studas la problemojn, preparas la konferencojn kaj kunsidojn, korespondas k.t.p.

Kelkaj organizaĵoj havas ankaŭ aliajn organojn. Por studo de specialaj problemoj ili povas krei komisionojn aŭ komitatojn, kiuj povas havi pli aŭ malpli konstantan karakteron.

En la momento, kiam okazis la Konferenco de San Francisko, ekzistis multaj tiaj organizaĵoj kaj estis antaŭvideble, ke aliaj formiĝos en la estonteco. Konsiderante ilian gravecon por la internacia vivo, la Konferenco de San Francisko decidis, ke la Unuiĝintaj Nacioj fariĝu centro por reguligo kaj harmoniigo de ilia aktiveco. Pro la fakto, ke temas pri organizaĵoj kun specialaj taskoj sur apartaj kampoj, la Ĉarto nomis ilin "specialigitaj institucioj".

Ĉiu el la specialigitaj institucioj, kiu jam ekzistas aŭ kiu kreiĝos en la estonteco, ligiĝas al la Unuiĝintaj Nacioj per kontrakto inter OUN kaj la koncerna organizaĵo.

La ĉefaj specialigitaj institucioj estas:

a) *Internacia Organizaĵo de Laboro*. – Tiu ĉi institucio estis fondita post la Unua Mondmilito. En Decembro 1946 ĝi fariĝis specialigita institucio de OUN. La celo de I.O.L. estas plibonigi la staton de la laboristaro en la tuta mondo.

La organiza strukturo de la Internacia Organizaĵo de Laboro estas tre aparta, kvankam ankaŭ ĝi havas la trimenciitajn organojn.

La Internacia Konferenco de Laboro estas la fundamenta organo. Ĝi konsistas el po kvar delegitoj de ĉiu el la ŝtatoj-membroj. El tiuj kvar delegitoj, du reprezentas la registaron, unu la laboristojn kaj unu la labordonantojn. Tiamaniere la Konferenco konsistas ne nur el la reprezentantoj de la ŝtatoj, sed ankaŭ rekte de la klasoj. La principo per si mem ŝajnas bona. Eble ĝi povos esti utiligata en la estonteco kiel modelo por kreo de tutmonda politika organizaĵo (kia nun estas la OUN) kun pli da morala forto pro la rekta influo de la amasoj en ĝi. Sed en I.O.L. la principo ne donis iajn speciale signifajn rezultojn, ĉar la reprezentantoj de la laboristaro estas proporcie tro malmultaj. Pro tio oni proponadis ŝanĝojn.

Francio, ekzemple, konsilis dum la konferenco de Montreal (1946), ke la Internacia Konferenco de Laboro konsistu el po du reprezentantoj de la registaro, de la laboristoj kaj de la labordonantoj. Tiu propono ne estis akceptita. Konsiderante, ke, ja, temas pri la intereso de la laboristaro, ni opinias, ke estus plej juste, se duono de la reprezentantoj apartenus al la laboristaro, kvarono al la registaro kaj kvarono al la labordonantoj.

La administradon de la organizaĵo gvidas la Administra Konsilo. Ĝi konsistas el 32 membroj, kiujn elektas la Internacia Konferenco de Laboro. Duono de la membroj devas aparteni al la reprezentantoj de la registaroj, kvarono al la laboristaro kaj kvarono al la labordonantoj. En ĝi, do, estas aplikita la sama principo, kiel en la Konferenco.

La tria organo estas la Internacia Oficejo de Laboro, kiu havas sian direktoron. Ĝi estas teknika-administra organo.

I.O.L. ne havas la rajton mem realigi siajn proponojn. Ĝi nur esploras, studas, pritraktas kaj faras proponojn aŭ en formo de rekomendoj aŭ en formo de konvenciprojektoj. La ŝtatoj-membroj decidas mem, ĉu ili akceptos tiujn proponojn aŭ ne. Ankaŭ tiu ĉi karaktero de ĝiaj decidoj multe malhelpas la realigon de la fundamenta celo: la altigon de la vivnivelo de la laborulaj amasoj.

b) *U.N.E.S.K.O.* – La Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo estis fondita en la j. 1945. Ĝia speciala tasko estas antaŭenigi la internacian kunlaboradon sur la kampo de edukado, scienco kaj kulturo.

La organoj de *U.N.E.S.K.O.* estas la tri tipaj: a) Ĝenerala Konferenco, konsistanta el delegitoj de ĉiuj membroj, b) Plenumkomitato el 18 membroj, kiujn elektas la Ĝenerala Konferenco kaj kiuj devas aparteni al diversaj geografiaj kaj kulturaj regionoj, c) Sekretariejo kun la Ĝenerala Direktoro, kiun, laŭ la propono de la Plenumkomitato, nomas la Ĝenerala Konferenco.

La sidejo estas en Parizo. La unua Ĝenerala Direktoro estis la fama angla biologo Julian Huxley, kaj la nuna estas D-ro Torres Bodet.

Por povi pli sukcese efektivigi siajn taskojn, *U.N.E.S.K.O.* kunlaboras kun diversaj kulturaj, sciencaj kaj edukaj internaciaj privataj asocioj. Unu el ili estas Universala Esperanto-Asocio. Kiel specialigita institucio de Unuiĝintaj Nacioj, *U.N.E.S.K.O.* nun studas la petskribon pri Esperanto, kiun subskribis pli ol 16 milionoj da personoj kaj kiun meze de 1950 U.E.A. estis transdoninta al la Ĝenerala Sekretario de O.U.N.

Membroj de *U.N.E.S.K.O.* estas aŭtomate ĉiuj ŝtatoj-membroj de O.U.N. La aliaj ŝtatoj povas fariĝi membroj, se ilin akceptas la

Ĝenerala Konferenco per kvalifikita plimulto de du trionoj. Privataj institucioj kaj organizaĵoj ne povas esti ĝiaj membroj nek, kompreneble, esti reprezentitaj en la organoj. Tio estas la ĉefa manko de la organizaĵo. Se ĝi baziĝus sur la sama principo kiel I.O.L., certe ĝi povus multe pli sukcese plenumadi sian taskon. Eble en la estonteco tio okazos!

c) *Organizaĵo por la Agrikulturo kaj Nutrado*. – Fondita en 1945, la Organizaĵo ellaboris ampleksan programon: altigo de la agrikultura produktado, kvalita plibonigo de la nutraĵoj, perfektigo de la internacia interŝanĝado de nutraĵoj, amasigo de nutraĵoj kaj ilia distribuo en okazo de nutrajaj krizoj, stabiligo de la prezoj k.t.p.

La organoj estas: Konferenco, Konsilo (18 membroj) kaj Oficejo kun la Ĝenerala Direktoro. Strukturo tipa.

d) *Internacia Organizaĵo por la civila Aviado*. – En 1919 estis fondita la unua internacia organizaĵo pri aviado: Internacia Komisiono pri Aviado. Ĝi troviĝis sub la protekto de la Ligo de Nacioj kaj ĝi havis ĉefe konsultan kaj informan karakteron.

La nova organizaĵo estis fondita en 1944 en Chicago. Ĝia celo estas reguligi la aertrafikon. La Organizaĵo ellaboris plurajn regularojn, kiuj koncernas la aeran navigadon.

La organoj estas: Kunveno (reprezentitaj ĉiuj membroj), Konsilo (22 membroj, elektataj inter tiuj membroj, kiuj pleje kontribuas al aera trafiko), Aviada Komisiono (fakuloj, nomataj de la Konsilo).

e) *Aliaj organizaĵoj*. – El la aliaj organizaĵoj oni povas mencii nur kelkajn. Ilia nomo montras la celon, por kiu ili agas: Monda Organizaĵo pri Sano, Internacia Valuta Fondaĵo kaj Internacia Banko por la Rekonstruo kaj Progresigo, Monda Poŝta Unio, Internacia Komerca Organizaĵo, Monda Meteorologia Organizaĵo, Internacia Organizaĵo por la Rifuĝintoj (I.R.O.), Internacia Unio por la Protekto de Industria Propraĵo, Internacia Unio por la Protekto de Literaturaj kaj Artaj Verkoj, Unio por la Protekto de Submaraj Kabloj, Internacia Oficejo por la Mezuroj kaj Pesiloj, Internacia Instituto por Esploro de la Malvarmo k.t.p., k.t.p.

Kelkaj el tiuj organizaĵoj jam faris kontraktojn kun la Unuiĝintaj Nacioj kaj fariĝis specialigitaj institucioj. Kun la aliaj oni faros tiajn kontraktojn. Ĉiujn ĉi kontraktojn konkludas la rajtigitaj organoj de la koncernaj organizaĵoj kaj la Ekonomia kaj Socia Konsilo de O.U.N. La kontraktojn devas aprobi la Ĝenerala Asambleo.

La laboro de la specialigitaj organizaĵoj estas tre grava el pluraj vidpunktoj. Ili ebligas kaj faciligas la internaciajn kontaktojn en plej diversaj sferoj. La ordinara civitano malofte pensas kiom da komplikaj proceduroj estas necesaj por ebligi bonan funkciadon de la poŝto, telegrafo, radio, aera navigado k.t.p. en internaciaj kadroj.

Kompreneble, la specialigitaj institucioj, en kiuj laboras miloj da fakuloj el ĉiuj partoj de la mondo, povus atingi ankaŭ pli rimarkindajn rezultojn, se la ĝenerala politika situacio estus pli favora al amikeca, intima internacia kunlaborado.

Oni povas kun sufiĉa certeco antaŭvidi, ke la specialigitaj institucioj ludos en la estonteco ĉiam pli gravan rolon. Ŝajnas, tamen, ke, krom la ĝenerala pliboniĝo de la politika situacio en la mondo, estos necesaj ankaŭ kelkaj strukturaj reorganizoj de tiuj institucioj, por ke ili povu pli sukcese ol ĝis nun plenumi siajn taskojn. En ili devos esti estontece reprezentitaj ne nur la ŝtatoj, sed ankaŭ diversaj fakaj asocioj kaj almenaŭ la plej gravaj sociaj kaj kulturaj movadoj.

ĈAPITRO XII

KONKLUDO

Oni povas facile rimarki, ke la esenca problemo de la hodiaŭo estas la demando kiamaniere pace, sen milito solvi la fundamentan antagonismon inter la ĝisnunaj, jam malnoviĝintaj aspektoj de socia-politika kunvivado kaj la aspiroj al kreo de novaj, ampleksaj formoj, kiuj respondos ne nur al la jam atingita evolugrado de la tekniko kaj ĝenerale de la materia kulturo, sed ankaŭ al la brilaj perspektivoj en tiu sfero por la estonteco.

Tiu ĉefa problemo inkluzivas kaj kaŭzas grandan nombron da aliaj. Siavice ili elvokas novajn problemojn kaj problemetojn. Ĉiuj estas kunligitaj, influantaj unu la alian kaj influataj reciproke.

Nia socia realaĵo estas markita de tri gravaj faktoj: la ekzisto de nacioj, la ekzisto de ŝtatoj, la kunekzisto de du sistemoj en la tutmonda komunajo.

Persone, subjektive oni povas havi tiun aŭ alian starpunkton rilate al tiu realaĵo. Oni povas ĝin aprobi aŭ ne, oni povas deziri la konservon aŭ la malaperon de la nacioj, la plifortigon aŭ nuligon de la ŝtato, la detruon de unu el la du sistemoj aŭ de ambaŭ aŭ ilian pluan kunekzistadon, sed nei tiujn faktojn ne eblas. Same tiel ne estas eble neglekti ilian grandegan influon je la materia kaj spirita vivo de la homoj.

La granda problemo de la nova epoko ĝis la fino de la XIX j.c. estis koincidigi nacion kaj ŝtaton: krei nacian ŝtaton. Hodiaŭ la problemo havas alian aspekton, pli larĝan kaj pli kompleksan: kaj vivi en sia nacio kaj, samtempe, en multe pli granda ekonomie kaj politike organizita unuo kaj, krome, almenaŭ ĝis certa grado, esti apartenanto de la mondo.

En la nunaj historiaj kondiĉoj, la solan taŭgan solvon por la unuaj du aspiroj povas doni la federalisma principo. La trian provizore, preskaŭ eksperimente, provas kontentigi diversaj interŝtataj organizaĵoj.

Ankaŭ la konceptoj – rezulte de la enhavo, kiu kondiĉas ilin – havas sian fizionomion. La karaktero de unuj estas viveca, dinamika; tiu de aliaj peza, statika. La vortoj *internaciismo*, *federalismo*, *universalismo* estas flirtantaj standardoj impete trenantaj en la estontecon; la vortoj *ŝtato*, *nacio*, *diplomatio* estas rustintaj ŝtalaj ĉenoj katenantaj al la pasinteco. La demando ne estas ĉu resti en la ĉenoj aŭ sekvi la standardojn. Ne, la problemo estas: kiel nevundite elgliti el la ĉenoj por sekvi la standardojn!

Ĝuste tion – eviti la mortigajn vundojn – celas kelkaj gravaj principoj de la nuntempa internacia juro: absoluta malpermeso de la agreso, paca solvado de la konfliktoj, protekto de la homa persono.

Se oni vere volas la pacon – kaj pri tio, ŝajnas, nun ĉiuj konsentas –, tiam oni devas malebligi la militon. Sur la jura kampo oni faris tion proklamante ĝin internacia krimo. Tamen, nur formale malpermesi la militon kaj apogi tiun malpermeson per kriminalaj sankcioj, ne estas ankoraŭ sufiĉa garantio de la paco. Se oni samtempe ne disponigas efikajn rimedojn por detrui la radikojn de la milito kaj se oni ne kanalizas la pasiojn kaj la kontraŭajn interesojn en la pli trankvilajn akvojn de justeco kaj jura reguligo, la nura malpermeso ne povas eliri el la kadro de pure abstrakta deziro. Tion bone pruvigis la antaŭmilita sperto.

Tial, unuflanke, la klopodoj estis direktitaj al protekto de unu el la bazaj ŝtonoj por konstruo de la paco: la homaj rajtoj kaj liberecoj. La difino de la militkrimo kaj de la krimo kontraŭ la homeco en la aktoj de la 8-a de Aŭgusto 1945, la konvencio pri genocido, la akcepto de la Universala Deklaracio – ĉio ĉi estas nur la unuaj pozitivaj paŝoj, faritaj survoje al la solvo de la granda problemo: garantiĝi al la homo vivon dignan de Homo.

La alian flankon de la postulo – kanalizati la kontraŭaĵojn – kontentigas – sed, por la momento, nur parte – la nuna sistemo de pacaj rimedoj por solvado de internaciaj konfliktoj. La ĉefa problemo restas la plilarĝigo de la deviga arbitrado kaj, tute speciale, de la deviga kompetenteco de la Internacia Kortumo. Granda estas la batalo inter la diversaj starpunktoj koncerne tiun demandon. Kia maniere tiu grava problemo povas reflektiĝi je nuraj tri unuavide malgravaj vortetoj, montras sufiĉe klare la studo, publikigita en la Aldono.

La celo de tiu ĉi libro ne estas solvi la menciitajn problemojn. Ĝia tasko estas kontribui al pli bona kompreno de la demandoj, kiuj disŝiras kaj turmentas la hodiaŭan mondon. Krome, nur modeste flustreti la manieron, laŭ kiu ili eble povus esti solvitaj.

La solvo interesas kaj la homaron kiel tuton kaj ĉiun unuopan homon. Eĉ pli, nur la aktiva partopreno de la larĝaj popoltavoloj,

la apogo de la publika opinio al ĉiuj pozitivaj, progresemaĵ tendencoj povos doni vere kontentigajn rezultojn. Sed, por partopreni en la solvado de problemoj, por aktive apogi pozitivajn tendencojn, oni devas antaŭ ĉio koni kaj la socian fenomenon kaj la demandojn ligitajn al ĝi. Kaj koni iun fenomenon ne signifas havi scion nur pri ĝiaj aktualaj konsistigaj elementoj, sed ankaŭ pri ĝia historio kaj pri la kondiĉoj, kiuj ĝin kaŭzis. Alivorte, la fenomenojn ni devas observi – ĝi estu ankoraŭfoje akcentita – en ilia dinamika procezo kaj ne kiel statikajn, senmovajn faktojn. Tiamaniere ni povos ilin pli bone koni, kompreni kaj fronti. Tiamaniere ni ankaŭ povos pli facile ilin solvi. Ĉar bone koni signifas duone solvi!

ALDONO

LA SIGNIFO DE LA VORTOJ „ĈARTO DE UNUIGINTAJ NACIOJ” EN LA ART. 36/I DE LA STATUTO DE LA INTERNACIA KORTUMO EN HAGO

La art. 36/1 de la nova Statuto de la Internacia Kortumo en Hago tekstas laŭvorte:

”La kompetenteco de la Kortumo etendiĝas al ĉiuj aferoj, kiujn la partioj en konflikto submetos al ĝi, kaj al ĉiuj kazoj, kiuj estas speciale antaŭviditaj en la *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj* aŭ en la validaj kontraktoj kaj konvencioj”.

Kiel oni vidas, se en ĝi ne troviĝus la vortoj rilatantaj al la ”Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj”, ĝi estus identa al la art. 36/1 de la Statuto de la malnova Konstanta Kortumo de Internacia Justeco. Sajnas, do, unuavide, ke la deviga kompetenteco de la Kortumo estas larĝigita al aro de kazoj speciale menciitaj en la Ĉarto. La konsekvencoj, se estus vere tiel, estus gravegaj. Tio signifus, ke en la Ĉarto troviĝas pluraj aŭ almenaŭ unu kazoj, kiuj – sen ia ajn plua interkonsento de la partioj – senpere fondas la kompetentecon de la Kortumo por ĉiuj ŝtatoj-membroj de U.N.

Tamen, legante la Ĉarton de la komenco ĝis la fino eĉ kun la plej granda atento, oni neniel povas trovi tian ”speciale antaŭviditan kazon”. Ĝi, tute simple, ne ekzistas. La Ĉarto nenie antaŭvidas, ke la ŝtatoj-membroj estus devigataj submeti al la Kortumo iajn konfliktojn aŭ iajn kategoriojn de konfliktoj. Sed, aliflanke, la Statuto, malgraŭ tiu fakto, parolas ĝuste pri tiaj speciale antaŭviditaj kazoj. Tial ekestas demando kian sencon kaj kian atingopovon havas la mencita nova preskribo de la art. 36/I, kiun la antaŭa Statuto ne konis.

Sajnas, ke principe povus ekzisti nur tri eblecoj de respondo kaj ke la ĝusta respondo devas troviĝi en unu el ili.

1) *Kombino de pluraj artikoloj*

La unua ebleco estus, ke oni interpretu tre larĝe la vorton "speciale" (en la franca teksto "*spécialement*", en la angla "*specially*"). Al ĝi oni ne devus doni la kutiman signifon, kiu proksimiĝas al la koncepto "eksprese" ⁽¹⁾, sed oni devus ĝin kompreni en senco multe pli nedefinita. Tia larĝa senco ebligus la starigon de tezo, ke per la vortoj "kazoj antaŭviditaj en la Ĉarto" oni ne pensis al tiaj kazoj, kiuj per klaraj kaj sendubaj esprimoj fondas la kontraŭdiran kompetentecon de la Kortumo, sed al kia ajn kombino de diversaj artikoloj de la Ĉarto, el kiu oni povus konkludi, ke por iu konkreta konflikto estas fakte fondita ĝia deviga kompetenteco.

Ni opinias, ke la vortoj "speciale antaŭviditaj" povas signifi nenion alian, ol ke tia kazo fakte estas per sendubaj vortoj eksprese menciita en la Ĉarto. Tia kazo, kiel dirite, ne ekzistas. Pro tiu nura fakto ni opinias, ke estas neeble kia ajn spekulacia kombinado. Sed, eĉ se oni cedus kaj se oni akceptus la vidpunkton, ke la novan preskribon oni ne rajtas kompreni tiel, kiel ĝi estas skribita, ke, do, estas permesite per lerta intelekta manovrado kaj kunligado de diversaj artikoloj de la Ĉarto malkovri novan kazon de deviga kompetenteco de la Kortumo – kvankam ĝi ne estas "speciale", t.e. eksprese antaŭvidita –, tamen eĉ en tia okazo oni ne povus atingi la deziritan rezulton.

En la ĝisnuna tre modesta praktiko de la Internacia Kortumo oni jam, fakte, provis interpreti la pritraktatan parteton de la art. 36/1 ĝuste en tiu senco.

En la konflikto inter la Unuiĝinta Reĝlando de Granda Britio kaj Norda Irlando, unuflanke, kaj la Popola Respubliko Albanio, aliflanke, Britio levis unuflankan akuzon kontraŭ Albanio antaŭ la Kortumo. En tiu akuzo estis, interalie, menciitaj la elementoj, sur kiuj la akuzanto bazas la kompetentecon de la Kortumo, kiel tion preskribas la art. 32/II de la Kortuma Regularo.

Por ke oni komprenu la konstruon de la kompetenteco el la brita akuzo, oni devas akcenti, ke inter la du partioj ekzistis neniam kontrakto, kiu fondus la devigan kompetentecon de la Kortumo en okazo de konflikto. Same tiel ne ekzistis kompromiso, kiu fondus la kompetentecon por tiu konkreta konflikto. Krome, Albanio ne estis kaj ne estas membro de Unuiĝintaj Nacioj, nek ŝtato-membro de la Statuto kaj tial, eĉ se ĝi estus volinta, ĝi ne estus povinta subskribi la fakultativan klaŭzon el la art. 36/II de la Statuto. Mallonge, inter Britio kaj Albanio, en la momento de la akuzo, ne estis kontraktita

(1) Pri la vorto "ekspresa" vidu la noton sur p. 120.

la kompetenteco de la Kortumo. Eĉ pli, en tiu momento la akuzita partio tute ne havis la partikapablon, nome la kapablon aperi kiel partio antaŭ la Kortumo.

Ekzistis, tamen, la Rezolucio de la Konsilo de Sekureco, per kiu ĝi "rekomendas al la Registaroj de la Unuiĝinta Reĝlando kaj de Albanio transdoni tuj tiun konflikton al la Internacia Kortumo, konforme al la preskriboj de la Statuto". Ekzistis ankaŭ la deklaro, kiun la albana registaro estis farinta en la senco de la art. 32 de la Ĉarto antaŭ ol ĝi estis allasita diskuti la konflikton antaŭ la Konsilo de Sekureco. Per tiu deklaro la albana registaro estis akceptinta por la konkreta konflikto ĉiujn sindevigojn, kiujn en sama okazo estus havinta kiu ajn membro de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

Tia fakta stato servis al la brita registaro kiel bazo de la tezo pri deviga kompetenteco de la Kortumo. En la akuza akto estis dirite laŭvorte: "La Kortumo estas kompetenta en la senco de la art. 36/I de sia Statuto, ĉar temas pri kazo speciale antaŭvidita en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj . . ." ⁽²⁾. En la sama akto estis, plue, pli detale klarigita tiu tezo. La akuzo asertis, ke:

a) la Konsilo de Sekureco direktis, per sia rekomendo de la 9-a de Aprilo 1947, la partiojn al la Kortumo;

b) Albanio akceptis por la konkreta konflikto ĉiujn sindevigojn, kiujn en simila kazo havus kiu ajn membro de U.N.;

c) la membroj de U.N. devas, en la senco de la art. 25 de la Ĉarto, plenumi ĉiujn decidojn de la Konsilo de Sekureco, do ankaŭ la rekomendojn el la art. 36 de la Ĉarto.

Sekve, la "speciale antaŭvidita kazo" estus trovebla en la kombino de la art. 36/III kaj 25 de la Ĉarto kaj, por la ŝtatoj kiuj ne estas membroj, ankoraŭ en ligiteco kun la art. 32 de la Ĉarto, se, kompreneble, estas plenumitaj la kondiĉoj, kiujn postulas tiu ĉi artikolo. Ĉar por la provo de teoria konstruo de tia nova kazo de deviga kompetenteco de la Kortumo la art. 32 de la Ĉarto havas nenian signifon (ĝi, ja, estas nur ponto, tra kiu ankaŭ la ŝtatoj-nemembroj de la Organizaĵo povas esti inkluzivataj en ĝian juran sistemon), restas nur la art. 36 kaj 25 de la Ĉarto.

La art. 36 troviĝas en la ĉapitro VI de la Ĉarto, kiu koncernas la pacan solvado de internaciaj konfliktoj. Laŭ tiu ĉapitro, la Konsilo de Sekureco havas la rajton nur rekomendi. Tute aparte, la paragrafo III de la art. 36 preskribas, ke la Konsilo de Sekureco, se antaŭ ĝi troviĝas konflikto havanta juran karakteron, devas per

⁽²⁾ Recueil des Arrêts, avis consultatifs et ordonances, Affaire du Detroit de Corfou, Arrêt du 25/III/1948, paĝo 17.

rekomendo direkti la partiojn al la Internacia Kortumo.

Temas nun pri jeno: ĉu tia rekomendo povas esti deviga por la partioj kaj, se ĝi fakte havus devigan karakteron, ĉu ĝi povus prezenti tiun "speciale antaŭviditan kazon" el la art. 36/I de la Statuto?

En la sistemo de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj la rekomendoj povus havi devigan karakteron nur en la okazo, se ili apartenus al kategorio de decidoj el la art. 25 de la Ĉarto. Tiu artikolo, nome, diras, ke la membroj de la Organizaĵo devigas sin akcepti kaj plenumi la *decidojn* de la Konsilo de Sekureco konforme al la Ĉarto. Oni devas rimarkigi, ke, fakte, laŭ pluraj artikoloj de la Ĉarto, la koncepto de decido enkadrigas ankaŭ tiun de rekomendo. Tiele, tute speciale, la art. 27/III de la Ĉarto parolas pri ĉiuj decidoj de la Konsilo de Sekureco – krom pri tiuj, kiuj koncernas la proceduron – kaj aparte ankaŭ pri la "decidoj", kiujn la Konsilo faras en la senco de la ĉapitro VI de la Ĉarto, kvankam tiu ĉapitro mencias nur la "rekomendojn". Tial oni povus konkludi, ke ankaŭ la "decidoj" el la art. 25 de la Ĉarto ampleksas ne nur la decidojn en la strikta senco de la vorto (ekzemple tiujn el la ĉap. VII de la Ĉarto), sed ankaŭ la rekomendojn kaj ĉiujn aliajn esprimojn de volo de tiu organo, senkonsidere al la formo, en kiu tiu volo manifestiĝas (propono, alvoko). Tiamaniere oni povus jene konstrui la aferon:

1) La rekomendoj el la ĉapitro VI, do ankaŭ la rekomendoj el la artikolo 36/III de la Ĉarto, estas decidoj en la senco de la art. 27/III de la Ĉarto.

2) Laŭ la art. 25 de la Ĉarto la decidoj estas devigaj.

3) Sekve, ankaŭ la rekomendoj el la art. 36/III estas devigaj.

4) Tial la rekomendoj (= decidoj) de la Konsilo de Sekureco, per kiuj la partioj estas direktitaj al la Kortumo, estas la "kazoj speciale antaŭviditaj en la Ĉarto" el la art. 36/I de la Statuto.

5) Rezulte, la deviga kompetenteco de la Kortumo estas plilarĝigita; ĝi etendiĝas al ĉiuj ĉi kazoj; la rekta akuzo estas permesita kaj la akuzita partio estas devigata respondi al la akuzo kaj veni antaŭ la Kortumon.

Tiu tuta artefarita konstruo, kiu unuavide ŝajnas tre logika, malsanas je gravega difekto. La vorto "decido" (en la franca teksto "*décision*", en la angla "*decision*") estas en la supraj premisoj formale precize reproduktita el la cititaj artikoloj, sed ĝi ne estas en ĉiu el ili uzita en la sama senco kaj kun la sama enhavo ⁽³⁾. La

⁽³⁾ La prikantata precizeco de la du lingvoj kaj ilia kvazaŭa perfekta taŭgeco por la bezonoj de la diplomatio kaj de la internacia juro montriĝas tiamaniere ankoraŭ unu plian fojon kiel pura bluf. Cetere, la Ĉarto abundas je lingvaj kaj precipe tradukaj eraroj.

Ĉarto en kelkaj lokoj nomas "decidoj" ĉiujn esprimojn de volo de la unuopaj organoj de U.N., do ankaŭ tiujn, kiuj en aliaj artikoloj estas nomataj "rekomendoj, proponoj, alvokoj" k.t.p. Sed en aliaj lokoj ĝi nomas "decidoj" nur tiujn volesprimojn, kiuj estas devigaj por la partioj, kiuj, do, estas veraj decidoj en la strikta senco de la vorto. La uzado de la sama esprimo (decido) por du esence diferencaj aferoj treniĝas tra la tuta Ĉarto kaj ne koncernas nur la Konsilon de Sekureco. Tiele, ekzemple, la art. 18 de la Ĉarto diras, ke la "decidoj en gravaj demandoj al kiuj apartenas la rekomendoj koncerne la konservon de la paco kaj sekureco . . ." estas farataj k.t.p. Ĉi tie, sendube, la vorto "decido" estas uzita en la pli larĝa senco. Male, en kelkaj aliaj artikoloj ĝi estas uzita en la strikta senco kaj ĝi estas diferencigita de "rekomendo". La art. 94, ekzemple, rajtigas la Konsilon de Sekureco "fari rekomendojn aŭ decidi mezurojn", por ke la verdikto de la Kortumo estu plenumita. Estas pli ol evidente, ke en tiu okazo oni faras diferencon inter "rekomendo" kaj "decido". Se ne estus tiel, la rajtigo ne estus donita alternative. Ĉi tie la vorto "decido" estas uzita en la strikta senco, kiu neniel povas ampleksi la koncepton de "rekomendo" ⁽⁴⁾.

Same tiel en la art. 27 de la Ĉarto, kiu parolas pri la decidoj (fakte konkludoj) de la Konsilo de Sekureco – do pri ĉiuj ĝiaj "decidoj", senkonsidere al la nomo, kiun ili portas en la aliaj artikoloj – la vorto "decido" estas uzita en la larĝa senco kaj fakte rilatas ankaŭ al la rekomendoj. Male, la art. 25 traktas nur pri la decidoj en strikta senco, kiuj ĝuste kiel veraj decidoj estas antaŭviditaj en diversaj aliaj artikoloj, tute aparte en la ĉapitro VI.

Nur tia interpretado de la artikolo 27 de la Ĉarto estas ĝusta kaj korekta. Tio sekvas el ĝia tuta teksto. Ĉetere oni ne rajtas forgesi, ke la "decidoj", pri kiuj parolas la art. 25, devas esti faritaj "konforme al la Ĉarto". La Konsilo povos solvi la aferon per deviga decido nur se iu ekspresa preskribo ĝin rajtigas al tio. En nia okazo la artikolo 36/III de la Ĉarto ne donas al Konsilo de Sekureco la rajton decidi, sed nur rekomendi. Tial, eĉ se la Konsilo de Sekureco intence aŭ erare nomus iun tian rekomendon decido, tiu "decido" ne estus "konforma al la Ĉarto" kaj tial ĝi neniel povus havi pli da jura forto ol la rekomendo.

Oni venas al la sama rezulto, se oni esploras la historion de la art. 25. Dum la Konferenco de San Francisko, en la komitato tiam

(4) En Esperanto, por eviti ĉian ajn konfuzon, estus bone nomi la decidojn en la larĝa senco "konkludoj" kaj konservi la vorton "decido" nur por vera, deviga decido. Sekve, la "decidoj" el la art. 27 aŭ 18/I estus „konkludoj”, sed la vorto "decido" devus resti en la art. 25, en la ĉapitro VII, en la art. 94/II k.a.

okupiĝanta pri la organizo kaj proceduro de la Konsilo de Sekureco, estis starigita la demando kion fakte signifas la vortoj "decidoj de la Konsilo de Sekureco" en la art. 25. En la diskuto precipe partoprenis la reprezentantoj de Belgio, Kanado kaj UŜoNo. Laŭ la opinio de la diskutantoj, la Konsilo de Sekureco povas decidadi nur en la limoj, kiujn fiksas la Ĉarto en la diversaj artikoloj. La delegacio de Belgio eĉ proponadis amendamenton, por ke la sindevigoj de la membroj estu ankoraŭ pli klare precizigitaj, sed la plimulto en la Komitato opiniis, ke tio estas superflua (5). Same tiel, en alia komitato, nome en la Dua Komitato de la Tria Komisiono, estis plurfoje akcentite, ke la rekomendoj de la Konsilo de Sekureco, faritaj en la senco de la ĉapitro VIII – Sekcio A de la projekto de Dumbarton Oaks (nun ĉapitro VI de la Ĉarto) neniel devigas la partiojn en konflikto (6).

El ĉio dirita sekvas, ke la artikolo 25 parolas nur pri la decidoj en strikta senco de la vorto. Nur ili estas devigaj por la membroj de U.N., kaj por la nemembroj sub la kondiĉoj de la art. 32 de la Ĉarto. Sed al tiu kategorio tute ne apartenas la rekomendoj. Tiuj ĉi, kiel aparta kategorio de konkludoj de U.N., havas sian propran juran naturon. Ili, sendube, ne estas senigitaj de ĉia jura signifo. La rekomendoj havas karakteron de deziro, sugesto. Ili eĉ povas en kelkaj okazoj enteni iajn nuancojn de premo, sed ili ne estas kaj ne povas esti devigaj por la partioj. Per tiu karakteriza trajto la rekomendoj diferencas de la decidoj en la sistemo de la Ĉarto.

La starpunkto de la Internacia Kortumo ne esprimiĝis tute klare en la menciita verdikto de la 25-a de Marto 1948. En tiu proceso la Kortumo konstatis sian kompetentecon surbaze de letero de la registaro de Albanio de la 2-a de Julio 1947 kaj, cetere, la partioj, antaŭ ol estis eldirita la verdikto, konkludis kompromison, tiel ke la plua proceso – tiu pri la afero mem – evoluis surbaze de tiu dokumento. La Kortumo en sia verdikto, do, ne pritraktis la demandon, ĉu la kombino de la art. 25 kaj 36/III de la Ĉarto prezentas novan kazon de deviga kompetenteco en la senco de la nova art. 36/I de la Statuto. Sed sep juĝistoj, el dekkvin entute, donis apartan opinion, en kiu estas eksprese akcentite, ke la argumentoj de la partio-akuzanto favore al ia speciala, nova kazo de deviga kompetenteco, ne estas konvinkaj. Al tiu starpunkto de sep regulaj juĝistoj de la Kortumo aliĝis ankaŭ la juĝisto *ad hoc* (provizora) de Albanio, tiel ke entute

(6) Dokumentoj pri la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj en San Francisko (en angla kaj franca lingvoj) Volumo XI, p. 388 kaj s.

(6) Dokumentoj pri la Konferenco de U.N. en San Francisko, Vol. XII, p. 69 kaj Vol. XI, p. 95.

ok juĝistoj donis sian opinion pri tiu grava demando (7). Konsiderante, ke la aliaj regulaj juĝistoj ne esprimis sin, sed ke tre verŝajne almenaŭ ankoraŭ unu plia havus la saman opinion kiel la sep menciitaj, oni povas diri, ke ankaŭ la vidpunkto de la Kortumo estas proksimume identa al la prezentita.

Fine, se la art. 36/III de la Ĉarto, en kunligiteco kun la art. 36/I de la Statuto, estus fakte enkondukinta novan kazon de deviga kompetenteco, tio signifus tiel gravan eventon, ke tre verŝajne pluraj ŝtatoj estus rifuzintaj ratifi la Ĉarton. En ĉiu okazo, en la raporto de la delegacioj al la registaroj certe oni trovus mencion pri tio. Laŭ nia scio, tia interpretado de la menciitaj artikoloj – krom en la akuza akto de Britio kontraŭ Albanio – estas netrovebla. Male, en diversaj raporto de diversaj delegacioj al siaj registaroj kaj en la diskutoj, ekestintaj surbaze de tiuj raporto en la kompetentaj organoj de la koncernaj landoj, ĉiam oni akcentadis, ke la Konsilo de Sekureco ne havas la rajton devigi la partiojn submeti sian konflikton al la Kortumo (8).

Kiel oni vidas, la nova kazo ne nur ne estas eksprese antaŭvidita, sed ĝi ankaŭ ne estas trovebla, se hazarde ĝi kaŝiĝis inter la linioj de la diversaj artikoloj.

La unua hipotezo devas, do, esti forĵetita.

2) *Eraro de redaktado*

La dua ebleco estus, ke ĉi tie temas pri simpla eraro de redaktado. Por tiu tezo sufiĉe konvinke luktas la historio de tiuj kelkaj vortoj.

Kiamaniere, envere, ili eniris en la artikolon 36/I de la Statuto?

Antaŭ la komenciĝo de la konferenco en San Francisko, okazis en Washington aparta konferenco de juristoj sub prezido de unu el la nunaj juĝistoj de la Kortumo, Hackworth. Tiu konferenco diskutis ankaŭ la grandan problemon de plilarĝigo de la Kortuma kompetenteco. Pluraj delegitoj opiniis, ke tre verŝajne la Ĉarto enhavos ian

(7) Vidu la menciitan verdikton, p. 31 kaj sekv.

(8) Vidu ekzemple: Report to the President of the results of the San Francisco Conference by the Chairman of the United Nations Delegation, the Secretary of State, Department of State Publication 2349, Conference Serie 71, paĝo 79 – Department of External Affairs, Conference Series 1945, No. 2, Ottawa, paĝo 33 kaj s. – Hearing before the Committee on Foreign Relations United States Senate, seventy-ninth Congress, first session on the Charter of the United Nations for the maintenance of international peace and security submitted by the President of United States on July 2, 1945 (Unrevised), July 10, 1945, Washington, 1945, paĝo 103 kaj sekv. – Republica de Chile, Ministerie de la Externe: Chile y la Conferencia de San Francisco, Santiago, MCD XLV, p. 45.

regulon pri la deviga kompetenteco de la Kortumo por ĉiuj membroj de la fondota Organizaĵo en difinitaj kazoj. Tiel okazis, ke en la projekton de la nova Statuto – en la art. 36/I – oni enmetis la vortojn "Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj aŭ...". Unu el la membroj de la Jurista Komitato, Jules Basdevant – la nuna prezidanto de la Kortumo – esprimis sin jene en sia raporto de la 25-a de Aprilo pri tiu punkto: "Tiu teksto reproduktas la art. 36 de la Statuto kun unu aldono por la okazo, ke la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj antaŭvidus la devigan kompetentecon" ⁽⁹⁾.

En San Francisko du Komitatoj okupiĝadis pri la demando: la Unua Komitato de la Kvara Komisiono (1/IV) kaj la Dua Komitato de la Tria Komisiono (2/III). La Komitato 1/IV havis la taskon ellabori la Statuton de la Kortumo. La Komitato 2/III devis prizorgi la ĉapitron VI de la Ĉarto pri la paca solvado de internaciaj konfliktoj. Sekve, por la art. 36 de la Statuto estis kompetenta la Komitato 1/IV, por la art. 36 de la Ĉarto estis kompetenta la Komitato 2/III. Tiu ĉi lasta komitato, kiu – kiel dirite – okupiĝis pri la ĉapitro VI de la Ĉarto, finis sian laboron jam komence de Junio 1945. En tiu tempo, do, la membro de la Komitato 2/III, Basdevant, sciis, ke en la ĉapitro VI ne estos antaŭvidita iu kazo de deviga kompetenteco de la Kortumo, kiel oni tion esperis dum la Jurista Konferenco de Washington, kelkajn monatojn pli frue.

En tia situacio aperis Jules Basdevant la 6-an de Junio en la Kvara Komisiono, kiun prezidis membro de la delegacio de USoNo, Hackworth. En tiu Komisiono J. Basdevant proponis, ke oni forstreku la vortojn "Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj aŭ", ĉar ŝajnas – li diris – "ke la Ĉarto donas al la Kortumo nenian kompetentecon, en neniuj okazoj." Tamen tiuj vortoj ne estis forstrekitaj. En la protokolo pri tiu kunsido estas nur menciite, ke "estas esprimita ankaŭ kontraŭa opinio, laŭ kiu la paragrafo VI de la ĉapitro VIII de la Ĉarto (oni pensas fakte al la projekto de Dumbarton Oaks kaj ne al la Ĉarto, rim. de I.L.) rilatas al deviga direktado de iuj aferoj al la Kortumo fare de la Konsilo de Sekureco. Tial estas decidite nenion forstreki" ⁽¹⁰⁾. Tiel, laŭvorte, tekstas la protokolo. Kiu "esprimis la kontraŭan opinion" kaj kiel li ĝin pravigis, tio ne estas videbla el la dokumento. Same tiel oni ne vidas, ĉu per la vortoj "iuj aferoj" oni eble pensis al la juraj demandoj, pri kiuj la Konsilo de Sekureco povas konsulti la Kortumon en la senco de la art. 96/I de la Ĉarto. Restas, do, plene sekretaj la motivoj, kiuj igis la Komisionon lasi tiujn vortojn.

⁽⁹⁾ Dokumentoj pri la Konferenco de U.N. en S. Francisko, Vol. XIV, p. 872.

⁽¹⁰⁾ Dokumentoj pri la Konferenco de U.N. en S. Francisko, Vol. XIII, p. 290.

Unu afero estas certa: inter la Komitato 1/IV kaj la Komitato 2/III ne ekzistis la necesa intima kunlaborado. La Kvara Komisiono, ŝajnas, tamen opiniis, ke ekzistas iuj kazoj speciale antaŭviditaj en la Ĉarto, kvankam la membroj de la Komitato 2/III sciis la malon. Pro la terura rapideco, kiu regis la lastajn tagojn de la Konferenco, estas tre kredeble, ke oni dediĉis nenian atenton al la vortoj, kiuj estis enmetitaj en la artikolon 36/1 de la Statuto. Eble oni estus forstrekinta tiujn vortojn, se oni estus rimarkinta ilin kaj se fakte per ili oni volis fondi novan kazon de deviga kompetenteco en la konfliktoj inter la ŝtatoj-membroj. Temus, do, pri simpla eraro de redaktado.

Sed el la dokumentoj pri la Konferenco de San Francisko ne estas eble konstati kun senduba certeco, ke fakte tiuj kelkaj vortoj restis nerimarkitaj kaj ke tial ili restis en la definitiva teksto, nek ke per la vortoj "kazoj antaŭviditaj en la Ĉarto" oni pensis ĝuste al iuj kazoj de deviga kompetenteco de la Kortumo en la konfliktoj inter la ŝtatoj-membroj. Kontraŭ la opinio, ke ĉi tie temas nur pri simpla eraro de redaktado, leviĝas ankaŭ la ĝenerale konata regulo, ke ĉiu parto, eĉ ĉiu vorteto de analizata teksto devas esti tiel interpretita, ke tiu parto aŭ vorteto havu ian sencon. Tial ni opinias, ke estas malfacile defendebla la tezo pri redakta eraro.

3) *Konsulta kompetenteco*

Fine, ekzistas ankoraŭ unu ebleco de interpretado. La art. 36/I de la Statuto parolas ĝenerale pri la kompetenteco de la Kortumo. Kiel konate, la Kortumo estas kompetenta ne nur por solvado de konfliktoj inter la partioj (kontraŭdira kompetenteco), sed ankaŭ por esti konsultita pri juraj demandoj (konsulta kompetenteco). La ĉapitro IV, kiu rilatas al tiuj konsilaj opinioj de la Kortumo, ne troviĝis en la Statuto de la estinta Konstanta Kortumo de Internacia Justeco el la jaro 1920. Nur okaze de la revizio, farita en la j. 1929, la ĉap. IV eniris en la Statuton. Tiu ĉapitro, kun kelkaj malgrandaj ŝanĝoj, troviĝas ankaŭ en la nova Statuto de la nuna Kortumo.

En la art. 65/I de la nova Statuto oni, vere, diras, ke la Kortumo povas doni konsilan opinionon pri kiu ajn jura demando konforme al la Ĉarto, sed nek en tiu artikolo, nek en la ĉap. IV, nek en kiu ajn alia loko de la Statuto estas io ajn eksprese dirita pri la konsulta kompetenteco de la Kortumo.

Se, do, la konsulta kompetenteco estus neniel – nek eksprese nek alimaniere – antaŭvidita en la Statuto, tio sendube estus ia manko, almenaŭ el formala vidpunkto. Estas vero, ke tia manko ekzistis en la estinta Statuto, sed tio tute ne signifas, ke ĝi devas troviĝi ankaŭ

en la nova. En la teksto de la j. 1920 la Statuto eĉ ne havis apartan ĉapitron pri la konsilaj opinioj, nek ĝi enhavis specialan preskribon pri la konsulta kompetenteco, kvankam en la art. 14 de la Pakto de la Ligo de Nacioj estis, interalie, antaŭvidite, ke la Kortumo donos konsilajn opiniojn. Ĝuste tial, okaze de la revizio en la j. 1929, estis aldonita aparta ĉapitro pri la konsilaj opinioj. Sed ankaŭ tiuokaze oni ne enmetis en la Statuton iun apartan preskribon pri la konsulta kompetenteco. Tiamaniere tiu formala-teknika manko estis neniam forigita.

Ŝajnas, do, ke estas plej korekte kompreni la novan preskribon de la art. 36/I en tiu senco, ke ĝi rilatas al la konsulta funkcio de la Kortumo. Tiamaniere, antaŭ ĉio, oni restas konforma al la ĝenerale rekonita principo de interpretado, ke ĉiu vorto havas sian signifon kaj sian juran sencon. Tiamaniere, plue, oni ne devas serĉi la helpon de la preparlaboroj, kio, cetere, estas malpermesita laŭ kelkaj juraj sistemoj (ekzemple la angla). Tiamaniere oni ankaŭ forigas formalan mankon de la malnova Statuto. Fine, tiamaniere oni ligas la "speciale antaŭviditan kazon" el la art. 36/I de la Statuto kun la efektive speciale antaŭvidita kazo en la Ĉarto. Ni pensas al la art. 96 de la Ĉarto, kiu tekstas:

"La Ĝenerala Asambleo aŭ la Konsilo de Sekureco povas postuli de la Internacia Kortumo konsilajn opiniojn pri kiu ajn jura demando.

La aliaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj la specialigitaj institucioj, kiujn la Ĝenerala Asambleo povas en kiu ajn momento rajtigi al tio, povas same tiel postuli konsilajn opiniojn de la Kortumo pri juraj demandoj, kiuj stariĝas en la kadro de ilia aktiveco."

Ĉi tie fakte temas pri speciale antaŭviditaj kazoj. En tiuj kazoj oni ne parolas, kompreneble, pri la procesa, kontraŭdira kompetenteco, sed ankaŭ la art. 36/I de la Statuto neniel limigas sin nur al tiu kompetenteco, sed ĝi rilatas ĝenerale al la kompetenteco de la Internacia Kortumo. Kaj la kompetenteco konsulta estas sendube kompetenteco, eĉ kompetenteco treege grava.

La tiel interpretita art. 36/I de la Statuto mallonge kaj koncize difinas la tutan kompetentecon de la Kortumo, t.e. kaj la kontraŭdiran (fakultativan kaj devigan) kaj la konsultan. Koncerne la lastan, ĝi estas en la art. 36/I nur principe rekonita. En tiu artikolo ne estas fiksitaj ĝiaj limoj koncerne la objektojn nek koncerne la subjektojn, kiuj povas ekfunkciigi la proceduron. La reguloj pri tio troviĝas en la art. 96 de la Ĉarto, kiu preskribas kaj la objekton de konsila opinio (ĉiu jura demando) kaj la subjekton, kiu rajtas ĝin postuli. La samaj reguloj troviĝas ankaŭ en la art. 65/I de la Statuto. Ĝi respondas al la art. 96 de la Ĉarto. Nur ĉi tie la roloj


estas renversitaj: oni preskribas pri kio la Kortumo povas esti konsultita kaj al kiu ĝi devas doni sian konsilan opinion. Mallonge: la nova preskribo de la art. 36/I de la Statuto principe rekonas la konsultan kompetentecon de la Kortumo; la art. 96 de la Ĉarto kaj la art. 65 de la Statuto difinas la objektajn kaj subjektajn limojn de tiu principe rekonita kompetenteco.

Tiamaniere ĉiuj preskriboj de la menciitaj artikoloj formas unuecan tuton. Krome, nur en tiu okazo la art. 36/III de la Ĉarto povas esti konsiderata kiel "en plena harmonio kun la art. 36 de la Statuto, akceptita en la Unua Komitato de la Tria Komisiono", kiel estis akcentite dum unu el la kunsidoj en San Francisko ¹¹⁾.

Kvankam ni volonte apogas ĉiun tendencon, celantan plilarĝigi la devigan kompetentecon de la Kortumo, tamen ni devas bedaŭrinde rekoni, ke la atingopovo de la nova art. 36/I de la Statuto estas tute egala al tiu de la art. 36/I de la malnova Statuto. Se temas pri redakta eraro, oni devas konsideri, ke la nova preskribo ne ekzistas. Se oni akceptas la starpunkton, laŭ nia opinio korekta, ke ĝi rilatas al la konsulta kompetenteco de la Kortumo, tiam estas nur farita necesa teknika plibonigo, kiu, tamen, nenion ŝanĝas, ĉar la Kortumo, ankaŭ sen ĝi, donadus siajn konsilajn opiniojn surbaze de la art. 96 de la Ĉarto kaj de la ĉap. IV de la Statuto.

La nova art. 36/I de la Statuto alportas, do, nenion novan.

(¹¹) Dokumentoj pri la Konferenco de U.N. en S. Francisko, Vol. XII, p. 116.



ENHAVO

	Paĝo
ANTAŬPAROLO	5
<i>UNUA PARTO</i>	
FUNDAMENTAJ NOCIOJ	
<i>Ĉapitro I</i>	
NACIO KAJ ŜTATO	11
1) La nacio	12
2) La ŝtato	19
<i>Ĉapitro II</i>	
INTERŜTATAJ RILATOJ KAJ INTERNACIA JURO	24
1) La interŝtataj rilatoj	25
2) La internacia juro	27
a) Kelkaj precizigoj	27
b) Karakterizoj de internacia juro	28
c) Fontoj de internacia juro	31
d) Subjektoj de internacia juro	33
<i>Ĉapitro III</i>	
PRI LA KONCEPTO DE DIPLOMATIO	35
<i>Ĉapitro IV</i>	
LA FEDERALISMA PRINCIPO	39
1) Karakterizoj de federacia ŝtato	41
2) Kelkaj ĝeneralaj rimarkoj	45
<i>DUA PARTO</i>	
LUKTO POR LA PACO PER JURAJ RIMEDOJ	
<i>Ĉapitro V</i>	
METODOJ POR SOLVADO DE INTERNACIAJ KONFLIKTOJ	53
<i>Ĉapitro VI</i>	
LA INTERNACIA KORTUMO KAJ ĜIA ROLO	58
<i>Ĉapitro VII</i>	
LA INTERNACIA KRIMO	66
	143

Ĉapitro VIII

LA FUNDAMENTAJ HOMAJ RAJTOJ KAJ ILIA JURA PROTEKTO	73
1) Iom da historio	74
2) Klopodoj sur internacia kampo	78
3) La Homaj Rajtoj kaj la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj	80
4) La laboroj de Unuiĝintaj Nacioj — Genocido	83
5) La enhavo de la Universala Deklaracio	87
6) La jura signifo kaj la atingopovo de la Universala Deklaracio	89

TRIA PARTO

INTERŜTATAJ ORGANIZAĴOJ

Ĉapitro IX

LA BAZO KAJ LA FORMIĜO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ	95
1) Du evolulinioj de la mondpolitiko	95
2) Ĉefaj etapoj en la formiĝo de U.N.	102

Ĉapitro X

LA FUNKCIADO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ	108
1) Nomo kaj celo	108
2) Membreco	109
3) Organoj	111
4) Konsisto kaj funkcioj de la organoj	112

Ĉapitro XI

ALIAJ INTERŜTATAJ ORGANIZAĴOJ	120
1) Regionaj organizaĵoj	120
2) Specialigitaj institucioj	123

Ĉapitro XII

KONKLUDO	128
--------------------	-----

ALDONO

LA SIGNIFO DE LA VORTOJ "ĈARTO DE UNUIĜINTAJ NACIOJ"	
EN LA ART 36/I DE LA STATUTO DE LA INTERNACIA	
KORTUMO	131
1) Kombino de pluraj artikoloj	132
2) Eraro de redaktado	137
3) Konsulta kompetenteco	139